

V-18679

Esperanto

JARLIBRO

1962

DUA
PARTO

**UNIVERSALA
ESPERANTO-ASOCIO**
(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

UNIVERSALA ESPERANTO - ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

U.E.A. eldonas monatan Revuon
U.E.A. eldonas Jarlibron en du partoj
U.E.A. havas vastan delegitan reton
U.E.A. organizas la Universalajn Kongresojn
U.E.A. kreis la Centron de Esploro kaj Dokumentado
U.E.A. ebligis la reprezentigon en Montevideo
U.E.A. iniciatis la Internacian Someran Universitaton
U.E.A. organizas la Belartajn Konkursojn
U.E.A. aranĝis la Universalan Ekspozicion
U.E.A. kreis Agadon en Proksima Oriento
U.E.A. funkciligas Internacian Gazetaran Servon
U.E.A. funkciligas Eldonan Fakon
U.E.A. aŭspicias la Internacian Artan Teatron
U.E.A. havas Filman Servon
U.E.A. havas Korespondan Servon
U.E.A. havas Magnetofonan Servon

ĈIO ĈI MERITAS VIAN SUBTENON

Tial: Aligu viajn amikojn al U.E.A.

Membro kun jarlibro: 7,50 gld., 30 steloj

Membro kun jarlibro kaj revuo: 15 gld., 60 steloj

Centra Oficejo de U.E.A.

Nieuwe Binnenweg 176 - Rotterdam - Nederlando

Prof. Mieczysław Sygnarski
Lektoro de Esperanto en Jag. Univ.
str. Francesco Nullo 12/3
KRAKÓW - POLLANDO

JARLIBRO

DE LA UNIVERSALA
ESPERANTO - ASOCIO

1962

DUA PARTO

La enhavo de ĉi tiu Jarlibro ne povas
esti represita ĉu tute, ĉu parte, sen la
permeso de U.E.A.

NUR POR UZO DE MEMBROJ

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(En Konsultaj Rilatoj kun U.N.E.S.C.O.)

Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2,
Nederlando

Kun plezuro mi prezentas al vi ĉi tiun Duan Parton de la Jarlibro; kun plezuro, ĉar ĝia akurata apero montras ke la ĉefaj kaŭzoj de la ĉijara prokrasto estas venkitaj, kaj kun plezuro ankaŭ, ĉar en tiu ĉi eldonaĵo ni povas publikigi adresliston de firmaoj, kiujn oni povas kontakti pere de Esperanto, per kio plenumiĝas la deziro de multaj. La kompilon ni dankas al D-do J. Tensen en Amsterdam.

Des pli kontenta mi estas, ĉar tiu ĉi jarlibro venas en eksterordinare grava momento en la historio de la Asocio, je komenciĝo de nova epoko. Tial mi ankaŭ varme rekomendas al ĉiuj, legi ĝin kun pli ol kutima atento.

En tiu ĉi jaro la Asocio establiĝis en propra oficeja domo, bela, taŭga, kaj celtrafe instalita, en centro de grava urbo, dua havenurbo de la tuta mondo. Pluraj helpemaj esperantistoj grandanime donacis por ĝi la sumon de po 5000.— gld. kiel simbolan aceton de ĉambro en ĝi, tiel malpliigante la finanĉan ŝarĝon de la Asocio. Ni ne povas esti sufiĉe dankemaj al ili pro tio.

La bonega kaj glate evoluinta ĉijara Universala Kongreso en Kopenhago, unuan fojon organizita laŭ la nova Kongresa Regularo akceptita en Harrogate, montris la taŭgecon de tiu Regularo kaj promesas plej kontentigan funkciadon ankaŭ por estontaj kongresoj.

Nove elektitaj Estraro kaj Komitato, kies kompletan konsiston oni trovas en tiu ĉi eldonaĵo, akceptis siajn taskojn en Kopenhago, decidis i.a. daŭrigi la lernejan kampanjon kaj akceptis ankaŭ, unuanime, la Duan Laborplanon de U.E.A., kies tekston, same, oni trovas en tiu ĉi jarlibro. La Unua Laborplano, akceptita en 1955 en Bologna, estas plenumita, do ankaŭ tiukoncerne nova periodo komenciĝas.

Mi akcentu ankoraŭ, ke ankaŭ por 1962 U.E.A. estis kandidatigita por la Nobel-Pacpremio.

Do, kun nova Domo, nova Komitato, nova Estraro, nova Kongresregularo, nova Laborplano, kun ĉies helpo la Asocio ricevos novan svingon antaŭen !

M. H. Vermaas,
Direktorino C.O.

REZOLUCIO

IV. 1.4.422 La Generala Konferenco, diskutinte la Raporton de la Generala Direktoro pri la Internacia Peticio favora al Esperanto

IV. 1.4.4221 Notas la rezultojn atingitajn per Esperanto sur la kampo de la internaciaj intelektaj intersaĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo;

IV. 1.4.4222 Rekonas, ke tiuj rezultoj respondas al la celoj kaj idealoj de U.N.E.S.C.O.;

IV. 1.4.4223 Notas, ke pluraj Statoj-Membroj informis pri sia preteco enkonduki aŭ ampleksigi la instruadon de Esperanto en siaj lernejoj aŭ superaj edukaj institucioj, kaj petas tiujn Statojn-Membrojn informadi la Generalan Direktoron pri la rezultoj atingitaj sur tiu kampo;

IV. 1.4.4224 Instruicias la Generalan Direktoron sekvi la kurantan evoluon en la uzado de Esperanto en scienco, edukado kaj kulturo, kaj tiucele kunlabori kun Universala Esperanto-Asocio en aferoj koncernantaj ambaŭ organizaĵojn.


El: Rezolucioj de la Generala Konferenco de UNESKO, Montevideo, 1954.

UNUAN FOJON UNIVERSALA KONGRESO EN BULGARUJO



Oriento kaj Okcidento renkontiĝas en Sofio
la urbo de la

48-a Universala Kongreso de Esperanto
Trafu neforgeseblan sperton !



Fotokarto de Zamenhof

Prezo : 0.20 gld.; 0.80 steloj. Mendu ĉe U.E.A.

La Memorlibro

pri la

Zamenhof-jaro

**Monumento al la aŭtoro de la
Internacia Lingvo**

Elstaraj artikoloj de Prof. G. Waringhien, Prof. E. Privat, Prof. W. E. Collinson, Prof. E. A. Bokarev, Prof. I. Lapenna, D-ro A. Albault, D-ro A. Zamenhof, Prof. P. Ravila, Mag. V. Setälä, P. Davis, F-ino M. Boulton, J. Francis, Mag. W. Auld, S-ino C. Conterno, Doc. J. Régulo Pérez, Prof. G. Canuto, Prof. S. Nishi, Prof. H. Sirk, C. Stop-Bowitz, D-do G. F. Makkink, D. Kennedy, F. Moravec, S-ino J. C. Isbrucker, G. F. Fighiera. Poemoj de Privat, Kalocsay, Szilagyi, Thorsen.

Resumo pri la tutmondaj celebradoj

Riĉa fotomaterialo

**Elegante bindita en bonkvalita tolo kun
stampo en oro**

Prezo : 12,50 gld.

50.— steloj

Havigu al vi ĉi tiun valoran verkon !

Eldonis C.E.D.

Mendu ĉe U.E.A.

Nieuwe Binnenweg 176 — Rotterdam-2



Prezo :
5.— gld.,
20 steloj

"Mi tre ĝojas, ke vi sukcesis pliriĉigi nian neabundan fakan literaturon per ankoraŭ unu valora popularscienca libro, kaj mi kore vin gratulas pro ĝia bonkvalita enhavo. Ĝi estas tute distra legaĵo, ĝuste el la speco, kiun ni tiel ege bezonas."
(D-ro Paul Neergaard (Kopenhago) en letero sendita al la reverkinto la 4.1.1961.)

Eldoninto en okcidento : U.E.A.

Moderna lernolibro de Esperanto

por la tuta mondo

Natura metodo por memlernantoj kaj por kursoj
— nur mallonga enkonduko nacilingve — ĉio cetera
en Esperanto kaj per ĉarmaj ilustraĵoj

Vilho Setälä :

Privilegia Vojo

al lingvoscio : Esperanto

Kun instrukcio en A, Da, F, G, H, Ne, No k.a.
lingvoj, laŭ elekto de la mendanto
Prezo 10 steloj + sendkosto

ĉe UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

D-ro F. Szilágyi : "Mirinde logika konstruo."
F. Faulhaber : "La aventuroj de Keko kaj Riko
estas vere originalaj, komikaj rakontoj, kiuj
streĉas la atenton de eĉ plenaĝuloj."

J. R. G. Isbrucker, prez. de la Akademio : "Se mi
ne jam sciis Esperanton, mi certe ŝatus lerni ĝin
per tia libro."

Kuneldoninto por la landoj ekster Finnlando kaj
Svedujo : U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, R'dam,
Nederlando.

RETORIKO

kun aparta konsidero al Esperanta parolarto
de

IVO LAPENNA

Dua Eldono reviziita kaj kompletigita

Gia unua parto donas perfektan argumentadon pri
la lingvoevoluo, utiliga al ĉiu esperantisto.

Eldono de la Aŭtoro

Prezo : 11.— gld. bind.
44.— steloj

9.— gld. broŝ.
36.— steloj

Mendu ĉe U.E.A.,
aŭ ĉe la aŭtoro



Dezirinda posedaĵo por ĉiu esperantisto.

INFANOJ NE KONAS LIMOJN

Belega fotolibro kun teksto en Esperanto.
Eldonis **BRUNA**, Nederlando.

Sur kvin
kontinentoj
infanoj estas
ĉarmegaj en
siaj ĝojo,
ĉagreno,
ludo kaj
laboro
Konvinkigu
mem !

Prezo:
2,95 gld.
(11,80 steloj)

**MENDU ĈE
U.E.A.**



La medicina scienco ĉiam pli progresas !
La meza aĝo de la homo fariĝas de tago al
tago pli alta ! Do,

KIAL

VI NE FARIĜU DUMVIVA MEMBRO DE U.E.A. ?

La kotizo estas nur 20-oblo de la kotizo de
Membro-Abonanto.

Sendube vi intencas resti pli longe ol 20 ja-
rojn fidela membro de U.E.A.

Se vi estas juna, la Dumviva Membreco estos
al vi tre profita. Post 20 jaroj senpage vi
restos Membro-Abonanto de U.E.A.

Se vi estas jam neĵuna sed sana kaj iom
atentos la trafikon, ankoraŭ la Dumviva
Membreco estos profita al vi, ĉar eventualajn
postajn kotizaltiĝojn vi ne pagos. Krome —
vi helpas la Asocion kaj tio donos moralan
kontentigon.

TIAL

FARIĜU DUMVIVA MEMBRO DE U.E.A. !

Ĉu vi ŝatas la modernajn artaĵojn ???

Ĉu ĵes aŭ ne, vi certe ŝatos legi pri
La plej malnova bildgalerio en la mondo
nur unu el la ilustritaj artikoloj en la NOVA
kajero de

BELARTO

Literatura kaj arta suplemento al "Esperanto".
Kontribuis al tiu ĉi riĉe ilustrita numero verkistoj
el 19 landoj.

Redaktis :

WILLIAM AULD

BELARTO 2 aperas sur 68 paĝoj plus kovrilo en
la sama formato kiel "Esperanto".

Ĝi kostas nur 3,50 gld. (14 steloj) kaj por individuaj
membroj de U.E.A. eĉ nur 3,— gld. (12 steloj).
Ĉu vi jam posedas la UNUAN kajeron de BELARTO,
aperintan en 1958 ?

Se ne, profitu la okazon mendi ankaŭ ĝin. Limigita
kvanto estas ankoraŭ je dispono. Nur je samtempa
mendo oni pagas por la unua kajero nur 2,25 gld.
(9 steloj), dum la normala prezo estas 3,25 gld.
(13 steloj) !

Ne malhavigu al vi la ĝuon, kiun povas doni al vi
Belarto !

SUBTENU LA INTERNACIAN KULTURON !
AĈETU 'BELARTON' !
MENDU ĜIN HODIAŬ !

HELPU LA ESPERANTISTOJN

kiuj ne povas mem aliĝi al U.E.A. !

SUBTENU LA FONDAĴON

PROF. CANUTO

starigitan por ebligi aliĝon al esperantistoj en landoj, de kie oni ne povas pagi al Okcident-Eŭropo.

Samtempe kun via propra kotizo 1962 bonvolu sendi kotizon por la Fondaĵo Prof. Canuto : MA, MJ, J-MA aŭ J-MJ.

Se vi ne povas mem indiki nomon de membrigoto, la Centra Oficejo volonte elektos por vi.

Plej varman dankon anticipi en la nomo de ĉiuj membrigotoj, al kiuj per tio la mondo estos malfermita !



INTERNACIA REVUO
PRI LITERATURO
FILMO TEATRO

MONDA
KULTURO

Aperas kvaronjare.

Abonprezo : 15.- gld., 60 steloj aŭ egalvaloro.
Mendu ĝin pere de la konataj perantoj aŭ rekte
de U.E.A., Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam,
Nederlando. Poŝteĉkonto : 378964.

ANGLA ANTOLOGIO

1000 - 1800

Redaktoroj

WILLIAM AULD

RETO ROSSETTI

64 verkistoj — 11 tradukintoj

320 paĝoj; bindita

Prezo: 10.— gld.; 40 steloj

ELDONA FAKO DE U.E.A.

UNIKA VERKO PRI FAMA LITERATURO

Legu la recenzojn en la Esperanto-gazetaro kaj
mendu ĝin ĉe U.E.A.!

U.E.A. KOTIZOJ 1963

Klarigo de la tabelo sur la sekvanta paĝo

MJ (Membro kun Jarlibro) ricevas membrokarton, mem-
bromark-folion kaj la jarlibron (Unua Parto printempe;
Dua Parto aŭtune).

MA (Membro-Abonanto) ricevas membrokarton, membro-
mark-folion, la jarlibron kaj la oficialan gazeton
Esperanto.

MS (Membro-Subtenanto) ricevas membrokarton, mem-
bromark-folion, la jarlibron kaj la oficialan gazeton
Esperanto. Li afable pagas pli altan kotizon por helpi
al U.E.A. finance.

J-MJ kaj J-MA (Junuloj ĝis 21-jaraj) pagas duonon de la
kotizoj MJ kaj MA kaj ricevas la samon.

Patr. (Patrono) ricevas membrokarton, membro-
mark-folion, la jarlibron, kaj la oficialan gazeton Esperanto.
Li bonvole pagas la dekoblan MA-kotizon por helpi al
pli efika laboro internacia.

Jarl. La cifero en ĉi tiu kolono indikas la prezon de tut-
paĝa reklamo en la jarlibro. Duonpaĝa aŭ kvaronpaĝa
(pli malgranda ne akceptata) reklamo kostas proporcie.
La teksto de la reklamoj kaj la pago devas atingi la
Centran Oficejon plej malfrue la 15-an de Novembro
por la unua parto, kaj la 15-an de aŭgusto por la dua
parto.

Ab. La cifero en ĉi tiu kolono indikas la koston de aparta
abono al Esperanto (sen membreco) por la tuta jaro.

Ĉiuj kotizoj validas por la kalendara jaro.

Dumviva membreco kostas 20-oble la MA-kotizon.

Oni povas pagi kotizojn al la pagejoj indikitaj, aŭ al la
Centra Oficejo:

Universala Esperanto-Asocio,

Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2, Nederlando

pĉk 378964

KOTIZOJ 1963

Lando	MJ	MA	MS	Patr.	Jarl.	Ab.	Valuto
Argentino	7.50	15.—	22.50	150.—	80.—	11.50	n.gld.
Aŭstralio	19.—	38.—	57.—	380.—	202.—	28/6	aŭs. ŝil.
Aŭstrujo	54.—	108.—	162.—	1080.—	550.—	81.—	Sch.
Belgujo	100.—	200.—	300.—	2000.—	1100.—	160.—	b.fr.
Brazilo	7.50	15.—	22.50	150.—	80.—	11.50	n.gld.
Britujo	15.—	30.—	45.—	300.—	160.—	22/6	ŝil.
Bulgarujo	7.50	15.—	22.50	150.—	—	11.50	n.gld.
Ĉeĥosl.	7.50	15.—	22.50	150.—	—	11.50	n.gld.
Danlando	15.—	30.—	45.—	300.—	160.—	22.50	d.kr.
Finnlando	730.—	1460.—	2190.—	14600.—	8000.—	1150.—	f.mk.
Francujo	10.—	20.—	30.—	200.—	106.—	15.50	N.F.
German.	9.—	18.—	27.—	180.—	90.—	14.—	g.mk.
Grek.	7.50	15.—	22.50	150.—	80.—	11.50	n.gld.
Hispanujo	120.—	240.—	360.—	2400.—	1200.—	180.—	pes.
Islando	7.50	15.—	22.50	150.—	80.—	11.50	n.gld.
Israelo	7.50	15.—	22.50	150.—	80.—	11.50	n.gld.
Italujo	1350.—	2700.—	4050.—	27000.—	16000.—	2040.—	liroj
Japanujo	7.50	15.—	22.50	150.—	80.—	11.50	n.gld.
Jugosl.	1275.—	2550.—	3825.—	25500.—	—	—	din.
Kanado	2.25	4.50	6.75	45.—	22.—	3.50	dol.
Kubo	2.25	4.50	6.75	45.—	22.—	3.50	dol.
Maroko	7.50	15.—	22.50	150.—	80.—	11.50	n.gld.
Nederl.	7.50	15.—	22.50	150.—	80.—	11.50	n.gld.
Norveg.	15.—	30.—	45.—	300.—	160.—	22.50	n.kr.
N.Zeland.	15.—	30.—	45.—	300.—	160.—	22/6	ang. ŝil.

PAGU LA KOTIZON AL

- J. C. Milkuschutz, Sarmiento 3298, Olivos.
K. G. Linton, 11 Poplar St., South Caulfield S.E. 8, Melbourne.
Oskar Sinner, Schönbrunner-Allee 53, Wien XII. Pĉk: 38751.
François Schellekens, Frans Hensstraat 44 c-10-3, Antwerpen.
Brazila Esperanto-Ligo, Praça da República 54-I, Rio de Janeiro.
Brita Esperantista Asocio, 140 Holland Park Ave., London, W. 11.
Bulgara Esperanto-Asocio, Poŝtkesto 66, Sofia.
J. Šustr, Dlouhá 10, Praha I.
Seren Andresen, Friggvej 10 st. tv. Fredericia. Pĉk: 12692.
Joel Vilkkil, Somero, Poŝtgiro 60253.
U.E.F., 34 Rue de Chabrol, Paris 10. Pĉk. 855-35.
Fr. Helfers, Postschliessfach 692, (17a) Karlsruhe, Pĉk. 24506.
S. Sakellaropoulos, Agias Paraskevis 30, Kato Patissia, Athine.
Ramon Molera, Sta Joaquina de Vedruna 13, Moyá (Barc.).
Fed. de Islandaj Esperantistoj, Pósthólf 1081, Reykjavík.
J. Ben Alter, Meonot Ovdim 31, Petah Tikva.
I.E.F., Via Po 7, Torino.
Japana Esperanto-Instituto, Hongo Motomati 1-13, Tokio.
S-ino E. Lapenna, Nova Ves 32-III, Zagreb.
W. D. B. Hackett, 362 Soudan Ave., Toronto, Ont.
Raul Juárez - Sedeño, Apartado 570, Luaces 155, Camagüey.
René Cagnon, 9 Rue Coli, Rabat.
J. Telling, Schietbaanlaan 106a, Rotterdam-3, Pĉk. 2426-19.
Alfred Skyberg, Østensjøveien 118, Oslo. Pĉk. 13329.
Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, P.O. 3214, Auckland.

Pollando	7.50	15.—	22.50	150.—	11.50	n.gld.
Portug.	60.—	120.—	180.—	1200.—	640.—	esk.
Sudafr.	1.50	3.—	4.50	30.—	16.—	r.
S.Afriko	15/—	30/—	45/—	300/—	160/—	22/6 ang. ŝil.
Svedujo	11.—	22.—	33.—	220.—	110.—	16.50 sv.kr.
Svislando	9.—	18.—	27.—	180.—	90.—	14.— sv.kr.
Urugvajo	7.50	15.—	22.50	150.—	80.—	11.50 n.gld.
Usono	2.25	4.50	6.75	45.—	22.—	3.50 dol.
Venezuelo	7.50	15.—	22.50	150.—	80.—	11.50 n.gld.
Aliaj land.	7.50	15.—	22.50	150.—	80.—	11.50 n.gld.

Pagante la Kotizon

ALDONU KONTRIBUON

por

unu el la fondaĵoj por fortiki-
gigi la rimedojn de U.E.A.!

Pola Esperanto-Asocio, Nowy Swiat 27, Varsovio.
J. Antunes, Rua dos Franqueiros 106, 4, dto., Lisboa.
E. W. Woodruff, c/o Witwatersrand Tech. Coll.,
P.O. Box 3293, Johannesburg.

Sveda Esperanto-Federacio, Specialkonto, Malmö, Pëk
14 74 29.

O. Walder, Waldmannstr. 10, Romanshorn, Pëk. VIII, 12139.
D-ro R. Zeballos Morales, Fray Marcos (Florida).

D. E. Parrish, 328 West 46 Str., Los Angeles 37. Calif.

L. Moulines, Apartado del Este 4845, Caracas.

al UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO,

Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-2.

Pëk. 378964, Banko : R. Mees & Zoonen

Celoj por viaj donacoj:

Fondaĵo Prof. Canuto

Fondaĵo Zamenhof

**Centro de Esploro kaj
Dokumentado**

Fondaĵo Universala Ekspozicio

Fondaĵo Officeja Ilaro

A.P.O.

I.A.T.

Fondaĵo Domo

Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto:

Prof. D-ro Hideo Yagi

Generala Sekretario:

Prof. D-ro Ivo Lapenna

Komitato:

Albault, D-ro A., 8, Avenue Et. Billières, **Toulouse**, Francujo. Tel.: 42-98-71.

Allan, J. T., 12 Lonsdale Crescent, **Wellington**, E.3, Nov-Zelando. Tel.: 73-679.

Anjer, L., Box 7, **Oslo-Nordstrandhögda**, Norvegujo. Tel: 68.61.48.

Auld, Mag. William, 35 Deer Park, Sauchie, **Alloa**, Clackmannanshire, Skotlando. Tel.: 1387.

Azzi, D-ro Ing. Giordano, Viale Giulio Cesare 20, **Como**, Italujo. Tel.: 23459.

Baghy, Julio, Rottenbiller u. 66/I/20, **Budapest VII**, Hungarujo.

Becker, Günther, Schlossbergstr. 51, (6653), **Blieskastel**, Germanujo.

Czuba, Z., Odynea 73, m 100, **Warszawa**, Pollando.

Dahl, Einar, Box 900, **Uddevalla**, Svedujo.

Deubler, K., Agnesstrasse 5/III, (13b) **München**, Germanujo.

Domingues, D-ro Carlos, Rua Alvaro Alvim 27, ap. 61, **Rio de Janeiro**, Brazilo. Tel.: 32-9560.

Dratwer, Isaj, Ešel 86/15, Bat-Jam, **Ramat Josef**, Israelo.

Egami, Prof. F., Nisikatamati 10-Ni-50, Bunkyo-ku, **Tokio**, Japanujo.

Epstein, Felix, Ludolfstrasse 50 II, **Hamburg** 20, Germanujo. Tel. 487371.

Figuerola, A., str. Costa Rica 20 bajo A, **Madrid**, Hispanujo.

Garrigue, F-ino C., 34 rue Vauvenargues, **Marseille** 7, (B.d.Rh.), Francujo.

Grattapaglia, Giuseppe, Via Pallanza 32, **Torino**, Italujo.

Grigorov, A., bulv. Tolbuhin 10, **Sofia**, Bulgarujo.

Guillaume, Jean, 8 rue Camille Saulnier, **Le Vésinet** (S.&O.) Francujo.

Herrmann, D-ro W., Bürstädter Str. 3, (684) **Lampertheim** (Hess.), Germanujo. Tel.: 639.

Holmes, Harry W., O.B.E., 38 Fillebrook Road, **London E 11**, Britujo. Tel.: LEYtonstone 2240.

Jaumotte, Maurice, 44 de Bruynlaan, **Wilrijk-Antwerpen**, Belgujo.

Kervers-van Tholen, S-ino E., v. Slingelandtstraat 22, **Den Haag**, Nederlando. Tel. 070-54.21.86.

Kühlmann, G., Løvetandsvej 31, **København**. BRH Danlando. Tel.: 600702.

Lakov, Atanas, bul. Tolbuhin 55, **Sofia**, Bulgarujo.

Lange, O.C., Giesegaardsvej 33, **Hvidovre**. Danlando. Tel.: (ol) 782073 (loĝejo), Hilda 3802 (komercejo).

Lapenna, S-ino Emilija, Nova Ves 32, **Zagreb**, Jugoslavio.

Lapenna, Prof. D-ro Ivo, 77, Grasmere Av., **Wembley**, Mddx., Britujo. Tel.: ARNold 9081.

Linton, Kenneth G., 11 Poplar St., South Caulfield S.E. 8, **Melbourne**, Aŭstralio.

Llech-Walter, René, 5 Quai Vauban, **Perpignan** (Pyr. Or.), Francujo. Tel.: (loĝejo) 54-38; (oficejo) 38-84.

Maertens, G., Pr. Leopoldstraat 51, **Sint Kruis**, Belgujo.

Minnaja, D-ro Nicola, viale Giulio Cesare 223, **Roma**, Italujo.

Oljanov, Violin, str. Vazov 17, **Sofia**, Bulgarujo.

Pádua, Geraldo, Rua Rio de Janeiro 1599, **Belo Horizonte**, (Minas Gerais), Brazilo.

Pancer, D-ro Ing. Oton, ulica JNA 39, **Sarajevo**, Jugoslavio.

Parker, F., 368 Colne Road, **Burnley**, Lancs., Britujo.

Peterson, Charles E., 8314 B. Florence Avenue, **Downey**, (Calif.) Usono.

Petit, P., 26 rue Rochebrune, **Rosny-sous-Bois**, Seine, Francujo.

Popović, Prof. B., Zagrebačka 12, **Sarajevo**, Jugoslavio.

Régulo Pérez, D-ro J., Apartado 25, **La Laguna**, Tenerife, Kan. Insuloj.

Rentmeister, Franz, Mariahilferstr. 206/I, **Wien** XV/101, Aŭstrujo.

Sato, D-ro J., Guayra 2076, **Buenos Aires**, Argentino.

Sekelj, Antonije, Kondina 24, **Beograd**, Jugoslavio.

Sekelj, Tibor, koresponda adreso : Kondina 24, **Beograd** Jugoslavio.

Setälä, Vilho, Esperantotie 4, **Irislahti** (Helsinki), Finnlando.

Smith, Norman R., c/o Kwame Nkrumah University, of Science and Technology, **Kumasi**, Ganao.

Söderberg, Karl, Luthagsplanaden 15a, **Uppsala**, Svedujo. Tel. : 36843.

Støp-Bowitz, C., Uranienborgvn. 10/IV, **Oslo**, Norvegujo. Tel. 448085.

Strönne, Jan, Amiralsgatan 36, **Malmö**, Svedujo. Tel. : 29211.

Sturzenegger, J. J., Rothstrasse 7, **Zürich** 57, Svislando.

Szablowska, D-rino Halina, Boboli 6/6, **Warszawa**, Pollando.

Szerémi-Toth, S-ino B., P.F. 147, **Budapest** 4, Hungarujo.

Saponjić, Ing. M., Svetog Save 23-I, **Beograd** IV, Jugoslavio.

Thierry, Jean, 5 rue de l'Abreuvoir, **La Courneuve**, (Seine), Francujo.

Toczyński, Józef, Krosna 29/5, **Gdansk-Chełm**, Pollando.

Törnskog, Harry, Box 52, **Stockholm-Alvsjö**, Svedujo. Tel. : 473288.

Trickov, Radoslav, Tolbuhin 63, **Vraca**, Bulgarujo.

Uspiński, J., Gałczyńskiego 10 m 7, **Warszawa**, Pollando.

Wells, J. C., 58 Rotherwick Road, **London** N.W. 11, Britujo.

Wensing, E. L. M., Aalsterweg 217, **Eindhoven**, Nederlando.

Woessink, E. J., Vondellaan 47, **Arnhem**, Nederlando. Tel. 21256.

Yagi, Prof. Hideo, 76 Kawaramachi, **Okayama**, Japanujo.

Ziegler, Sven, H. P. Olsens Vaenge 37, **Taastrup**, Danlando.

Zlatnar, P., Rimska c 7/II, **Ljubljana**, Jugoslavio.

Observantoj :

Derks, J. J., "Santa Monica", Boulevard d'Italie 8, **Monte Carlo**, Monako. Tel. 30.30.97.

Mayer, Prof. J. R. A., 21 Beaucourt Rd., **Hamilton**, (Ont.), Kanado.

Rousseau, Henri, P.B. 730, ASECNA, **Tananarive**, Madagaskaro.

Sakelaropoulos, Sokratis, Agias Paraskevis 67, **Káto Patissia**, **Athinai**, Greklando.

Zeballos Morales, D-ro Romulo, **Fray Marcos**, (Florida), Urugvajo.

HONORA PATRONA KOMITATO

Prof. D-ro W. E. Collinson, emerita profesoro de la Universitato de Liverpool, Britujo, M.A. de la Universitato de Londono, Dr. phil. de la Universitato de Heidelberg, "Fellow" de la "University-College" en Londono.

Prof. D-ro M. Fréchet, emerita profesoro de la Universitato de Parizo, membro de la Sciencaj Akademioj de Francujo, Pollando kaj Nederlando, prezidinto de I.S.A.E.

Prof. D-ro Seiho Nishi, estinta profesoro de la Universitatoj de Sendaj kaj Tokio, nun rektoro de la Universitato de Gumna, prezidanto de Maebasi Medicina Kolegio, prezidanto de I.S.A.E.

Prof. D-ro Björn Collinder, profesoro pri finn-ugraj lingvoj en la Universitato de Upsala, Svedujo.

Prof. Herbert L. Elvin, estinta direktoro de la Departemento pri Edukado de UNESKO, nun direktoro de la Instituto pri Edukado de la Londona Universitato.

D-ro W. Drees, estinta ministro pri Sociaj Aferoj kaj ĉef-ministro, nun Honor-Ministro en Nederlando.

ESTRARO DE U.E.A.

Prezidanto:

Prof. D-ro Hideo Yagi, 76 Kawaramachi, Okayama, Japanujo.

Generala Sekretario:

Prof. D-ro Ivo Lapenna, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

Vic-Prezidantoj:

H. W. Holmes, O.B.E., 38, Fillebrook Road, London E 11, Britujo.

E. L. M. Wensing, Aalsterweg 217, Eindhoven, Nederlando.

Membroj:

D-ro A. Albault, estrarano pri kulturaj aferoj kaj kongresoj, 8 Avenue Et. Billières, Toulouse, Francujo.

Z. Czuba, estrarano pri landaj kaj specialigitaj asocioj, Odynca 73 m 100, Warszawa, Pollando.

E. J. Woessink, estrarano pri financoj, Vondellaan 47, Arnhem, Nederlando. Tel.: 21256.

Sv. Ziegler, helpsekretario kaj estrarano pri informado, H. P. Olsens Vaenge 37, Taastrup, Danlando.

Direktorino de la Centra Oficejo: F-ino M. H. Vermaas.

Konstanta Kongresa Sekretario: G. Pompilio. (adreso ĉe la C.O.)

Redaktoro de "Esperanto": W. Auld, 35 Deer Park, Sauchie, Alloa, (Clacks.), Skotlando. Tel.: 1387.

Ekde februaro 1963: D-ro V. Sadler (adreso ĉe la C.O.)

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

London, Britujo

Honorofica direktoro:

Univ. Prof. D-ro Ivo Lapenna, jura konsilisto, 77 Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo. Tel. ARNOLD 9081.

Kunlaborantoj en ĉiuj landoj.

Celo:

A. Sciencaj esploroj: Lingvistikaj kaj sociologiaj studoj pri la Internacia Lingvo kaj ĝiaj multflankaj aplikoj sur ĉiuj kampoj de la homa aktiveco. Psikologiaj kaj sociologiaj studoj pri la moralaj kaj intelektaj efikoj, kiujn kaŭzas la praktika uzado de la Internacia Lingvo. Esplorado de la eblecoj por plua utiligo de la Internacia Lingvo precipe sur la kampoj de scienco kaj arto, intelektaj interŝanĝoj, trafiko kaj komerco.

B. Dokumentado: Enregistrigo de la plej gravaj dokumentoj koncerne la Internacian Lingvon kaj la Esperanto-organizaĵojn. Ellaborado de statistikoj. Kolektado de studoj kaj disertacioj.

C. Informado: Vasta utiligo de dokumentoj menciitaj sub B por verkado de artikoloj; kunmetado de tipaj prelegoj por diversaj okazoj; pretigado de bazaj flugfolioj, alvokoj kaj broŝuroj; aktiva partoprenado en ĉiuj medioj, kiuj pritraktas la problemon de komuna lingvo; interŝanĝado de informoj kaj dokumentoj kun UNESKO, UN kaj aliaj gravaj internaciaj organizaĵoj: liverado de konvena materialo al la landaj kaj fakaj asocioj.

Raporto pri la agado troviĝas en la Estrara Raporto en tiu ĉi Jarlibro.

SERVA CENTRO DE U.E.A.

Administranto: S-ro J. J. Sturzenegger, Rothstrasse 7, Zürich 57, Svislando.

T.E.J.O.	250,—	1.320,—
Diversaĵoj	8.859,45	7.400,—
Amortizoj	1.094,10	2.300,—
Saldo favora	604,04	
	121.962,83	114.220,—

*) Licencpago 6.559,07

Profito kaj krompagoj ankoraŭ ne konsiderataj.

STATO DE LA ELDONA FONDAĴO JE 31.12.1961

Saldo je la 31-a de decembro 1960 11.003,17

Profito el "La Internacia Lingvo"

vendoj	366,37	
kostprezo	145,80	220,57

Profito el "Angla Antologio"

vendoj	337,26	
kostprezo	180,—	157,26

Profito el "Belarta Aldono"

vendoj	794,49	
kostprezo	568,85	225,64

Profito el "Vagado sub Palmoj"

vendoj	116,21	
kostprezo	56,05	60,16

Profito el "Memorlibro"

vendoj	1.707,20	
kostprezo	692,—	1.015,20

Profito el gramofonaj diskoj

vendoj	596,81	
kostprezo	459,94	136,87
		12.818,87

El la gajno de 1815,70 pro librovendoj 25%
estas enskribita favore al la spezkonto por
kovri la kostojn de la libroservo 453,92

Kontribuo al Meteologia Terminaro 12.364,95
3.000,—
9.364,95

KONTROLA RAPORTO 1961

Subskribintoj kontrolis la librotenanadon de la jaro 1961 kaj la bilancon je la fino de la jaro de la Centra Oficejo en Rotterdam.

Konstatinte ke por tiu laboro ni ricevis ĉiujn deziratajn informojn de la direktorino de la C.O., F-ino M. H. Vermaas, kaj de S-ro E. J. Woessink, Estrarano por financoj de UEA, kaj ankaŭ de S-ro Storm, revizoro, kiu faris la bilancon;

Konstatinte ke danke al la supre menciitaj personoj, la kontoj de la C.O. kaj la jarfina bilanco respeguligas pli kaj pli la financon situacion de Universala Esperanto Asocio laŭ plej supervidebla maniero;

Konstatinte ke la rekomendoj faritaj de la kontrolintoj por la jaro 1960, transdonitaj de la financa komisiono en Harrogate al la Estraro por pli detala pristudo, estas grandparte aplikitaj dum la jaro 1961;

Konstatinte ke pro tro granda amplekso la detala ekzameno de ĉiuj kontoj ne estis ebla; ke ni tamen povas opinii ke ĉio estas en bona ordo;

Ni proponas ke la Komitato malŝargu F-inon M. H. Vermaas pro la bona gvidado de la Centra Oficejo kaj ĝia administrado el financa vidpunkto.

G. Maertens
Pr. Leopoldstraat, 51
Sint Kruis (Belgujo)

J. R. Janssen
Rijperweg, 12-II
Bloemendaal (Nederlando)

BILANCO JE 31.12.1961

Aktivoj

Monrimedoj	
Mees (banko), regula konto	13.892,53
Mees, (sparkonto)	28.182,33
Sparbanko, Rotterdam	1.241,10
Deak & Co., Hongkong	4.068,10
Poŝtekkonto Nederlanda	3.559,75
Poŝtekkonto Sveda (sv.kr. 2.795,95)	1.941,79
Poŝtekkonto Svisa (sv.fr. 265,63)	231,09
Kaso	750,54
Steloj kaj Respondkuponoj	2.266,55
Transira konto	1.178,27
	57.312,05
Valorpapiroj (Fondaĵo Hodler)	1.783,50
Ricevotaj enspezoj	6.490,—
Antaŭpagitaj elspezoj	591,53
Debitoroj	39.052,47
Provizoj	38.101,32
Inventario	7.637,61
Garantiaj sumoj	300,—
Oficeja domo	108.738,33
Aĉetkostoj	7.400,50
	116.138,83
	267.407,31

Pasivoj

Suldoj je longa periodo :		55.000,—
Hipoteko		
Suldoj je mallonga periodo		
Antaŭricevitaj enspezoj	11.956,43	
Membroj-bonhavantoj	35.497,96	
Sparkontoj-Tokio	4.671,70	
Liverantoj	14.653,98	
Aliaj ŝuldoj	212,—	
		66.992,07
Suldoj je Dumvivaj Membroj		p.m.
Fondaĵoj por specialaj celoj		
Eldona Fondaĵo	9.364,95	
Fond. Univers. Ekspozicio	194,79	
Fond. Oficeja Ilaro	442,48	
Propaganda Konto	8.929,24	
Fondaĵo Tokio-Kongreso	700,—	
Fondaĵo Zamenhof (neg.)	-1.250,80	
Fondaĵo Filma Servo	8,47	
Internacia Arta Teatro	120,26	
Fondaĵo Prof. Canuto (neg.)	-77,63	
Fondaĵo Portreto Prof. Canuto	40,—	
Agado Proks. Or.	230,84	
Afrika Agado	392,14	
		19.094,74
Laborkapitalo		
Garantia Fondaĵo	46.717,59	
Fondaĵo Hodler	13.860,84	
Fondaĵo Domo	39.223,87	
C.O. Rotterdam	26.518,20	
		126.320,50
		267.407,31

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

Konto de la C.O. 1-I — 31-XII-1961

	£	ŝ	p	£	ŝ	p
CED entute ricevis de U.E.A.	725-	5-	9			
Donacoj kiujn U.E.A. ricevis por CED				60-	3-	6
Subvencio de la Propaganda Konto				665-	2-	3
	725-	5-	9	725-	5-	9

Spezoj de CED por la periodo de 1-I — 31-XII-1961

Donacoj	95-	4-	0			
Subvencio	665-	2-	3			
Negativa saldo				24-	12-	11
Skribmaterialo				4-	11-	11
Poŝtelspezoj				38-	6-	10
Oficejo				207-	11-	1
Salajro de la sekretariino				384-	0-	0
Aliaj elspezoj				110-	1-	3
	760-	6-	3	769-	4-	0
Negativa saldo je finiĝo de la jaro '61	8-	17-	9			
	769-	4-	0	769-	4-	0

La 31-an de decembro 1961.

Sekretariino : (subskribita) Ljuba Lapenna

RAPORTO DE LA KONTROLINTOJ DE CED

Kopiite de la Kaslibro de CED

Ni kontrolis la librojn kaj ĉiujn necesajn dokumentojn kaj ricevis kontentigajn respondojn al niaj demandoj. Ni sekve atestas, ke ĉi tiu bilanco estas ĝusta.

En la oficejo de CED, la 18-an de februaro 1962.

Fred Parker John Rapley

BUĜETPROpono DE CED POR LA JARO 1963

	Enspezoj			Elspezoj		
	£	ŝ	p	£	ŝ	p
Donacoj	100-	0-	0			
Subvencio el Propaganda Konto	650-	0-	0			
Skribmaterialo				40-	0-	0
Poŝtelspezoj				50-	0-	0
Oficejaj elspezoj				210-	0-	0
Aliaj elspezoj (libroj, abonoj, imposto, ŝarĝo en la banko k.a.)				66-	0-	0
Salajro de la sekretariino				384-	0-	0
	750-	0-	0	750-	0-	0

46-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Harrogate, 5-12 aŭgusto, 1961

BILANCO

Enspezoj:

Kotizoj		4336	
Logiga Servo -makleroj	116		
komuna loĝejo	256	372	
-elspezoj		228	144
Ekskursa Servo enspezoj		1241	
elspezoj		884	357
Libroservo			107
Anoncoj			95
Poŝtkartoj			69
Esperanto-roko			30
Rentumo			39
Donacoj kaj Diversaj Enspezoj			65
		£ 5242	

Elspezoj:

Luo de ĉambroj		53	
Oficejo		120	
Afrankoj	217		
Materialoj	274		
Transportoj	70		
Vojagelspezoj	91	652	
Insignoj		136	
Propagando		172	
Gazeta Servo		212	
Infana Kongreseto		74	
Presaĵoj - Aligiloj kaj Bulteno I	130		
Bulteno II	213		
Kongres-libro			
k. Suplemento	616		
Glumarkoj-elspezoj	82		
elspezoj	58	24	
Kongres-kotizoj		8	
Diversaj presaĵoj		2	
transporto		£ 2412	

transporto

£ 2412

Programeroj - Interkona Vesp.	—	
Inaŭguro	32	
Balo	58	
Bankedo	—	
Teatra Vesperto	330	
Muzika Vesperto	261	
Arta Festivalo	273	
Junula Vesperto	25	
Intern. Som. Univ.	32	
Filmoj	20	
Oratora Konkurso	36	
Belarta Konkurso	20	1087
Licencpago	1301	
Makleroj	109	1410
Diversaj Elspezoj		159
		5068
Profito		174
		£ 5242

Aktivo:

Kaso	11
Banko	195
	£ 206

Pasivo:

U.E.A.	44
Kreditoroj	162
	£ 206

20 junio 1962.

Subskribita:

R. W. Hamilton,	G. C. Fighiera,	L. G. Livett,
Prezidanto	K.K.S.	Kasisto
P. Peat,	M. Harwood,	M. Gill,
Revizoro	Help-revizoro	Help-kasisto

RAPORTO DE LA ESTRARO

pri la agado de UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO en la laborjaro 1961/1962

I. ENKONDUKO

Estas utile memori, ke, konforme al la art. 30 de la Statuto, ankaŭ la ĉijara Raporto estas ellaborita de la ĝenerala sekretario. La Raporton diskutis la Estraro dum sia kunsido de la 14-a de aprilo kaj aprobis ĝin. La Raporto rilatas al la agado de la Asocio en la periodo inter la 1-a de aprilo 1961 kaj la 1-a de aprilo 1962. Konsiderante la fakton, ke en tiu ĉi jaro finiĝas la mandato de la Estraro elektita en Varsovio, la ĝenerala sekretario prezentos al la Komitato koncizan buŝan kompletigon por la restanta periodo, nome ĝis la komenciĝo de la U.K. La financa raporto concernas la kalendaran jaron 1961. Estas aldonita la Raporto pri la agado de CED por la sama periodo. En la fino troviĝas resumo de la raportoj de la landaj asocioj, kiun kunmetis la estraro pri la landaj kaj fakaj organizaĵoj.

En la pasinta laborjaro la Asocio daŭrigis ĉiujn antaŭajn multflankajn agadojn kaj faris novan progreson. La nombro de membroj denove iom kreskis kompare kun la pasinta jaro, sed tute certe ekzistas ebleco por altigi tiun nombron en la estonteco sur la bazo de la akiritaj pozicioj. Interne la Asocio plue fortikiĝis kaj la aĉeto de taŭga granda domo en la centro de Rotterdam estas rimarkinda evento, kiu tute certe faciligos la teknikan-organizan laboron kaj kontribuos al ankoraŭ pli granda fortiĝo de UEA en la estonteco. En la eksteraj rilatoj aparte menciinda estas la nova pozicio de UEA kiel konsulta organizaĵo en kategorio B de UNESKO. Alia ĝojiga fakto estas, ke denove konsiderinda nombro da kvalifikitaj personoj el 11 landoj proponis la Asocion kiel kandidaton por la Nobel-Pacpremio por la jaro 1962.

En la nuna jaro ne nur finiĝas la trijara periodo, por kiu la Komitato, Estraro kaj aliaj funkciuloj estis elek-

titaj en 1959, sed samtempe la jaro 1962 markas la finon de grava etapo en la historio de la Asocio kaj de la Internacia Lingvo ĝenerale. La Laborplano de la Asocio, akceptita en 1955 rezulte de la konata Rezolucio de UNESKO, kaj kompletigita en Kopenhago en 1956, estas plenumita en preskaŭ ĉiuj punktoj. Se kelkaj ideoj de la Plano ne povis esti realigitaj pro kaŭzoj ekster la povo de la Asocio, aliflanke nombro da aliaj punktoj, ne antaŭviditaj en la Laborplano, povis esti efektivigitaj. Interne pli forta ol iam antaŭe, kun propra domo kaj moderna oficejo en centro de grava urbo, ekstere kun elstara kaj prestiĝa pozicio, UEA nun povas alpaŝi novan etapon de sia agado. Tiucele estas ellaborita la Dua Laborplano de la Asocio kaj publikigita en la marta numero de "Esperanto". Temas nur pri projekto, kiun la Komitato, se necese, ŝanĝos aŭ al kiu ĝi faros aldonojn kaj kompletigojn. Post la akcepto fare de la Komitato ĝi estos bazo por la agado de la Asocio en la sekvanta periodo.

II. ĜENERALAĴOJ

(1) **Estraro**: Sub la gvidado de la Vicprezidanto H. W. Holmes O.B.E. la Estraro daŭrigis sian laboron en la sama konsisto. En Harrogate la Komitato decidis ne elekti novan Prezidanton, sed daŭrigi la situacion ĝis la Kongreso en Kopenhago, kiam finiĝos la trijara periodo kaj estos formitaj novaj Komitato kaj Estraro. S-ro Holmes do restis aganta prezidanto.

La Estraro kunvenis por la printempa kunsido je 24-26-a de marto 1961 en la Centra Oficejo en Rotterdam. Ĝi traktis tagordon de 35 punktoj kun multaj subpunktoj. La tritaga kunsido daŭris entute 31 horojn.

Dum la U.K. en Harrogate la Estraro kunsidis sesfoje dum entute 20 horoj.

Krome okazis dum la jaro pluraj malgrandaj konferencoj inter estraranoj, redaktoro, direktorino kaj K.K.S., i.a. en Rotterdam, Kopenhago kaj Londono.

(2) **Komitato**: Al la Komitato estis aldonitaj du pliaj komitatanoj A: S-ro Isaj Dratwer, nomita de la Israela Esperanto-Ligo, kaj S-ro Sv. Ziegler, nomita de la Int.

Asocio de Juristoj-Esperantistoj. Aliflanke, ekde la Kongreso en Harrogate ne plu apartenas al la Komitato S-ro H. Jakob, ĝis tiam komitatano C, ĉar pro malobservado de la decidoj de la Komitato tiu instanco estis devigita esprimi al li malkonfidon en la senco de art. 8 de la Statuto.

La Komitato havis dum la Kongreso en Harrogate du kunsidojn de la Pleno, kiuj daŭris entute 12 horojn. Ĝi traktis tagordon de 30 punktoj kun multaj subpunktoj. Krome, tri komisionoj formitaj el la Komitato, nome por elektoj, por Statuto kaj por financoj, kunsidis ekster la Komitato dum entute 13 horoj.

(3) **Landaj Asocioj:** Kiel nove aliĝinta asocio estis akceptita la Israela Esperanto-Ligo. Ĝi havas 170 membrojn, do ĝi havas rajton je unu komitatano A.

(4) **Fakaj Asocioj Aliĝintaj:** Post I.S.A.E. aldoniĝis al tiu kategorio la Internacia Asocio de Juristoj-Esperantistoj. Ankaŭ ĝi nomis komitatano A.

(5) **Fakaj kaj specialigitaj asocioj kunlaborantaj:** Peto pri kontrakto estis farita de la Internacia Fakgrupo de Naturistoj Esperantistaj. Ĝi estas traktata kaj supezeble la Komitato decidis pri ĝi en Kopenhago.

(6) **T.E.J.O.:** La junularsekcio de U.E.A. havis sian kongreson en Wokingham, Britujo, post la U.K. en Harrogate.

"La Juna Vivo" daŭre aperas en la Revuo Esperanto. Redaktas ĝin nun ne plu S-ro Osibov, sed S-ro Heinrich Reiter, Vieno. T.E.J.O. mem raportas aliloke.

(7) **Fondaĵoj:** Kun plezuro ni konstatis ke al pluraj membroj plaĉas, ke la Fondaĵo-Zamenhof, starigita por la tutmonda agado dum la Zamenhof-Jaro, fariĝis konstanta fondaĵo. Daŭre dum la jaro alvenadis ankoraŭ donacoj. Je 1.3.62 la sumo entute ricevita por tiu fondaĵo estis 18.777,10 gld. Tio signifas kreskon de ankoraŭ 186,14 gld. en 1961.

Al la Fondaĵo Prof. Canuto oni dum la tuta jaro malavare donacis. Entute per preskaŭ 300 kotizoj en ĉiuj

kategorioj la membraro helpis al esperantistoj en landoj kun malforta valuto.

Regule oni kontribuas ankaŭ por A.P.O., ofte en formo de poŝtmarkoj, kiujn vendadas por tiu celo S-ro Peter Zacho en Kopenhago.

Forte la membraro reagis al la alvoko kontribui por la instalo de la nova domo de U.E.A. Kun grandega ĝojo ni akceptis jam du donacojn de po 5000 gld. por resp. Kanada Cambro de S-ro D. C.Henderson kaj Hamburga Cambro de S-ro F. Epstein. Krome alvenis multaj donacoj de minimume 50.— gld. por enskribo en la Ora Libro de la domo.

La aliaj fondaĵoj de la Asocio, nome por la Universala Ekspozicio kaj por la Oficeja Ilaro, ne ĝuas tre grandan atenton de la membroj.

III. ADMINISTRADO

A. CENTRA OFICEJO

(1) **Oficistoj:** Pro la ŝanĝo en la sistemo de kongresorganizado akceptita en Harrogate, laŭ kiu la Konstanta Kongresa Sekretario estas oficisto de la C.O., kaj pro la nomigo de S-ro G. Pompilio, kiu jam 4 jarojn deĵoris en la C.O., kiel K.K.S., pluraj internaj ŝanĝoj estis necesaj. Ĉar ankaŭ en Nederlando oficistoj estas ege malfacile troveblaj, daŭris sufiĉe longe ĝis ĉio estis reorganizita kaj tio neeviteble kaŭzis stagnojn en la laboroj. Nun la situacio estas jene solvita: Nova juna oficistino, F-ro H. Kortmann, ekdeĵoris en novembro 1961. Ŝi helpas en plej diversaj laboroj kaj enkondukiĝas precipe en la libroservo. Nova sperta librotenisto, S-ro Anneveldt, ekdeĵoris meze de marto 1962, reorganizis kun S-ro Storm la tutan librotenanadon kaj nun plene okupiĝas pri la librotenadoj de la C.O. kaj de la kongreso, tiel ke la lasta povas glate funkcii ankaŭ dum la foresto de KKS pro veturo al la kongresurbo. Cetere, la antaŭa tajpistino forlasis nin kaj anstataŭe nun deĵoras F-ro P. Snoep, kiu en ege mallonga tempo enkondukiĝis kaj lernis uzi la lingvon laŭ la diktomaŝino. Ĉiuj aliaj geoficistoj restis kiel antaŭe.

(2) **Domo.** Kiel jam publikigita, la komisiono por serĉi novan domon, konsistanta el S-roj Woessink kaj Storm kaj F-ino Vermaas, en la somero 1961 sukcesis trovi ege taŭgan domon je tre bona pozicio en la centro de Rotterdam. Estis necese rapide decidi. En Londono, ĝuste antaŭ la U.K., estis aranĝitaj la lastaj formalajoj en kunligo kun la aĉeto kaj la 19-an de oktobro 1961 antaŭ notario en Rotterdam okazis la laŭleĝa transdono, tiel ke U.E.A. fariĝis posedanto de la domo kun ĝardeno je la adreso: Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam, ampleksanta 372 m². Ĝi enhavas 15 ĉambrojn kaj estas ekipita por centra hejtado je oleo.

La domo estas tre solida, sed ĝi estis malzorgata de la antaŭaj loĝantoj kaj multaj riparoj kaj plibonigoj estis necesaj. Pro tio nur je 16.3.62 la translokiĝo povis efektiviĝi.

(3) **Meblaro:** Por la stablo en la nova domo estis necese aĉeti pliajn officejajn meblojn, precipe skribotablojn kaj ŝtalajn bretarojn. Kelkajn objektojn ni ankaŭ transprenis de la antaŭaj posedantoj.

(4) **Maŝinoj:** Pro la pliampleksiĝo de la librotenado estis necese aĉeti librotenan maŝinon, kio signifis grandegan plibonigon. Krome estis aldonita elektra adicia maŝino, kiu ŝparigas multe da tempo kaj simpligas la laboron. Krome aldoniĝis en la C.O. la maŝinoj de la kongresa inventario. Kelkaj estis superflujaj kaj ilin ni vendis je favoraj kondiĉoj.

(5) **Membraro:** Laŭ la hodiaŭaj ciferoj (fine de marto 1962), la membraro ampleksis en 1961 en la diversaj kategorioj jenajn nombrojn: AM 23473, MJ 854, MA 5273, MS 485, Pat. 2, DM 418, HM 43, J-MJ 32, J-MA 170. Entute 30.750 membroj en 88 landoj, kompare kun 30.185 en 1960. Detala klarigo laŭlanda aperis en la marta numero 1962 de la revuo "Esperanto". La ciferoj tie menciitaj ne tute akordiĝas kun la ĉi supraj, ĉar post presigo de tiu numero la C.O. ankoraŭ ricevis kelkajn kotizojn pri 1961. Tiu ĉiujara malfruega anoncado de kotizoj estas bedaŭrinda fenomeno. Mencienda estas, ke ankaŭ en tiu ĉi jaro proksimume mil novaj individuaj membroj estis registritaj. Ke la nombro da individuaj membroj tamen

kreskis per nur kelkaj centoj, ŝuldiĝas al la fakto ke ĉ. mil malnovaj membroj ne renovigis sian membrecon. Parte kaŭzis tion la situacio en Jugoslavio, kie pro valutaj ŝanĝoj la kotizo laŭ enlanda tarifo multe altiĝis, kio perdis membrojn en tiu lando. La lastjara kotizaltigo perdis nur relative malgrandan nombron da membroj, sed restas ĉiam iu kategorio de personoj, kiu nur pro forgesemo, maldiligenteco aŭ nekompreneo pri la neceseco fortikiĝi la Asocion, malatentas la realiĝon. Ili ricevis plurfoje dum la jaro rememorigan cirkuleron, sed tio ne sukcesas reaktivigi ĉiujn.

(6) **Varba laboro.** Pluraj ĉefdelegitoj kaj perantoj energie streĉas sin por varbi pliajn membrojn en sia lando, sed estas pluraj aliaj, kiuj faras la perantan laboron nur pasive, nome, ili bonorde enkasigas, registras kaj transigas al la C.O. la kotizojn kiujn sendas la fidelaj membroj, sed ili malmulte aktive entreprenas por vekti la forgesemulojn aŭ trovi novulojn. La C.O. presigis novan varbilon-aligilon, kiu estas je dispozo de ĉiuj funkciuloj. Krome ĝi presigis skemon pri la strukturo de UEA kaj multobligis bazan artikolon-prelegon. Tiu materialo povas multe plifaciligi la varban laboron. Ĉiuj ĉefdelegitoj, perantoj kaj komitatanoj ricevis unu kompleton de tiu materialo.

(7) **Delegitoj:** En la fino de 1961 estis entute 3150 delegitoj en ĉiuj kategorioj (3049 en 1960). El ili estis 1415 delegitoj, 227 vic-delegitoj, 1460 fakdelegitoj kaj 48 junulardelegitoj. Ankaŭ rilate la varbadon de delegitoj validas tio kio estas dirita supre, nome ke ne ĉiuj ĉefdelegitoj same fervore prizorgas la aferon. Ofte en iuj landoj gravaj lokoj longe restas sen delegitoj aŭ apenaŭ havas fakdelegitojn, kvankam inter la loka esperantistaro tiaj funkciuloj sendube estus troveblaj. Grave estas, ke delegitiĝu nur personoj kiuj serioze intencas resti delegito kaj funkcii akurate dum almenaŭ la proksimaj jaroj, por ke restu validaj la informoj regule donataj en la Jarlibro kaj gazeto. Ankaŭ en la landoj kun malforta valuto oni komprenu ke, se unufoje estas aranĝita la kotizpago pere de amikoj en aliaj landoj, oni ne povas tuj delegitiĝi se ne ekzistas reala ŝanco ke la membreco

estos same aranĝebla en la sekvantaj kelkaj jaroj.

(8) **Jarlibro.** La unua kaj dua partoj de la Jarlibro 1961 enhavis resp. 496 kaj 192 paĝojn. Ili enhavis la kutiman materialon. En la Dua Parto aperis la Meteologia Terminaro verkita de S-ro Maurice Lewin. Kvankam antaŭ kelkaj jaroj la landaj asocioj tre insistis pri enpresigo de listo de grupoj en la Jarlibro, ili poste ne prizorgis ke tiu listo estu kompleta. Ĝi malkreskis de jaro al jaro kaj tiel donis tute eraran bildon pri la movado en diversaj landoj. Tial la Estraro decidis en la Jarlibro 1962 ne plu presigi tiun liston. Pri la reklamoj en kelkaj landoj oni tre aktive zorgas, ekz. en Francujo, Germanujo, Italujo, Nov-Zelando, sed en pluraj aliaj grandaj landoj kun multe da industrio kaj vigla turismo tamen preskaŭ tute mankas reklamoj.

(9) **Gazeto:** Kiel antaŭe nur la teknikan flankon prizorgas la C.O. kune kun la presejo. La kunlaborado estas tre kontentiga. Kelkfoje pro diversaj kaŭzoj iuj numeroj aperis kun iom da malfruigo, sed ĝenerale la revuo aperadas akurate. Estas ege dezirinde ankaŭ por la gazeto varbi pli da reklamoj.

(10) **Belarto:** Kiel aldonajo al la revuo en 1961 aperis la dua kajero de Belarto. Ankaŭ ĝi estis teknike realigita en Rotterdam. Ĝi ampleksas 68 paĝojn plus la kovrilo.

(11) **Libroservo:** Ĝi funkcias tre kontentige, sed ĝis nun mankis la eblecoj pli aktive vastigi ĝin per favoraj ofertoj, reklamado ktp. Bezonata estus por tio persono kun fakaj spertoj, kiu povus pli komerce organizi tiun branĉon de la Asocia aktiveco.

(12) **Eldona Fakto:** En oktobro 1961 aperis la dua numero de la kultura kajero "Belarto", redaktita de S-ro Auld. Vendoprezo 3,50 gld., por individuaj membroj 3.— gld. Eldonkvanto 3000.

La propraj eldonaĵoj, same kiel tiuj, en kiuj UEA fariĝis kuneldoninto (Sekretoj de la Marestaĵoj, Privilegia Vojo), regule vendiĝas.

En la nuna momento, marto 1962, la stato de ĉiuj eldo-

naĵoj estas jena: 1954 La Internacia Lingvo, Faktoj pri Esperanto (eldono de CED), ankoraŭ en stoko 48 ekz.; 1956 Vagado sub Palmoj, ankoraŭ en stoko 288 ekz.; 1957 Angla Antologio, ankoraŭ en stoko 1924 ekz., el kiuj 1000 nebinditaj; 1958 Belarto I, ankoraŭ en stoko 1477 ekz.; 1959 Gastronomia Terminaro, ankoraŭ en stoko 854 ekz. (aperis en Jarlibro 1958); 1960 Teknika Terminaro pri ŝoseoj, ankoraŭ en stoko 296 ekz. (aperis en Jarlibro 1959); 1960 Memolibro pri la Zamenhof-Jaro (eldono de CED), ankoraŭ en stoko 1033 ekz.; 1961 Belarto II, ankoraŭ en stoko 2352 ekz.

En la Jarlibro 1961 aperis la Meteologia Terminaro. Ankaŭ ĝi aperos kiel aparta libreto.

UEA konsiderinde finance helpis al la eldono de la Dana Antologio, antaŭaĉetante 300 ekzemplerojn de tiu verko.

Same ĝi helpas la eldonon de la dua verko en la serio Oriento-Okcidento, kolekto de Japanaj noveloj. Decidite estas mem eldoni la trian verkon en tiu serio, Naŭzo de J. P. Sartre.

En 1961 aperis la tria eldono de la Seslingva Flugfolio de UEA. Anstataŭ la svedan kaj polan, ĝi nun enhavas la rusan kaj japanan lingvojn krom la angla, franca, germana kaj hispana. Eldonkvanto 25.000.

Krome UEA eldonis en la samaj lingvoj flugfoliojn por Universitatanoj, en kunlaboro kun la studenta asocio STELO. Ĝi enhavas la subskribojn de 50 universitataj profesoroj el 20 landoj. Eldonkvanto 30.000.

(13) **Internaciaj Konkursoj.** Grava fakto estas, ke eĉ trian sinsekvantan fojon venkis Japanujo, la lando kiu invitis la U.K. por 1965. En la dua konkurso venkis Nov-Zelando. Rimarkinde estas ke ambaŭ venkintoj estas landoj ege malproksimaj de la centro de la movado, kie malgraŭ tio estas vigla movado kaj energiaj varbantoj.

(14) **Orienteŭropaj landoj.** Kiel antaŭvidite lastjare, efektive Jugoslavio sukcesis ricevi permeson transigi la kotizojn pere de oficialaj gazetagentoj. La kurzo kiun kalkulas tiuj agentejoj bedaŭrinde fortimigis plurajn membrojn en tiu lando.

Pollando havas la eblecon pagi per banko por limigita

nombro da membroj, sed bedaŭrinde tio estas farata kun tiel grandega prokrasto, ke la pagoj postrestas nun jam plenan jaron.

El aliaj landoj kun malforta valuto ankoraŭ ne eblas normale transigi monon, kio signifas grandan stagnon de la movado en tiuj landoj. Estas necese ke la kompetentaj esperantistaj instancoj en tiuj landoj pli energie agu ĉe la koncernaj aŭtoritatoj por ricevi pagpermeson.

Ke en la pasinta jaro tamen konsiderinde altiĝis la nombro da individuaj membroj en orienteŭropaj landoj, tio ŝuldiĝas al la malavara kontribuado el okcidento al la Fondaĵo Prof. Canuto, fondita post la forpaso de la prezidanto de UEA kun la speciala celo membrigi esperantistojn en landoj sen libera valuto, laŭ la iniciato de la ĝenerala sekretario.

Generale: La kotizaltigo de 20% enkondukita en 1961 multe helpis al ekvilibro de la Asociaj spezoj, sed ĝi neniel sufiĉas por daŭre kovri la altiĝantajn elspezojn. Tiujn elspezojn ne kaŭzas neekonomia mastrumado, sed ĉiam pliampleksiĝantaj agadoj sur plej diversaj kampoj. Tial restas necesege konsiderinde altigi la membronombron kaj fari ĉion por konservi la malnovajn membrojn.

B. SERVA CENTRO

Kiel lastjare raportite, reprezentis ĝin en Svislando provizore Mag. Bruno Keppeler. Dum la Kongreso en Harrogate la Estraro nomis kiel novan administranton de la Serva Centro S-ron J. J. Sturzenegger, Rothstrasse 7, Zürich 57.

Intertempe restas Mag. Keppeler aganta en Genevo en la nomo de UEA por havigi la posedaĵojn de la Asocio, nome la restantaj obligaciojn kaj materialojn trovigantajn en Palais Wilson kaj en la hejmo de S-ro Jakob. La afero daŭras, ĉar evidente la svisa juro funkcias eksterordinare malrapide.

IV. FINANCOJ

(1) **Generalaj rimarkoj:** Kiam prezoj kaj kostoj plialtiĝas, en ĉiu unuigo leviĝas la demando pri plialtigo de la kotizoj. La Komitato de U.E.A. devis fari decidon

tiurilate dum la Kongreso en Bruselo kaj ĝi akceptis la proponon plialtigi la kotizojn per 20%, per ĉiuj voĉoj kontraŭ du kaj tri sindetenoj. En Bruselo jam estis klare, ke la jaro 1960 donos malprofiton kaj tiel okazis. Nun finiĝis la unua jaro kun la plialtigataj kotizoj (15.— guld. por MA). Ĉu la individuaj membroj restis aŭ ekŝiĝis? Ni povas diri, ke la anoj restis fidelaj; supozeble ili bone komprenis la neceson de la plialtigo.

La nombro de la individuaj membroj en 1961 kreskis de 7187 al 7268 (vidu la statistikon en "Esperanto" de marto 1961 kaj 1962). Oni devas aldoni, ke inter la 7268 estas 287 el la Fondaĵo Prof. Canuto. Tiuj lastaj certe volonte restos membroj, ili kaj aliaj faru ĉiam sian eblon por ke ilia landa registraro permesu la sendon de la kotizoj al la C.O. en Rotterdam.

Kiam oni komparas la MA-kotizon de U.E.A. kun tiuj de aliaj internaciaj organizaĵoj, ĝi estas malaltega kaj por ĝi oni ricevas: ĉiumonate 24-paĝan revuon, jarlibron en du partoj kun proks. 700 paĝoj, ĉiujn deziratajn servojn de la C.O. kaj de la delegitoj en 63 landoj, malpli-altigon de la kongresa kotizo.

Supozebe neniu alia internacia unuigo donas tiom multe por tiel malalta kotizo, tute certe ne, se ĝi ne ricevas ŝtatan subvencion. Ekzemple, la minimuma kotizo por la membroj de la Institucio pri Eŭropa Kulturo estas 100.— guldenoj. La nura kaŭzo pro kiu U.E.A. povas fari tiom multe per malmultaj enspezoj, estas la senpaga laboro de nombro da esperantistoj en la tuta mondo. Oni ne forgesu esti ĉiam dankemaj al ili. Grava tasko estas aligi pliajn esperantistojn al U.E.A. Ju pli da membroj, des pli U.E.A. povas doni, ĉar la kostoj de la revuo kaj jarlibro ne tiel multe kreskas kiam estos presitaj 1000 pliaj ekzempleroj.

(2) **Kontoj:** La kostoj de la ĝenerala mastrumado de la Asocio en 1961 povis esti kovritaj per la enspezoj kaj restis malgrandeta profito de 604,04 gld.

La enspezoj el kotizoj, inkluzive 3660.— guldenojn el Fondaĵo Prof. Canuto, estis iom pli ol 100.000.— guldenoj, kompare kun 82.250.— guldenoj en 1960.

La aliaj enspezoj, apud tiuj el kotizoj, estas nur malgrandaj, proks. 20%.

La plej grandaj elspezoj ĉiam estas kaj restas tiuj por la preskostoj de la revuo kaj jarlibro, poste tiuj por la salajroj de la direktorino, geoficistoj de la C.O., inkluzive ankaŭ de la KKS.

(3) **Libroservo** : Kvankam ni ne povas esti malkontentaj pri la librovendado, tamen la profito estis malpli alta ol en 1960. Oni povas esperi, ke tiu trarompo de la ĉiujara kresko okazas nur por tiu ĉi fojo. Nun en 1962 post la transloĝigo al la nova domo la libroservo povas esti pli bone prizorgata, ĉar nun estas pli taŭga loko ol antaŭe estis en tiu ĉambreto, kie apenaŭ estis loko por unu homo kaj parto de la librostoko.

(4) **Kongreso** : Bedaŭrinde ankaŭ la enspezo el la Kongreso estis nur malgranda. Ĝi ĉiam grandparte dependas de la nombro de la kongresanoj. Estas klare ke la diversaj elspezoj por la Kongreso, inkluzive la salajron de la KKS, estis pli altaj ol la sumo de 6559,07 guldenoj.

(5) **Aliaj enspezoj** : Ili de jaro al jaro diferenciĝas. En ili estas enkalkulitaj la taksitaj rektaj kostoj por la DM. Tiu sumo estas metita inter la enspezojn, ĉar la tuta sumo pagita de nova DM ĉiam rekte iras al la Kapitala konto (laborkapitalo).

(6) **Domo** : Post multaj jaroj, nun denove, la propra domo de U.E.A. estas en la bilanco. La elspezoj por la domo, ĝis la 31-a de decembro 1961, inkluzive de la kromkostoj de 7400,50 guld., estis 116.138,83 guldenoj. Tiu sumo estis pagita el la hipoteke (55.000.— guld.), el la mono de Abbey National Building kaj per mono el la Garantia Fondaĵo, post vendo de la obligacioj en Kanadaj dolaroj (bedaŭrinde kun kurzperdo).

(7) **Fondaĵoj** : Ek de nun la mono de la Garantia Fondaĵo ankaŭ estas en la bilanco de la C.O. kaj ne plu en aparta bilanco. Dum multaj jaroj kaj ĝis fino de 1961, la antaŭa prezidanto, S-ro Malmgren, akurate administris kaj prizorgis tiun fondaĵon kaj nun estis eble uzi la monon por la domo. Ankaŭ tie ĉi estas loko por vortoj de danko al S-ro Malmgren pro lia laboro. La Eldona Fondaĵo ĉi-jare malkreskis (antaŭe ĝi ĉiam nur kreskis)

pro la fakto, ke el ĝi estis pagitaj la kostoj de la Meteorologia Terminaro. La Propaganda Konto ankaŭ malkreskis. Unue montriĝis, ke la antaŭaj kongresoj fine donis malpli altan profiton ol supozite. Krome, la elspezoj por A.P.O., I.A.T., C.E.D. kaj informaj celoj estis multe pli altaj ol la enspezoj el la licencpago de la Kongreso. Aliflanke estas ebleco ke ankoraŭ alvenos iu sumo el la Kongreso en Harrogate. Tiu sumo ne estas ankoraŭ konata kaj tial ĝi ne estas enkalkulita.

La Fondaĵo Hodler restis preskaŭ sama. La Fondaĵo Domo kreskis jam en 1961 per la bela donaco de S-ino D. C. Dorothy Henderson en King (Kanado), de 5000.— guldenoj por Kanada Cambio en la nova domo (la aliaj donacoj venis en 1962).

(8) **Laborkapitalo de la C.O.** Malgraŭ la malkresko de kelkaj fondaĵoj, oni povas kun gojo konstati ke, same kiel la Fondaĵo Domo, ankaŭ la laborkapitalo kreskis. Tio okazis dank'al la fakto ke en 1961 envenis la sumo de 11.156,25 gld. por kotizoj de novaj DM (dumvivaj membroj). Je la fino de 1961 U.E.A. havis 418 DM.

V. GAZETO

(1) **Redaktoro** : Ekde la januara numero 1961 la redaktoro denove estis s-ro William Auld, kiu transprenis tiun taskon de la malsaniĝinta s-ino Zacho. La transiro okazis glate, kaj la revuo regule aperadis en la komenco de ĉiu monato.

(2) **Formato kaj aspekto** : En 1961 la formato restis kiel antaŭe. La kovrilpaĝo konsistis el reproduktajo de foto, kiu koncernis la enhavon de la gazeto, kaj estis tutpaĝa krom mallarĝa blanka rando dekstre kaj malsupre. Tiu kovrilo tamen ne ricevis ĉies aprobon, kaj estis decidite reiri en 1962 al la antaŭa, tutpaĝa foto.

(3) **Amplekso kaj enhavo** : Dum 1961 la revuo havis po 20 paĝoj, krom la decembra numero, kiu havis 24 paĝojn. Dum la jaro aperis 11 numeroj, do sume 224 paĝoj (kvar pli ol en la pasinta jaro), al kiuj aldoniĝis 44 kovrilpaĝoj. Do ĉiu abonanto ricevis dum la jaro revuon kun sume 268 grandformataj paĝoj. El vidpunkto de la enhavo,

la publikigita materialo estis: 31 paĝoj da artikoloj, 20 paĝoj da diversaj informoj, 43½ paĝoj da oficialaj informoj, 25 paĝoj da raportoj pri la U.K., 31½ paĝoj da literaturo kaj arto, 16½ paĝoj da recenzoj, 18½ paĝoj por la rubriko "Tra la mondo", 8½ paĝoj da oficialaj informoj pri la U.K., 8½ paĝoj da informoj de CED, 8 paĝoj de la rubriko "La Juna Vivo", 5 paĝoj de "Radio" kaj "Radio-Babiloj", 3 paĝoj de la Ŝaka Rubriko, kaj 5 paĝoj de la rubriko "Nia Forumo".

Dum la jaro aperis ankaŭ dua numero de "Belarto", la libervola suplemento al la revuo. Ĝi enhavas 68 paĝojn plus 4 paĝoj de kovrilo, en la sama formato kiel la revuo.

(4) **Presejo**: Kiel antaŭe la firmao Zwagers presas la revuon kaj tre fidinde kunlaboras por ke ĝi estu el teĥnika vidpunkto kiel eble plej perfekta. La materialoj estas sendataj al la presejo tra la C.O., kiu ankaŭ pri-zorgas la korektadon de la dua presprovaĵo.

VI. KONGRESOJ

(1) **U.K. Harrogate**: La 46-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazis en Harrogate de la 5-a ĝis la 12-a de aŭgusto 1961, estas karakterizita de la Unua Internacia Arta Festivalo.

En ĝia kadro estis prezentitaj, por la unua fojo en Esperanto, "Adv. Patleno" triakta teatraĵo de nekonata mezepoka franca aŭtoro, "La homa voĉo" de Jean Cocteau kaj "La respektemo p..." de J. P. Sartre. Krome estis prezentitaj unuakta japana dramo el la Tokugawa epoko "Okuni kaj Gohel"; jugoslavaj folkloraj dancoj kaj kantoj el la Mediteraneaj landoj. En la kadro de la Festivalo okazis ankaŭ internaciaj konkursoj pri afiŝoj kaj pri fotoj, filmprezentadoj (inter kiuj la filmo pri la vivo de D-ro Zamenhof "Stelo super Varsovio"), ekspozicio de la itala pentristo Lo Martire, la kutimaj Belarta kaj Oratora Konkursoj (ĉi tiun lastan gajnis Humphry Tonkin, Britujo, kiu ricevis la pokalon "Ivo Lapenna") kaj konkurso pri magnetofonaj bendoj.

Dum la U.K. okazis du ĝeneralaj kunvenoj de U.E.A. La temo de la unua kunsido, kiun prezidis Prof. Yagi, estis: "La lastjaraj atingoj de la Esperanto-Movado laŭ

landoj kaj fakoj". La dua ĝenerala kunveno, sub la prezido de la Aganta Prezidanto de U.E.A., S-ro Holmes, pritraktis la Estraran Raporton.

Okazis grava kunveno de la reprezentantoj de la Informaj Fakoj kaj alia de la komisiitoj por la Lerneja Kampanjo.

La prelegoj de la ĉijara Internacia Somera Universitato rilatis al la Arta Festivalo.

Dudekdu fakaj kunvenoj okazis en la kadro de la U.K., i.a. de sciencistoj, juristoj, instruistoj, kuracistoj, arkitektoj, ĵurnalistoj, geografoj, fervojistoj, studentoj, rotarianoj, skoltaj, protestantoj, katolikoj, mond-federalistoj k.t.p.

Bone sukcesis la Junulara Vespero, kiun partoprenis 150 gejunuloj el 15 landoj.

La tuta kongresanaro estis akceptita de la Urbestro de Harrogate, Konsilanto Frank Allum.

Preskaŭ 300 personoj partoprenis la Oficialan Bankedon.

La Kongresa Gazetara Servo, sub sperta gvidado de S-ro Marinko Ĝivoje, funkciis gratulinde akurate, tiel ke jam je la kongresfina sabato posttagmeze la lasta bulteno estis aperinta kaj la bultenaro, ampleksanta 53 paĝojn, estis dissendita tra la mondo. La gvidantoj de apartaj branĉoj estis S-roj D. Bloxham kaj G. E. Money.

Pri la 46-a U.K. okazis du televidaj elsendoj! La unua estis intervjuo kun la Ĝenerala Sekretario de U.E.A. kaj Estraranoj pri Kongresoj, Prof. Ivo Lapenna, en unu el la plej multrigardataj programoj de B.B.C. La alia okazis merkredon, kiam estis elsendita la komenca parto de la Oratora Konkurso.

Honora Protektanto de la 46-a Universala Kongreso estis Lordo Boyd Orr, Nobel-Pacpremiito.

Prezidis la Kongreson Prof. Hideo Yagi, Japanujo, Vic-Prezidanto de U.E.A.

Prezidanto de L.K.K. estis S-ro R. W. Hamilton kaj kiel Konstanta Kongresa Sekretario funkciis S-ro G. C. Fighiera.

Aliĝis 1660 personoj el 34 landoj.

La Kongresa Libro kun aldono havis 112 paĝojn.

Aranĝoj en kunligo kun la 46-a U.K.:

Bonan sukceson, kiel kutime, havis la tradicia Cseh-

Seminario, persone gvidata de S-ro Cseh. Ĝi okazis dum la kongresa semajno.

Oficiala Antaŭkongreso kaj Seminario "Oriento-Okcidento" okazis en Londono de la 2-a ĝis la 4-a de aŭgusto.

La 17-a Kongreso de T.E.J.O. okazis en Wokingham; partoprenis ĝin 101 personoj el 13 landoj. Pri la 17-a I.J.K. estas eldonita broŝuro en la angla lingvo por uzo de C.E.D.

La 6-an Internacian Infanan Kongreseton partoprenis 36 infanoj el 9 landoj.

En la kadro de la 46-a U.K. okazis ankaŭ la 31-a Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj. Ĝin partoprenis ĉ. 50 personoj el 11 landoj. La 31-a I.K.B.E. traktis diversajn temojn i.a.: Readaptigo de la ĵusblindiĝintoj; Blinduloj en industrio kaj komerco; Edukado de la blinda infano kun mens-aŭ alia korpdifekto.

(2) **U.K. Kopenhago**: La 47-a U.K. en Kopenhago okazos de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto 1962 sub la Alta Protektado de la Dana Ĉefministro Viggo Kampmann. Prezidanto de L.K.K. estas D-ro P. Neergaard. Kiel Konstanta Kongresa Sekretario funkcias la unuan fojon S-ro G. G. Pompilio. En ĝia kadro okazos la Unua Internacia Konferenco de Sciencistoj-Esperantistoj.

Detalaj raportoj aperos en la septembra kaj oktobra numeroj de "Esperanto".

(3) **U.K. 1963**: La Estraro de U.E.A. decidis akcepti la inviton, kiun la Bulgara Esperantista Asocio faris, ke la 48-a Universala Kongreso de Esperanto okazu en Sofio.

(4) **U.K. Tokio**: La elektita Loka Kongresa Komitato estas jam laboranta por la preparo de la 50-a Universala Kongreso en Tokio.

Por faciligi la ŝparadon de la mono necesa por la vojaĝo al Japanujo, speciale el eŭropaj landoj, UEA stariĝas apartan ŝparkonton kun favora rentumo.

UEA estas ankaŭ plananta internacian karavanon al Tokio per aviadilo.

Informoj aperas de tempo al tempo en "Esperanto".

VII. EKSTERAJ RILATOJ

A. UNESKO

(1) **Konsultaj rilatoj**: Kiel anoncote en la pasintjara

Raporto, ĉiuj organizaĵoj, kiuj pli frue havis konsultajn rilatojn kun UNESKO, estis dividitaj je tri kategorioj: A, B kaj C. Nur tre limigita nombro da organizaĵoj, ĉefe tiuj kun duonŝtata karaktero aŭ fonditaj de UNESKO mem, eniris en la kategorion A. La plej gravaj internaciaj privataj organizaĵoj troviĝas nun en la kategorio B, dum la malpli gravaj estas en la kategorio C. La grandega plimulto de internaciaj organizaĵoj troviĝas entute ekster kategorio. Dank' al la efika kunlaborado de UEA kun UNESKO ekde 1954, la Plenuma Komitato de UNESKO proponis al la Estraro de UEA la kategorion B, kaj la Estraro akceptis la proponon. Konforme al la novaj direktivoj, la organizaĵoj en kategorio B (informaj kaj konsultaj rilatoj) ricevas ĉiujn dokumentojn de UNESKO, devas esti konsultitaj rilate la Programon de UNESKO; povas esti invitataj partopreni pere de siaj observantoj en la laboroj de diversaj kunvenoj organizitaj de UNESKO; devas esti invitataj partopreni en la konferencoj de neregistaraj organizaĵoj; povas ricevi subvenciojn por siaj publikaĵoj kaj konferencoj; devas esti invitataj sendi observantojn al la Generalaj Konferencoj de UNESKO kaj iliaj komisionoj. Tiuj organizaĵoj havas ankaŭ aliajn rajtojn, sed same tiel adekvatajn devojn. Ekzemple, ili devas, laŭ la peto de la Ĝenerala Direktoro, doni siajn konsilon kaj helpon en ligo kun diversaj enketoj kaj studoj de UNESKO; kontribui al la realigo de la programo de UNESKO; inviti la reprezentantojn de UNESKO partopreni en la laboroj de kongresoj kaj konferencoj de siaj organizaĵoj; raportoj de tempo al tempo al la Ĝenerala Direktoro pri sia agado. La nova pozicio de UEA estas tre kontentiga kaj ĝi montras ankoraŭfoje, ke la laboro de la Asocio estas aprezata de la kompetentaj instancoj de UNESKO.

(2) **Partopreno en la konferencoj de NRO**: Ankaŭ en la pasinta laborperiodo okazis pluraj konferencoj de neregistaraj organizaĵoj en konsultaj rilatoj kun UNESKO. S-ro Thierry estis la reprezentanto de la Asocio en ĉiuj ĉi konferencoj kaj kunsidoj de diversaj t.n. laborgrupoj kaj laboraj subgrupoj. La Oka Konferenco de NRO (nur kategorioj A kaj B) okazos de la 14-a ĝis la 18-a de majo kaj, se iel eble, la ĝenerala sekretario, kiu estas ŝargita

pri ĉiuj eksteraj rilatoj, partoprenos tiun Konferencon kune kun s-ro Thierry.

(3) **Programo de UNESKO** : Trastudinte la programon por la jaroj 1961/62, la Estraro decidis dediĉi specialan atenton al la Granda Projekto pri la Reciproka Aprezado de la Orientaj kaj Okcidentaj Kulturaj Valoroj, kiel ankaŭ al la rezolucioj 5.201 kaj 5.202 koncerne la informadon de la publiko kaj la antaŭenigon de la Internacia kompreniĝo. Pri tio la ĝenerala sekretario informis la Direktoron de UNESKO per la letero de la 15-a de aprilo 1961. Per la letero de la 14-a de januaro 1962 la ĝenerala sekretario sendis al la Sekretariato de UNESKO detalan raporton pri la agado de la Asocio por la realigo de la menciita Granda Projekto.

(4) **Seminario Oriento-Okcidento** : Tiu ĉi Seminario, organizita de s-ro N. R. Smith sub aŭspicioj de UEA kaj okazinta de la 2-a ĝis la 4-a de aŭgusto 1961 en Londono sukcesis tre bone. Partoprenis 60 personoj el 15 landoj. Prelegis s-ro A. C. Barnes, B.A., specialisto pri orientaj lingvoj; Prof. D-ro I. Lapenna; D-ro Rokuro Makabe el Japanujo, nun en la Universitato de Frankfurt; D-ro P. Neergaard, antaŭe profesoro en la Amerika Universitato de Beirut; Docento S. Pragano, lektoro en la Universitato de Amsterdam; s-ro V. Sadler, B.A. el Londono; Lic. T. Sekelj; s-ro N. R. Smith, lektoro en la Hendon Teknika Kolegio en Londono; s-ro S. Torihara, japana artisto studanta en Parizo; Prof. D-ro Hideo Yagi, rektoro de la Universitato en Okayama. Detala raporto pri la seminario estis sendita al UNESKO. La raporto aperis ankaŭ kiel dokumento de CED I/III/7. La Sekretariato de UNESKO esprimis sian altan aprezon pro tiu elstara aranĝo.

(5) **Seminario Frostavallen** : Post la Kongreso en Kopenhago okazos en Frostavallen UNESKO-semajno de la 12-a ĝis 19-a de aŭgusto. La semajnon organizas Sveda Esperanto-Instituto kun la financa helpo de la Sveda Registaro. La organizon prizorgas s-ro Jan Strönné. La preparlaboroj kontentige progresas kaj oni povas atendi plian elstaran aranĝon, kiu ne nur riĉigos la Esperant-

lingvan kulturon, sed ankaŭ ankoraŭ pli fortikigos la rilatojn de UEA kun UNESKO.

(6) **Serio Oriento-Okcidento** : Du pliaj verkoj baldaŭ aperos (vidu la p-ton 12 de la ĉap. III.)

(7) **Junularo kaj Paco** : UNESKO preparis por la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de U.N. projekton de raporto pri la Rimedoj por Antaŭenigi inter la Junularo la Idealojn de Paco, Reciproka Respektado kaj Kompreniĝo inter la Popoloj. Laŭ la peto de la Ĝenerala Direktoro, la ĝenerala sekretario de UEA sendis al la Sekretariato de UNESKO tre ampleksan komenton, en kiu estis aparte akcentita la rolo de la Internacia Lingvo sur tiu kampo. La Ĝenerala Direktoro, konfirmante la ricevon, akcentis, ke "tiuj ĉi komentoj estos treege helpaj en la preparado de la fina raporto, kiu estos prezentita al la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de U.N. kaj al la Ĝenerala Konferenco de UNESKO okaze de ĝia 12-a Sesio".

(8) **UNESKO-broŝuro en Esperanto** : Post traktado kun la Sekretariato de UNESKO, la Estraro decidis publikigi en Esperanto la broŝuron "Oriento kaj Okcidento — Al Reciproka Kompreniĝo" de Georges Fradien. La verko estos publikigita en 5.000 ekzempleroj. UNESKO subvencios la eldonon per 400 U.S. dolaroj.

(9) **Index Translationum** : CED liveris materialojn pri la Esperanto tradukoj al la redakcio de tiu publikaĵo

(10) **UNESKO-afiŝoj** : Restas ankoraŭ kelkaj ekzempleroj de la afiŝo-serioj, kiujn eldonis UNESKO en la Internacia Lingvo. Tiajn publikaĵojn oni devus tre vaste utiligi. La afiŝoj estas haveblaj senpage de la C.O. de UEA (nur kompenso de la poŝtelspezoj estas postulata).

(11) **UNESKO-Novaĵoj** : Aperis 4 pliaj numeroj de tiu bulteno, kiun redaktas s-ro E. Ockey. La Esperanta gazeto utiligas tiun servon kaj multaj informoj estis publikigitaj ankaŭ en la lasta laborperiodo. Entute ĝis nun aperis 23 numeroj de la bulteno.

B. UNUIGINTAJ NACIOJ

(1) **Konsultaj Rilatoj**: Rezulte de la konsultaj rilatoj kun UNESKO UEA plue konservas la konsultajn rilatojn kun la Ekonomia kaj Socia Konsilantaro de U.N. En pluraj okazoj la ĝenerala sekretario esprimis la starpunkton de UEA al la Sekretariato de U.N.

(2) **Datrevenoj**: Laŭ la antaŭaj sugestoj de la Estraro, pluraj landaj asocioj kaj lokaj grupoj memorigis la Tagon de U.N. kaj la Universalan Deklaracion de la Homaj Rajtoj. Bedaŭrinde ne ĉiuj tion faris kaj sekve ankaŭ la efiko ne estas tia, kia ĝi povus esti. Se efektive la landaj asocioj kaj lokaj grupoj — ĉiuj senescepte — memorigis tiajn eventojn kaj sendus al U.N. kaj UNESKO aŭ telegramon aŭ mallongan leteran esprimon de simpatio, centoj da tiaj korespondadoj atingus la du organizaĵojn kaj tio ankoraŭ plibonigus la rilatojn de UEA kun U.N. kaj UNESKO. La Estraro varme rekomendas al la landaj asocioj kaj lokaj grupoj agi en la estonteco konforme al tiu sugesto.

C. EŬROPA LINGVO-KAMPANJO

(1) **Eŭropa Konsilantaro**: En 1961 montriĝis, ke la Kulturkomisio de la Konsulta Asembleo ne intencas okupiĝi pri la propono formi specialan komisionon por la studado de la lingvo-problemo. Pere de sia sekretario, la Prezidanto de la Kulturkomisio sciigis D-ro W. Herrmann, la komisiito de UEA por tiu agado, ke la lingvoproblemo estos en la estonteco traktata sur la nivelo de ekspertoj, sed tio efektive ne okazis. Intertempe formiĝis en la seno de la E.K. speciala "Konsilantaro por Kultura Kunlaboro". La tasko de tiu nova organizaĵo estas harmoniigi la klopodojn sur la kultura kampo. La KKK konsistas el reprezentantoj de registaroj, de membroj de la Kulturkomisio kaj de reprezentantoj de la Eŭropa Kulturfondaĵo en Amsterdam (Fondation Européenne de Culture). La KKK estis formita la 10-an de januaro 1962 kaj nia komisiito sendis tiuokaze saluttelegramon.

(2) **Konferencoj de la Eŭropaj Ministroj de Edukado**: La Ministroj de Edukado de la ŝtatoj, kiuj subskribis la

Eŭropan Kulturkonvencion (ĉiuj membroj de la Eŭropa Konsilantaro kaj Hispanujo) kunvenas de tempo al tempo por pritrakti problemojn de edukado. La lasta (2-a) Konferenco okazis en aprilo 1961 en Hamburgo. Interalie ĝi ankaŭ pritraktis la "enkondukon de fremdaj lingvoj en ĉiujn lernejojn". D-ro Herrmann sendis al la Konferenco, pere de ĝia Prezidanto, Memorandon pri la temo. Parto de la landaj asocioj en la koncernaj ŝtatoj subtenis tiun paŝon sendante aŭ persone prezentante la Memorandon al siaj respektivaj edukministroj. Tamen, la Konferenco ne atentis la Memorandon, laŭdire pro tempomanko kaj ankaŭ tial, ĉar kvazaŭe la sugestoj venis tro malfrue. Laŭ la Rezolucio de la Konferenco, unuavice ĉiuj instruistoj devus lerni unu fremdan lingvon, sed la Konferenco ne havis la kuraĝon definitive rekomendi kiun ajn nacian lingvon por la deviga instruado. La komentoj en la gazetaro montras, ke tio estis farita intence, ĉar la politika situacio ne permesas nek permesos tian favoradon de unu sola nacia lingvo. Nun estas preparata la tria Konferenco, kiu okazos en Romo en aŭtuno 1962. Interkonsente kun la ĝenerala sekretario estas farita nova paŝo pri la sama temo. Nova Memorando pri "Studado de Fremdaj Lingvoj en la Lernejoj" estas verkita kaj sendita, pere de la landaj asocioj aŭ persone transdonita al la edukministroj de la koncernaj ŝtatoj. Krome, D-ro Herrmann prizorgis, ke la Memorando estu transdonita en la nomo de UEA al la Prezidanto de la Konferenco, la itala Ministro de Edukado. Necesas, ke ĉiuj landaj asocioj, kies ŝtatoj apartenas al la Kulturkonvencio, plue plej energie apogu tiun klopodon. Estos necese vaste diskonigi la Memorandon, aŭ almenaŭ ĝiajn ĉefajn ideojn, per ĉiuj eblaj rimedoj, tute speciale per la gazetaro kaj radio.

(3) **Interveno de s-ro Petit**: En la februara numero, 1962, de "Franca Esperantisto", sur p. 15 aperis jena informo: "S-ro Petit akceptigis Esperanton en la tagordo de la Eŭropa Konsilio. Li konsideras malprava la agadmanieron de D-ro Hermann kaj ne vidas ajnajn rezultojn el lia plurjara agado". Tiu informo ne estas ĝusta. Nek s-ro Petit, nek iu alia akceptigis Esperanton en la tagordo de la Eŭropa Konsilantaro. La Estraro unuanime

opinias, ke D-ro Herrmann tre konscience okupiĝis kaj plue okupiĝas pri la agado, pri kiu li estas komisiita de la Estraro. En ĉiu okazo, se io estas kritikinda en la laboro de la Estraro aŭ de unuopa estrarano, la kompetenta instanco por tio estas la Komitato de UEA, al kiu la Estraro respondecas.

D. ALIAJ RILATOJ

(1) **Unio de Internaciaj Asocioj**: La rilatoj kun UIA estas plue tre bonaj. La publikaĵoj de UIA regule enhavas informojn pri UEA, CED, U.K., diversaj internaciaj esperantistaj fakaj organizaĵoj. Siavice UEA daŭre liveras informojn al UIA, kiu estas ankaŭ unu el la regulaj ricevantoj de la CED-dokumentoj.

(2) **MFAUN**: Rezulte de la korespondado inter la ĝenerala sekretario de UEA kaj la ĝenerala sekretario de la Monda Federacio de Asocioj de Unuigintaj Nacioj, la du organizaĵoj decidis establi pli intiman kunlaboradon inter la landaj asocioj kaj lokaj grupoj de UEA kaj de MFAUN. Pri tio ĉiuj landaj asocioj estis informitaj en la cirkulero de la ĝenerala sekretario de la 20-a de marto 1962.

(3) **Aliaj organizaĵoj**: Kun ĉiuj internaciaj organizaĵoj en konsultaj rilatoj kun UNESKO, UEA havas daŭre kontaktojn, kiuj realiĝas ĉu okaze de diversaj konferencoj, ĉu skribe, ĉu per sendado de la bultenoj de la IGS kaj KGS, dokumentoj de CED, invitoj al la U.K. CED estas membro de ASLIB, nome asocio por specialigitaj bibliotekoj en Britujo. Unu el la gravaj mankoj estas, ke la diversaj esperantistaj fakaj kaj specialigitaj organizaĵoj, kun la escepto de nur kelkaj, ne kunlaboras pli efike, aŭ eĉ entute ne kunlaboras, kun la samfakaj aŭ samspecaj neesperantistaj organizaĵoj. La fakaj kaj specialigitaj Esperanto-asocioj devus dediĉi la plej grandan atenton al tiu demando kaj establi kiel eble plej baldaŭ konvenajn rilatojn kun la samspecaj internaciaj organizaĵoj.

VIII. INFORMADO

(1) **Landaj informaj fakoj**: Malgraŭ la multaj sugestoj,

konsiloj kaj atentigoj pri la neceso formi apartajn informajn fakojn, tamen multaj landaj asocioj ankoraŭ ne havas tian fakon, nek komisiiton, kio kaŭzas, ke la informado pri la Internacia Lingvo en tiuj landoj estas aŭ sur tre malalta nivelo aŭ eĉ forestas. Tial ankaŭ ofte okazas, ke unuopaj esperantistoj eĉ en landoj kun malnovaj landaj asocioj, turnas sin al la I.F. de UEA kun plej diversaj petoj, ekde urĝa havigo de materialoj por ekspozicioj ĝis verkado de artikoloj aŭ respondoj al misprezentoj de Esperanto en la nacilingva gazetaro. Se iel eble, la I.F. de UEA donis rekte helpon, sed en multaj kazoj ne estis eble tion fari, ĉar la ĝenerala sekretario, kiu estas ŝarĝita ankaŭ pri tiu branĉo de agado, tutsimple ne disponas pri tempo ankaŭ por plenumo de tiaj individuaj petoj. En la julia-aŭgusta numero de "Esperanto" denove aperis statistika trarigardo pri la laboro farita sur tiu ĉi kampo kaj ĉiu M.A. de UEA povos ankoraŭfoje konstati ĉu lia landa asocio havas informan fakon aŭ ne. Se jes, necesas ke en la estonteco la unuopaj esperantistoj turnu sin al la I.F. de sia lando; se ne, oni devas postuli ke tia I.F. estu fondita kiel eble plej baldaŭ konforme al la Principaro de Frostavallen. Ankaŭ la lokaj grupoj, tute speciale en pli grandaj urboj, devus havi siajn proprajn informajn fakojn kaj sufiĉan kvanton da disponebla informmaterialo.

(2) **Kunlaborantoj**: Fine de la laborjaro la I.F. de UEA havis entute 108 kunlaborantojn en 36 landoj. Ĉiuj kunlaborantoj, same kiel la I.F. de la landaj asocioj, la membroj de TEJA kaj la komitatanoj de UEA regule ricevis ĉiujn cirkulerojn kaj bultenojn.

(3) **TEJA**: La I.F. de UEA sendis ankaŭ en 1961/62 ĉiujn siajn publikaĵojn al 68 membroj de TEJA. Parto de la ricevintoj — bedaŭrinde ne ĉiuj — utilis la materiaĵojn por publikigo de informoj en siaj gazetoj.

(4) **IGS**: Aperis 11 pliaj bultenoj de la Internacia Gazetara Servo. Entute la IGS aperigis 123 bultenojn kun 509 informoj. La informojn de la IGS utilis la landaj I.F. kaj la kunlaborantoj por la nacilingva gazetaro. Ankaŭ kelkaj radiostacioj, precipe Varsovio, Romo, Zagreb,

pilio

(5) **Angla-Franca IGS**: Aperis 6 pliaj bultenoj de la angla kaj franca eldono de la IGS. La bulteno estas sendata al ĉ. 200 gazetoj kaj revuoj de diversaj landoj de Azio kaj Afriko, kiel ankaŭ al 74 presagentoj. La bultenon redaktas s-ro G. Pompilio. La anglan tradukon prizorgas s-ro E. Ockey kaj la francan f-ino ofte utiligis tiujn informojn. Redaktoro: S-ro G. Pom-S. Minault.

(6) **KGS**: Ankaŭ en Harrogate funkciis la KGS, kiu estas branĉo de la I.F. de UEA. Rezulte, nur en la brita gazetaro aperis ĉ. 150 artikoloj kaj informoj. Pri la aliaj rezultoj vidu VI/1. La I.F. de la landaj asocioj devus multe pli efike utiligi la KGS. Estus necese komisi unu aŭ plurajn personojn havigi ĉiutage la bultenon kaj, utiligante ĝiajn informojn, sendi tuj koncizajn sciigojn al la presagentejo kaj almenaŭ unu grava gazeto de la koncerna lando.

(7) **Agado en neesperantistaj kongresoj**: La 6-lingva flugfolio en la lingvoj angla, franca, germana, hispana, rusa kaj japana estas daŭre utiligata. Nova, ĝisdatigita eldono estas preparata kaj ĝi estos publikigita tuj post la elĉerpiĝo de la nuna, tria eldono.

(8) **Agado en universitatoj**: En kunlaboro kun STELO, UEA eldonis en la lingvoj angla, franca, germana, hispana, rusa kaj japana specialan flugfolion por universitatanoj. Ankaŭ tiu ĉi flugfolio, eldonita en 30.000 ekzempleroj, estas kontentige utiligata. Ĝi estas tre taŭga por agado en universitataj medioj kaj espereble ĝi estos tiucele ankoraŭ pli efike uzata en la estonteco.

(9) **Agado en Azio**: S-ino M. Haudebine senlace daŭrigis la instruadon de Esperanto en New Delhi. La kerno vastiĝis en la pasinta jaro. Ŝi sukcesis aperigi plurajn informojn pri Esperanto en la loka gazetaro. Ĉirkaŭ 600 gelnantoj aŭdis prelegojn pri la lingvo kaj unu ekspozicio altiris la atenton de la publiko. Estas plano, ke s-ino Haudebine, kiam ŝi finos sian laboron en Hindujo, veturu al Japanujo por instruadi la lingvon antaŭ la

U.K. en Tokio. — S-ro Simo Milojević, kiu agis tre efike en Nepalo, en decembro 1961 revenis en Eŭropon. En Nepalo li ricevis la permeson de la Edukministerio instrui Esperanton en kelkaj nepalaj lernejoj kaj kolegioj. Rezulte li gvidis, interalie, 8 kursojn en lernejoj. Unu kurso estis speciale por instruistoj. Li sukcesis fondi Esperanto-societon, kun nun funkcias en Kathmandu. Tiamaniere ankaŭ en Nepalo nun troviĝas kerno de la Internacia Lingvo. Detala raporto pri la agado de s-ro Milojević aperis en la aprila n-ro de "Esperanto". La Estraro ankaŭ ĉimaniere esprimas al s-ino Haudebine kaj al s-ro Milojević tutkoran dankon pro ilia sindona laboro kaj gratulon pro la atingitaj rezultoj en malfacilaj kondiĉoj.

(10) **Agado en Afriko**: Laŭ la decido farita en Harrogate, Lic. Tibor Sekelj verkis broŝuron sub la titolo "La Internacia Lingvo Esperanto — Komuna Lingvo por Afriko, Komuna Lingvo por la Mondo". La tekston oni unue diskutis en la Esperanta Studo-Klubo (Londono) kaj rezulte en ĝi estis faritaj, interkonsente kun la aŭtoro, kelkaj ŝanĝoj kaj kompletigoj. S-ro John Wells tradukis la tekston en la anglan kaj f-ino S. Minault en la francan. La angla eldono (5.000 ekzempleroj) estas nun presata kaj baldaŭ aperos. Post tio estos presita la franca eldono. Se iel eble, la I.F. de UEA eldonos la verketon ankaŭ en la araba kaj suahili. Tuj post la apero de la verketo, la I.F. de UEA disponigos kvanton al la "Karavano de Amikeco", kiun gvidas s-ro Sekelj tra Afriko. Necesos ankaŭ utiligi la broŝuron por la agado inter la afrikaj studentoj en diversaj universitatoj de Eŭropo. — Komence de 1962 la "Karavano de Amikeco" ekveturis el Beograd kaj komencis sian longan, dujaran vojaĝon. Tiu entrepreno estas organizita de s-ro Sekelj laŭ lia privata iniciato, do ĝi ne estas oficiala arango de UEA. Tamen, la oficiala lingvo de la Karavano estas Esperanto kaj tutcerte Lic. T. Sekelj kaj liaj kunlaborantoj faros utilan laboron favore al la Internacia Lingvo en la landoj de Afriko. La Estraro de UEA decidis doni al la Karavano, pere de s-ro Sekelj, subvencion de 200 anglaj pundoj por helpi lin en lia laboro. Raportoj aperados regule en "Esperanto".

(11) **Olimpiaj ludoj**: La Estraro komisiis Prof. Hideo Yagi organizi agadon okaze de la Olimpiaj ludoj en Tokio.

(12) **Afiŝo**: Ekspozicio de projektoj okazis dum la U.K. en Harrogate. La Estraro diskutis pri la eblecoj eldoni unu aŭ du afiŝojn, sed montriĝis, ke necesas konsulti ankaŭ la presiston. Krome, la opinioj, estis tre dividitaj rilate la plej taŭgan projekton. Okaze de la printempa kunsido la Estraro faros decidon.

(13) **Resumaj ciferoj pri informado**: Tabela trarigardo aperos en la julia-aŭgusta numero de "Esperanto". Ĉi tie estas donita nur la resumaj ciferoj kaj parenteze troviĝas, por komparo, la ciferoj por la jaro 1960:

Entute alvenis respondoj de 28 (30) landaj asocioj aŭ kunlaborantoj. En 1961 aperis entute 4476 (4.301) artikoloj kaj 9.902 (9.269) informoj pri Esperanto en la nacilingvaj gazetoj kaj revuoj. Okazis 1.124 (1.361) prelegoj pri Esperanto, kiujn ĉeestis 71.630 (93.980) personoj. Estis disaŭdigitaj 791 (669) nacilingvaj prelegoj aŭ prelegetoj per radio. Estis aranĝitaj 259 (288) ekspozicioj, kiujn vizitis 339.250 (421.550) personoj. Entute estis disdonitaj 448.190 (313.050) afiŝoj, flugfolioj, broŝuretoj kaj similaj propagandiloj. Generale la interesiĝo pri Esperanto kreskis.

(14) **Kunveno Harrogate**: La reprezentantoj de la landaj I.F. kunvenis en Harrogate la 9-an de aŭgusto. La kunveno faris kritikan analizon de la rezultoj atingitaj en 1960, diskutis la eventualan kompletigon de la Principaro de Frostavallen, rekomendis al ĉiuj landaj asocioj fondi I.F. kaj atentigis pri la neceso pli efike kaj pli vaste utiligi la U.K. por informado. La protokolo de la kunveno estis sendita al ĉiuj landaj asocioj, kunlaborantoj kaj komitatanoj.

(15) **Kunveno 1962**: Se iel eble, okazos kunveno de la reprezentantoj de I.F. aŭ en Kopenhago dum la U.K. aŭ, ankoraŭ pli konvene, en Frostavallen tuj post la Kongreso.

(16) **Cirkuleroj**: La I.F. de UEA rilatis kun la landaj

I.F. kaj la multnombraj kunlaborantoj ĉefe per cirkuleroj. Ĉar nun finiĝas la 3-jara periodo, estas oportune informi, ke ĝis la fino de marto la I.F. de UEA entute sendis 57 cirkulerojn rilatantajn nur al demandoj de informado.

IX. LERNEJOJ

(1) **Organizo**: Ĝi restis sama, kiel en la antaŭa jaro. La ĝenerala sekretario kun nombro da kunlaborantoj en diversaj landoj — entute 19 — daŭrigis la klopodojn rilate la subskribon de Interŝtata Konvencio por paralela kaj laŭgrada enkonduko de Esperanto en la lernejojn. S-ro E. Malmgren plue okupiĝis pri la agado "Esperanto kiel Baza kaj Komplementa Lingvo". En diversaj landoj unuopaj instruistoj, kiel en la antaŭaj jaroj, klopodis vastigi la instruadon de Esperanto en la lernejoj.

(2) **Kunveno Harrogate**: La 7-an de aŭgusto okazis en Harrogate kunveno de la komisiitoj por la lerneja kampanjo. Ĉeestis 25 personoj, reprezentantaj 12 landojn. La kunveno pritraktis la tiaman situacion sur tiu ĉi kampo kaj, laŭ la informoj donitaj de diversaj reprezentantoj, tute speciale de la reprezentantoj de Pollando kaj Jugoslavio, la kunveno faris plurajn decidojn pri plua agado. La polaj reprezentantoj informis, ke la Pola Registaro estas preta iniciati la traktadon por subskribo de Interŝtata Konvencio kaj ke oni planas sendi reprezentantojn al diversaj landoj kun la celo kontakti la ministrojn de edukado en interkonsento kun la koncernaj landaj asocioj. La reprezentanto de Jugoslavio akcentis, ke tiu lando estas principe preta por Interŝtata Konvencio, kondiĉe ke alia lando iniciatu la aferon kaj ke troviĝu kelkaj pliaj landoj pretaj aliĝi. En la diskuto montriĝis, ke en jenaj landoj ekzistas principaj eblecoj por eventuala aliĝi al tia Konvencio: Brazilo, Danlando, Finnlando, Islando, Novzelando, Svedujo, krome, kiel jam menciite, Pollando kaj Jugoslavio. La situacio, do, ŝajnis sufiĉe esperiga. Aliflanke, la reprezentanto de Jugoslavio deklaris ke tiu lando estas preta organizi konferencon de lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata. La kunveno aprobis tiun ideon kaj sugestis, ke estu organizitaj du paralelaj aranĝoj: unue, konferenco de instruistoj nun-

tempe instruantaj la lingvon en siaj lernejoj, por ke ili interŝanĝu siajn spertojn kaj diskutu pri fakaj temoj; due, renkontiĝo de infanoj lernintaj Esperanton, por ke ili ekuzu la lingvon en tia internacia renkontiĝo kaj interamikiĝu. La reprezentanto de Jugoslavio antaŭvidis, ke la du aranĝoj povos okazi en 1962. Pri la plua evoluo de tiu ĉi afero vidu la sekvantajn punktojn.

(3) **Interŝtata Konvencio** : Kiel vidiĝas, la plua progresado rilate tiun demandon dependis plene de la pola Lerneja Komisiono. Bedaŭrinde, pro grava malsaniĝo de Prof. D-rino Szablowska la tuta afero en Pollando haltis. La ĝenerala sekretario plurfoje skribis kaj al la prezidantino de la menciita Komisiono kaj al PEA, sed ne ricevis kontentigan respondon. Li havis ankaŭ apartan kunsidon kun s-ro Czuba el Varsovio la 25-an de januaro en Londono, sed ankaŭ tiu renkontiĝo ne ŝanĝis esence la situacion. Intertempe s-ro Sakellaropoulos, la komisiito por Grekujo, kune kun la prezidantino de la Helena Esperanto-Asocio kaj alia elstara esperantisto vizitis la grekan Ministron de Edukado, s-ron Kassimati, kiu deklaris, ke ankaŭ Grekujo estus principe preta subskribi tian Konvencion en difinitaj kondiĉoj. La Ministro volonte akceptis la proponon renovigi la cirkuleron, laŭ kiu Esperanto estis rekomendita al la lernejestroj kiel libervola studobjekto en la lernejoj. Ne estas eble en tiu ĉi Raporto prezenti ĉiujn detalojn rilate la demandon, sed tute koncize estas eble diri, ke principe ekzistas eblecoj por subskribo de Interŝtata Konvencio, sed necesus, ke troviĝu almenaŭ unu ŝtato, kiu iniciatus la traktadon sur diplomatia nivelo.

(4) **Internacia Konferenco en Jugoslavio** : Ankaŭ pri tiu demando la ĝenerala sekretario korespondis kun Jugoslavia Esperanto-Ligo, kies sidejo nun estas en Beograd. Same kiel PEA ne povis plenumi siajn promesojn el Harrogate, tiel same JEL tiel prokrastis la tutan aferon, ke la ĝenerala sekretario konsilis al JEL okazigi la kunvenon ne en julio de 1962, sed en julio de 1963. Konsiderante la fakton, ke la U.K. en 1963 okazos en Sofio, espereble la jugoslavaj kunlaborantoj plenumos sian promeson kaj okazigos la Konferencon en 1963 antaŭ la U.K. UEA,

kompreneble, povas doni efikan helpo kaj, pro la konsultaj rilatoj kun UNESKO, ĝi povos tute certe atingi moralan apogon kaj eble eĉ materialan subtenon fare de tiu organizaĵo, sed la organizon mem povas prizorgi nur JEL aŭ aparta komitato speciale ŝargita por tiu celo.

(5) **Eŭropaj Ministroj de Edukado** : Interkonsente kun la ĝenerala sekretario, D-ro Herrmann entreprenis paŝojn ĉe la eŭropaj Ministroj de Edukado (vidu detalojn en ĉap. VII, C. (2)).

(6) **Prelegoj en danaj porinstruistaj seminarioj** : Sub la aŭspicioj kaj je la kostoj de la Dana Ministerio de Edukado la ĝenerala sekretario faris inter la 18-a kaj 23-a de septembro 1961 prelegon pri "La Lingva Problemo en la Internaciaj Rilatoj kaj la Solvo, kiun Prezentas la Internacia Lingvo Esperanto" en 12 porinstruistaj seminarioj al pli ol 2.100 gestudentoj kaj 128 direktoroj kaj instruistoj. La prelegoj okazis en Esperanto kun traduko en la danan (s-ro Sven Ziegler tradukis tiel brile ke, senkonsidere al la enhavo, la traduko per si mem estis potenca pledo por la Internacia Lingvo). Post la prelegvojaĝo la ĝenerala sekretario kaj s-ro Ziegler vizitis la 25-an de septembro la danan Ministron de Edukado s-ron K. Helveg Petersen, por informi lin pri la rezultoj. Tiu-okaze la Ministro, kiu montris grandan intereson pri la Internacia Lingvo, samtempe atentigis pri la malfacilaĵoj rilate Interŝtatan Konvencion, sed deklaris sin preta akcepti kaj pridiskuti la aferon kun la pola delegacio (vidu p-ton (2)), se ĝi vizitos Kopenhagon. Detaloj en la novembra n-ro de "Esperanto".

(7) **Nuna stato** : En pluraj landoj — ĉu laŭ la ideo de Esperanto kiel baza kaj komplementa lingvo, ĉu laŭ individuaj klopodoj ekster tiu ideo — vastiĝis la instruado de la lingvo en la lernejoj. En junio estos publikigita nova trarigardo pri la lernejoj, en kiuj Esperanto estas instruata en la lerneja jaro 1961/62 (vidu la Raporton de CED B. (4)). S-ro Marcel Erbetta (Svislando) kaj liaj kunlaborantoj en diversaj landoj daŭrigis kaj vastigis la publikigadon de "Graĵoj en Vento", tiu admirinda

periodaĵo, verkita de la gelernantoj mem, kiu kunligas la junan generacion de esperantistoj tra la mondo.

(8) **Konkludaj rimarkoj:** La vastigo de la instruado de Esperanto en la lernejoj estas tre malfacila tasko. Ĝi postulas multe da sindediĉo kaj laboro. Nur la ĝenerala sekretario sendis en tiu ĉi afero 11 cirkulerojn, kelkfoje kun ampleksaj aldonoj, kaj havis abundan korespondadon kun la kunlaborantoj en diversaj landoj. Tiu laboro, kompreneble, estas nur parto de la tuta laboro farita kaj farata sur tiu ĉi kampo. Dank' al la sindonemo de multaj, el kiuj aparte menciindaj estas s-roj Malmgren, Kennedy, Erbetta, la landaj lernejoj komisionoj kaj komisiitoj, estis eble atingi kontentigajn rezultojn, malgraŭ la multaj obstakloj kaj malfacilaĵoj. Tamen, neniu, eĉ ne la plej taŭga organiza laboro donus ian ajn rezulton, se ne troviĝus tra la mondo multaj sindonaj geinstruistoj, kiuj dediĉas sian tempon kaj energion por instrui al la infanoj kaj junularo la Internacian Lingvon en la lernejoj. Al ili la Estraro esprimas specialan dankon. Sajnas, ke en la estonteco necesos ankoraŭ pli harmoniigi la diversajn klopodojn, tiel ke la rezultoj estu ankoraŭ pli kontentigaj. Plej oportune estus, ke nur unu persono okupiĝu sole pri ĉiuj aspektoj de la instruado de Esperanto en la lernejoj.

X. SPECIALAJ KULTURAJ AKTIVECOJ

(1) **I.S.U.:** La Internacia Somera Universitato kunvenis por la 14-a fojo en Harrogate, Britujo, de la 5-a ĝis la 12-a de Aŭgusto, 1961. Pro la aparta karaktero de la kongreso ĉiuj prelegoj estis pri arta temo. La Rektoro estis Prof. D-ro W. E. Collinson, emerita profesoro de la Universitato de Liverpool, eksdocento pri lingvoscienco, M.A. (Londono) Dr. phil. (Heidelberg), membro de la Akademio de Esperanto. F-ino Marjorie Boulton, M.A., B. Litt., D.B.E.A. daŭre funkciis kiel sekretario. Prelegis: Prof. Gaston Waringhien pri "Kien la Arto?" Prof. D-ro Lapenna "La Parolarto en la Internacia Lingvo", Mag. William Auld "La Evoluo de la Esperanta Poezio", Lic. Tibor Sekelj "Artoj en Afriko", Prof. D-ro Hideo Yagi "Esenco de la Japana Arto". Dum la malferma kunsido

la Rektoro kaj prelegantoj prenis la okazon aparte honori Profesoron Gaston Waringhien; oni entuziasme aplaudis liajn tre gravajn kontribuojn al la scienca studado de la Internacia Lingvo.

(2) **Belartaj Konkursoj:** Mag. W. Auld alprenis la funkcion de sekretario de la konkursoj de G. C. Jervis, kiu plenumis la taskon dum pluraj jaroj. La plenaj rezultoj estas anoncitaj en "Esperanto" de Septembro 1961. Oni donis la jenajn unuajn premiojn en la diversaj branĉoj: Originala poezio, Alvaro de Orriols; tradukita poezio, Albert Samyn; originala prozo, Vaňa Vladimir; originala dramo, Marjorie Boulton; kongreslanda branĉo, Victor Sadler. Ĉar ĉiuj novaj partoprenantoj gajnis premiojn en la diversaj branĉoj, oni ne donis apartan premion "Nova Talento".

(3) **Oratora Konkurso:** Pli multaj junuloj partoprenis en ĉi tiu jaro ol en iu antaŭa konkurso. Kredeble allogis la fakto, ke la brita televido aranĝis dissendon pri la konkurso. La prezidanto estis Prof. Waringhien kaj lin helpis en la ĵugado S-ino Emilija Lapenna kaj Günther Becker. La unuan premion ricevis Humphrey Tonkin (Britujo). Lia nomo estas la dua sur la pokalo "Ivo Lapenna".

(4) **Magnetofona Servo:** S-ro R. Eichholz daŭre gvidis ĉi tiun Servon. La programkolekto pligrandigis de 110 al 140 diversaj programoj dum 1961. Inter la novaj programoj estas precipe surbendigoj faritaj dum la 46-a UK, sed ankaŭ 6 tre bone faritaj programoj de la Pola Radio. La kompleta Ĉe-Seminario estis registrita en Harrogate kaj ankaŭ kompleta Ĉe-Kurso (kun presita teksto kaj kelkaj anglalingvaj klarigoj) estis surbendigita de mia edzino kaj mi. Aŭdado de ĉiuj programoj de la Magnetofona Servo nun daŭrus jam pli ol 120 horojn.

(5) **Koresponda Servo:** Ĉi tiu daŭre funkcias sub la gvido de F-ino C. Hueter kies adreso troviĝas en la Jarlibro.

(6) **Filma Servo** : Dum longa tempo stagnis ĉi tiu servo, sed nun oni povas esperi, ke ĝi aktive funkcios. La nova gvidanto, S-ro Oskar Svantesson, Skonertgatan 1, Götterborg V, Svedujo, pretigas liston de pruntepreneblaj kaj lueblaj filmoj. Li volonte ricevos informon pri taŭgaj filmoj.

(7) **Eldonaĵoj** : Informoj pri eldonaĵoj aperas sub la sekvanta paragrafo (8) **Oriento** — **Okcidento**, sub III (12) eldona fako, sub V **GAZETO**, sub VIII (10) **Agado en Afriko**, sub III (8) **Jarlibro**, sub III (9) **Gazeto**, III (10) **Belarto**.

(8) **Oriento** — **Okcidento** : Agante en ĉi tiu kampo la Asocio daŭre kunlaboris kun UNESKO, tiel raportite sub VII. La Estraro decidis doni aŭspiciojn al seminario en Frostavallen en 1962 dediĉita al la laboro de UNESKO kaj al la kontribuoj de Esperanta literaturo al la UNESKO ĉefprojekto. La libroserio daŭras kaj kvankam nur unu verko aperis ĝis nun, oni bone progresis kun planoj por estontaj verkoj. Aperos la "Rakonto de la Familio Abe" el Japanujo, "Martin Fier" el Sudameriko, "Ponto trans Drina", Nobelpremia verko el Jugoslavio, ĉiuj per kunlaboro inter UEA kaj aliaj eldonistoj, kaj UEA mem eldonos "Naŭzo" de Jean-Paul Sartre, el Francujo.

(9) **Internaciaj Ekzamenoj** : La dua ekzameniĝo okazis en Londono je la 3-a de Aŭgusto 1961. Docente S. Pragano kaj D-ro P. Neergaard gvidis la ekzamenon. Ne estis sukcesa kandidato. F-ino Marjorie Boulton alprenis la laboron de sekretario. La Komitato jam aprobis la novan regularon.

(10) **Kontrolkomisiono pri Lernolibroj** : La Kontrolkomisiono pri lernolibroj, kiu havas la taskon helpi verkantojn de lernolibroj, akceptas por pristudo manuskriptojn kaj post trastudo donas rekomendojn, konsilojn kaj proponojn al la verkanto. La Komisiono ne havas la taskon fari prijuĝon aŭ rekomendon pri jam presitaj verkoj. Dum la pasinta jaro la Komisiono ricevis 4 manuskriptojn por

kontrolo. El ili 2 estas finkontrolitaj, kaj la verkintoj de tiuj lernolibroj esprimis grandan dankon pro la kunlaboro de la Komisiono.

(11) **Internacia Arta Teatro** : Ĝi meritas apartan konsideron en la ĉijara Raporto. Fondita en 1957, la IAT fariĝis unika daŭra klopodo, en la historio de la Esperanto-Movado, funkciigi laŭgrade, en internacia kadro, sendependan artan teatron, konsistantan el profesiaj kaj talentaj diversnaciaj geartistoj kaj teatraj teknikistoj. Ĝiaj praktikaj celoj estas prezenti internacilingve teatrajn spektaklojn dum internaciaj kaj landaj Esperanto-kongresoj, en internaciaj teatraj festivaloj, se iel eble ankaŭ en la Teatro de Nacioj; organizi teatrajn somerajn kursojn kaj interŝanĝojn inter diversnaciaj profesiaj Esperantaj teatraj grupoj; tiamaniere decide influi la eniron de la Internacia Lingvo en la praktikan uzon ĉe teatraj medioj. IAT agas sub aŭspicioj de UEA, sed ĝi bezonas la materian kaj moralan apogon de la tuta Esperanto-Movado, de ĉiuj organizaĵoj kaj unuopuloj. Tiucele la IAT instigis kaj nun organizas tutmondan mecenataron sub la nomo "Amikoj de Internacia Arta Teatro". La jara subteno de Amiko estas unu dolaro aŭ egalvaloro, de Amiko-Subtenanto du dolaroj, de Amiko-Mecenato 10 dolaroj. Specialaj kategorioj : Amiko-Fondinto de IAT kaj Fondinto-Mecenato de IAT donacas unufojon por ĉiam aŭ regule ĉiujare konsiderindajn sumojn por subteni la agadon de IAT. La subtenojn oni povas sendi al la C.O. de UEA, aŭ al la ĉefdelegitoj kaj perantoj de UEA, aŭ rekte al IAT je la nomo de ĝia fondinto kaj direktoro Srdjan Flego, 67, Bd. Pasteur, Paris 15e, poŝtĉekkonto Paris CC 7454-58.

XI. JUNULARO

La Junulara Sekcio de UEA ankaŭ en la jaro 1961 interne plifortigis kaj faris pli grandajn klopodojn por la disvastigo de la Internacia Lingvo inter la junularo.

Tiuj faktoj bone montriĝis dum la kunsidoj de la Komitato de TEJO en la kadro de la 17-a Internacia Junu-

lara Kongreso de TEJO en Wokingham (Britujo). Oni denove konstatis, ke la interna organiziĝo devas esti daŭre plibonigata. Malgraŭ multaj klopodoj ankoraŭ ne fondiĝis en ĉiuj landoj junularaj sekcioj. Tamen la ekzistantaj sekcioj bone laboras kaj kelkaj el ili montras imitindan aktivecon. Al la Statuto de TEJO kaj al la Kongresa Regularo aldoniĝis du novaj regularoj, la Regularo pri la Korespondaj Servoj de la Landaj Sekcioj de TEJO kaj la Regularo pri la Informa Agado. Speciala Komisiono ellaboris tekston por moderna flugfolio, kiun ĉiu Landa Sekcio laŭeble eldonu en sia nacia lingvo.

La Estraro de TEJO parte ŝanĝiĝis kaj nun havas jenan konsiston: la Prezidanto Günther Becker (Germanujo) ankaŭ estas Estrarano pri Kongresoj kaj pri kontaktoj kun internaciaj organizaĵoj, la Generala Sekretario Marek Pietrzak (Pollando) interalie respondencas pri kontaktoj kun orienta Eŭropo, la Vicprezidanto Nicola Minnaja (Italujo) prizorgas la Korespondan Servon kaj la alia Vicprezidanto Simeon Simeonov (Bulgarujo) gvidas la Informan Fakon. Kasisto fariĝis Humphrey Tonkin (Britujo) kaj la Redaktoro Heinrich Reiter (Aŭstrujo) krome prizorgas la vintrajn renkontiĝojn. Nikolaj Nikolov (Bulgarujo) daŭre okupiĝas pri internaciaj neesperantistaj renkontiĝoj kaj Svobodan Zlatnar (Jugoslavio) fariĝis Estrarano pri Junularaj Delegitoj kaj Turismo. El tiu dispartito oni ankaŭ vidas la diversajn aktivecojn. Dum la Kongreso en Wokingham pluraj landaj sekcioj de TEJO subskribis deklaron pri pli intima kunlaboro. Anglalingva raporto pri la brile organizita Kongreso (la unua kiun organizis Junularo Esperantista Brita) estis ankaŭ sendita al ĉiuj internaciaj junularaj organizaĵoj. La landaj sekcioj estas daŭre atentigitaj pri internaciaj junularaj renkontiĝoj okazantaj en la propraj landoj.

Inter la multaj junularaj renkontiĝoj Esperantistaj en la jaro 1961 speciale menciindaj estas la Skiferioj de TEJO en Aŭstrujo kaj la Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo en Köln pri la temo "Usono kaj Soveta Unio — Ĉu eblas kunekzistado de la du kontraŭaj socisistemoj?" kun prof. D-ro Ivo Lapenna kaj Prof. Lucien Laurat kiel ĉefaj prelegintoj. Sveda Esperantista Junulara Unuiĝo invitis la 18-an IJK de TEJO al Ystad en la provinco Skanio.

XII. GENERALA TRARIGARDO

(1) **Literaturo**: Ankaŭ ĉijare aperis pluraj novaj verkoj originalaj kaj tradukaj ĉe diversaj eldonejoj. Grava estas la apero de unu plia Antologio, la Dana, eldonita kun ŝtata subvencio, dum en preparo estas la germana. El la tradukaj verkoj aparte menciindas estas antaŭ ĉio la unua verko en la serio "Oriento-Okcidento", Malsata Ŝtono de Rabindranath Tagore, tradukita el la bengala de L. Sinha. Plue, Otelo, la Maŭro de Venecio, Topaze kaj La Sipego "Tenacity", ambaŭ aperintaj en la Belliteratura Eldonserio de Stafeto kaj tradukitaj resp. el la angla kaj franca; La Eta Princo de A. de Saint-Exupéry el la franca, Bulgara Prozo de 19 bulgaraj aŭtoroj; La Geedzoj Afu kaj Surtera Infero, ambaŭ el la vjetnama, por mencii nur kelkajn. Apartan lokon okupas Bildlibro pri Bestoj kaj Amuzo per Scienco, ilustritaj instruaj libroj por infanoj, eldonitaj de la grava brita entrepreno Associated Newspapers Ltd., same kiel la grand-sukcesa fotolibro pri infanoj de kvin kontinentoj Infanoj ne konas limojn, eldonita de granda nederlanda eldonejo Bruna. Cetere, estas rimarkinde ke aperis pluraj porinfanaj libretoj kiuj, pro la pli ampleksiganta instruado de Esperanto en la lernejoj, certe respondas al bezono. El la originale verkitaĵoj libroj estas menciindaj kelkaj pliaj eldonaĵoj de Stafeto en la serio Beletraj Kajeroj, inter kiuj Unufingraj Melodioj de W. Auld, Nova Ezopo de Ŝtefo Urban kaj Reĝoj, de M. Gjiŝoj, kolektitaj poemoj de 19 jugoslavaj gepoetoj. Tute apartan kaj elstaran lokon okupas la dua numero en la serio Movado de la eldonejo Stafeto, La Zamenhofa Esperanto — Simpozio pri — ata/-ita, aro da artikoloj kaj studoj de 11 gravaj verkistoj kaj konataj lingvistoj.

(2) **Revuoj kaj gazetoj**: La diversaj Esperanto-periodaĵoj aperadis proksimume en sama nombro kiel antaŭe, sed, kun granda plezuro ni povas mencii ke venkis siajn malfacilaĵojn la Scienca Revuo, kiu reaperis, nun eldonata en Jugoslavio sub redaktoreco de M. Gjiŝoj. Plue, grava kaj konata katolika revuo, antaŭe aperinta nur en nacia lingvo, nun aperis ankaŭ en Esperanto sub la titolo Nova Civito. Nova estas ankaŭ la revuo Hungara Vivo.

(3) **Lernolibroj**: Aperis lastjare novaj lernolibroj i.a. en Brazilo, Ĉeĥoslovakio, Francujo, Greklando, Jugoslavio, Venezuelo. Aparte menciinda estas la apero de la Fundamento de Esperanto en indonezia lingvo. Por internacia uzado kaj por landoj kun tre juna movado plej taŭga estas la bonega lernolibro de V. Setälä "Privilegia Vojo" kun instrukcioj en multaj lingvoj, pri kiu U.E.A. estas kuneldoninto. Laŭ la spertoj de la libroservo de U.E.A. multe uzata en anglalingvaj landoj estas la tre taŭga lernolibro "Teach yourself Esperanto", aperinta jam antaŭ kelkaj jaroj en la mondkonata serio de "University Press Ltd." en Londono. En preparo nuntempe estas lernolibroj en la araba kaj madagaskara lingvoj.

(4) **Radio**: Kiel montrite en la Raporto de C.E.D., en 1961 elsendis 15 radio-stacioj en 12 landoj entute 1485 programojn. Daŭre elsendadas ĉiutage duonan horon la Pola Radio el Varsovio. Tre bonajn programojn regule elsendas ankaŭ Romo, Bern, Zagreb k.a.

(5) **Resumoj, Rubrikoj kaj Kursoj en Gazetoj**: Resumoj en Esperanto ankaŭ ĉijare regule aperadis en multaj fakaj kaj sciencaj periodaĵoj. Menciinda estas serio de libroj "Voprosy Geografii" (Geografiaj demandoj), en kiu ankaŭ Esperanto estas uzata. La 1000-a numero de "Journal de Medicine de Lyon" aperis en decembro en belega, ilustrita, jubilea eldono 402-paĝa. Post ĉiu el la 18 artikoloj pri diversaj medicinaj temoj, kiujn ĝi enhavis, aperis resumoj krom en la angla lingvo ankaŭ en Esperanto, kiel tiu revuo kutimas fari ankaŭ en siaj ordinarnaj numeroj. En pluraj landoj denove okazis kursoj en gazetoj kaj radio, inter kiuj lastaj la Pariza okupas elstaran lokon.

(6) **Trafiko kaj komerco**: Regule aperadas turismaj prospektoj kaj gvidlibroj en Esperanto aŭ kun aldona folio en Esperanto. Pluraj firmaoj uzas por sia reklamo ankaŭ la Internacian Lingvon. La Foiro de Barcelono ĉiujare eldonas afiŝon en Esperanto. Dank' al la agado de niaj delegitoj, en pluraj landoj plimultiĝas la reklamoj de komercaj entreprenoj en la Jarlibro. Adresaro de firmaoj kie deĵoras esperantistoj estas prizorgata de C.E.K.I.T.

en Milano kaj de S-ro Tensen en Amsterdam. Antaŭvideble, la rezulto de tiu laboro aperos en unu el la venontaj jarlibroj. Du gravegaj lastatempe aperintaj eldonaĵoj estas Esperanto en Komerco, 5-lingva kolekto de opinioj de komercaj firmaoj pri la uzado de la Internacia Lingvo, prizorgita kaj eldonita de S-ro Bruno Vogelmann, Crailsheim, Germanujo, kaj belega, ilustrita, grandformata broŝuro tute en Esperanto, eldonita de Philips, Eindhoven, Nederlando, pri la x-radiaj kaj elektromedicinaj aparatoj fabrikataj de tiu mondkonata entrepreno. Prizorgis tiun eldonaĵon S-ro E. L. M. Wensing, direktoro de la koncerna departemento de Philips.

(7) **Prelegvojaĝoj**: Laŭ pluraj ricevitaj informoj multaj vojaĝantaj esperantistoj faris okazajn prelegojn en la lokoj de siaj vizitoj. Inter ili menciindaj estas S-ro Simo Milojević el Jugoslavio, kiu prelegis en Nepalo, Hindujo kaj kelkaj eŭropaj landoj, F-ino M. Mateman el Nederlando, kiu parolis en multaj lokoj de Indonezio, Japanujo kaj Usono, Joŝiko Kajino el Japanujo, kiu nun estas preleganta en Usono, kaj pluraj aliaj. Ne okazis prelegvojaĝo speciale organizita aŭ sub aŭspicioj de U.E.A., sed la ĝenerala sekretario faris plurajn pli aŭ malpli ampleksajn prelegarojn en diversaj landoj (vidu XIII (1)), el kiuj tiuj en Danlando kaj en Köln estis la plej gravaj. S-ro Sekelj, en la kadro de la Karavano de Amikeco, faras prelegojn en Afriko ĉie kie la cirkonstancoj tion ebligas.

(8) **Junularo kaj infanoj**: En la esperantista junularo leviĝis pluraj talentaj laborantoj, kiuj multon promesas por la estonteco. Tre bedaŭrinde, ankaŭ kelkaj keldiĝis pro mortakcidentoj. Precipe en la brita junularo, kiu bonege efektivigis la lastjaran T.E.J.O.-kongreson, kiel ankaŭ en la germana, kiu organizis vere elstaran seminario en decembro en Köln, troviĝas tre pozitivaj, kleraj kaj entuziasmaj junuloj, kies lingva nivelo, krome, estas tre alta.

(9) **Filmoj**: Krom interesa reklamfilmo de la entrepreno Gevaert, okaze de la kongreso en Harrogate la

filmoj Skota Montaro, Londona Kamparo, La Lagregiono, Flugmaŝinmotoro Orfeo de Bristol-Siddeley kaj La koro de Anglujo estis faritaj kun Esperanto-teksto.

XIII. KONKLUDO

(1) **Plenumita tasko:** La Estraro de UEA esperas, ke ne nur la Komitato, sed ankaŭ la tuta membraro kaj eĉ la esperantistaro, kiu troviĝas ankoraŭ ekster la Asocio, kun kontento akceptos la ĉiaran Raporton kaj objektive aprezos la atingojn de la Asocio en la lasta trijara periodo kaj la plenumon de la taskoj laŭ la laborplano 1955, kiel prezentite en la Enkonduko. Tiu ĉi kontentiga rezulto ŝuldiĝas al homogeneco de la Estraro, plej amika kunlaborado inter la unuopaj estraranoj, kiel ankaŭ inter la Estraro, Komitato, Centra Oficejo, ĉefdelegitoj kaj aliaj funkciuloj. Gravan helpon al la sukcesoj donis la laboro de la landaj kaj fakaj organizaĵoj, precipe de la plej aktivaj, la korekta komprenado de la principo de neŭtraleco de UEA. Ne estas facile nek simple en la hodiaŭa mondo ne nur konservi, sed eĉ konsiderinde fortikigi vere internacian organizaĵon kun membroj sur ĉiuj kontinentoj kaj en landoj kun malsamaj ekonomiaj, sociaj kaj politikaj sistemoj. Tamen, pro la uzado de la Internacia Lingvo por la celoj fiksita en la Statuto, observante strikte la principon de neŭtraleco, ĝuante la komprenemon de ĉiuj aliĝintaj kaj kunlaborantaj asocioj, UEA sukcesis atingi ankaŭ tion. La forto de tiu idea unueco, kiu inkluzivas komprenemon kaj toleremon, estas almenaŭ tiel grava, verŝajne eĉ multe pli grava, kiel la organiza unueco kaj la materia firmiĝo.

Nun UEA devos, surbaze de la atingitaj pozicioj, daŭrigi kaj ampleksigi sian agadon laŭ la nova Dua Laborplano. Necesos elekti kiel eble plej homogenan Estraron, kiu konsistos el personoj ne nur kompetentaj, sed ankaŭ pretaj plenumi difinitajn taskojn, kaj kiuj en sia laboro estos daŭre apogataj kaj helpataj de ĉiuj organizaĵoj kaj unuopuloj, eĉ en multe pli alta grado ol okazis ĝis nun. Oni kelkfoje ricevas la impreson, ke la membraro ne plene konscias pri la kvanto da laboro necesa por sukcese gvidi kaj fine realigi difinitajn planojn. Efektive, kun la escepto de la tre malmultnombraj oficistoj en

la C.O., kiuj streĉas ĝis maksimumo siajn fortojn por la bono de la Asocio kaj antaŭenigo de Esperanto, ĉiuj funkciuloj de la Asocio senpage oferis multe da tempo kaj energio por progresigi la Asocion kaj la aferon de la Internacia Lingvo ĝenerale en la mondo. Nun, kiam finiĝas la trijara periodo, estas utile doni kelkajn informojn nur pri la teknike-organiza laboro nur de la ĝenerala sekretario, por ke oni povu ricevi pli fidelan bildon pri la tuta agado. En sia funkcio de ĝenerala sekretario kaj direktoro de CED li forsendis en 16 monatoj (ekde kiam li laste komencis numerigi la leterojn) 2.205 korespondadojn, aŭ proksimume 1400 leterojn ĉiujare. Krome, li forsendis 11 cirkulerojn en la lerneja kampanjo, 16 cirkulerojn en la fako informado, 30 cirkulerojn al la Estraro, 14 cirkulerojn CED/Int., 15 cirkulerojn ekster serio, do entute 87 cirkulerojn en la trijara periodo, ne kalkulante la multnombrajn dokumentojn de CED, diversajn raportojn al UNESKO, artikolojn kaj leterojn en nacilingvaj gazetoj ktp. Aŭ alia ekzemplo: Nur ekde la komenciĝo de la Kongreso en Harrogate la ĝenerala sekretario faris jenajn vojaĝojn: U.K. Harrogate (10 tagoj); Danaj Porinstruitaj Seminarioj (8 tagoj); Konferencoj en la C.O. (tri fojojn po 2 tagoj); Seminario de la Germana E-Junularo en Köln (6 tagoj); Semajnfino de la Brita Junularo en Oxford (2 tagoj); Printempa Estrara Kunsido kaj Konferenco en la C.O. (5 tagoj); Konferencoj en Kopenhago okaze de la U.K. (3 tagoj); Semajnfina kolektiĝo en York (2 tagoj); Beneluksa Kongreso (3 tagoj), prelegoj en du nederlandaj porinstruitaj seminarioj kaj publika prelego por geinstruitoj (1 tago), entute do 46 tagojn en vojaĝo por la Asocio aŭ en intereso de la lingvo nur dum unu jaro. La ŝarĝo sendube estas tro granda kaj necesos trovi ian kontentan solvon por la estonteco.

(2) **Perspektivoj:** La lingva obstaklo sentiĝas ĉiam pli forte en la mondo. Pri la lingva problemo diskutas ministroj, skribas la gazetoj, intervenas parlamentanoj. El multaj eventoj de la lastaj monatoj sufiĉas mencii la leĝproponon de s-ro A. Woodburn, Membro de la Brita Parlamento, pri Eŭropa Lingva Akademio kaj Eŭropa Lingvo. La fakto, ke la gazetaro ne nur de Eŭropo, sed ankaŭ de aliaj landoj dediĉis tiom da atento al tiu projekto, mon-

tras ankoraŭfoje, ke la lingva problemo estas sentata kiel brulanta ĉie tra la mondo, eĉ en la centro mem de lando, kies nacia lingvo estas relative vaste konata. La ĝenerala sekretario estas intervjuita, okaze de tiu legprojekto, fare de "The Observer" kaj en tiu mondo grava gazeto aperis objektiva informo pri la starpunkto de la esperantistaro. Rezulte, la ĝenerala sekretario estis intervjuita ankaŭ por la Transmara Servo de la Brita Radio kaj, kiel plua rezulto, nun la Brita Radio planas diskuton pri la tuta problemo en la t.n. "Hejma Servo". La Vicprezidanto kaj la ĝenerala sekretario havis longan konversacion kun la s-ro Woodburn kaj kun s-ro Jones, alia Membro de la Brita Parlamento. Montrigis ke s-ro Woodburn ne pledas por iu speciala solvo, sed entute por solvo de la lingva problemo en Eŭropo kaj pli vaste, ankaŭ en la tuta mondo. Tiaj postuloj aŭdiĝas ĉie en tiu aŭ alia formo, kaj ili fariĝas ĉiam pli oftaj. La mondo maturiĝas por akcepto de komuna lingvo en la internaciaj rilatoj kaj la Esperanto-Movado, unuavice UEA kiel ĝia neŭtrala reprezentanto, havas ĉiam pli da ŝancoj por objekte prezenti la Internacian Lingvon Esperanto kiel la sole justan solvon, plene konforman al la bezonoj de internacia komunikado en ĉiuj aspektoj. Necesos konscii pri tio kaj agi konforme.

H. W. Holmes, O.B.E.
Vicprez. kaj Aganta Prezidanto

Prof. D-ro Ivo Lapenna
Ĝenerala Sekretario

RAPORTO PRI LA AGADO

de la

CENTRO DE ESPLORO KAJ DOKUMENTADO

por la periodo de 1-IV-1961 ĝis 1-IV-1962

A. ORGANIZAJ DEMANDOJ

(1) **Oficejo** : Kiel en la antaŭaj jaroj, ĝi plue troviĝas en 77, Grasmere Avenue, WEMBLEY, Middlesex, Britujo. En junio-julio 1961 estis faritaj teknike-organizaj ŝanĝoj kaj tiuokaze aĉetitaj novaj oficejaj mebloj. La malnovaj, komplete eluzitaj, estis prenitaj de la vendofirmao por favora prezo. Pro la fakto, ke dum la Kongreso en Harrogate estis difektita la diktomaŝino kaj ne estis eble ĝin ripari, CED aĉetis novan diktomaŝinon kaj ricevis kompencon por la difektita. La Oficejo de CED nun estas ne nur efika, sed ankaŭ agrabla laborloko.

(2) **Kunlaborantoj** : La 19-an de februaro 1962 forpasis unu el la plej eminentaj kunlaborantoj, D-ro M. Wajsbium. En februaro fariĝis kunlaboranto de CED Docento Viktor Gruško el Rostov. Li estas la unua kunlaboranto de CED el Soveta Unio. Fine de la laborjaro CED havis entute 82 kunlaborantojn el 22 landoj.

(3) **Kontaktoj** : Kelkaj britaj kunlaborantoj plurfoje kunvenis en la Oficejo de CED. Aliaj kontaktoj regule okazis en la kadro de la Esperanta Studo-Klubo (Londono), kiu kunvenas ĉiumonate por diskuti aktualajn problemojn de la Movado. Kelkaj kunlaborantoj kunvenis dum la U.K. en Harrogate. Aparta kunveno estas planata dum la SSS en Frostavallen tuj post la Kongreso en Kopenhago.

(4) **Financa situacio** : La konto de CED estas publikigita en la kadro de la Financa raportaro de UEA. Ĉi tie utilas tamen menci, ke la elspezoj estis entute, enkalkulante la negativan saldon de £24-12-11 el la pasinta jaro, £769-4-0, Do, ili estis pli altaj ol en la jaro 1960, ĉefe pro la riparoj kaj parto de la aĉetoj. La donacoj estis entute

£95-4-0 kompare kun £122-9-11 en la antaŭa jaro. La subvencio el la Propaganda Konto estis £665-2-3 kaj la negativa saldo £8-17-9. Jam plurfoje estis akcentita la graveco de CED por la afero de la Internacia Lingvo kaj oni povus atendi, ke la diversaj Esperanto-organizaĵoj kaj la tuta esperantistaro pli sindone subtenos tiun sian institucion. Efektive, kelkaj organizaĵoj kaj unuopuloj daŭre helpas CED per donacoj, sed temas nur pri kelkaj, preskaŭ ĉiam la samaj organizaĵoj kaj unuopaj esperantistoj. Estus necese, ke en la estonteco CED ricevu pli efikan financan apogon, kiu ebligas al ĝi vastigi kaj profundigi la kampon de sia agado.

(5) **Dekjara datreveno:** CED estis fondita la 1-an de januaro 1952. Okaze de la dekjara datreveno de la fondaĵo, la Direktoro aperigis koncizan artikolon pri "CED kaj Ĝia Laboro" en la januara numero de "Esperanto".

B. PLENUMITAJ LABOROJ

(1) **Dokumenta materialo:** Ĝis la 1-a de aprilo 1962 entute estis kolektitaj, ordigitaj kaj katalogitaj 1751 dokumentoj. Krome, estas katalogitaj ĉ. 3.500 eroj el diversaj libroj, revuoj kaj gazetoj.

(2) **CED-dokumentoj:** Ĝis la 1-a de aprilo 1962 CED eldonis 18 pliajn dokumentojn, tiel ke entute estas eldonitaj 159 diversaj dokumentoj. En tiu ĉi laborjaro CED iom larĝigis la reton de la regulaj ricevantoj de la dokumentoj, kiuj estas eldonataj ĉefe en la angla, kelkfoje ankaŭ en la franca kaj en aliaj lingvoj. Diversaj dokumentoj de CED estas daŭre utiligitaj por dokumentado okaze de gravaj klopodoj, kiuj multigas de jaro al jaro. Kiam ajn necesas dokumenti per precizaj informoj plej favore al la Internacia Lingvo, oni turnas sin al CED kun la peto havigi la necesajn informojn. Kun la escepto de kelkaj kazoj, CED povis ĉiam plenumi tiujn petojn. Tiamaniere ankaŭ institucioj, kiuj ne trovigas sur la listo de la regulaj ricevantoj, povis esti korekte informitaj pri la Internacia Lingvo dank' al la dokumentoj de CED: korespondantoj de gravaj gazetoj kaj revuoj, radio-raportistoj en diversaj landoj, lernejestroj kaj ling-

vo-instruistoj en diversaj okazoj (ekzemple okaze de la prelegoj en la danaj porinstruistaj seminarioj), personoj, kiuj kandidatis UEA por la Nobel-Pacpremio, Membroj de la Brita Parlamento okaze de la propono Woodburn pri "Eŭropa Lingvo" ktp.

(3) **Specialaj dokumentoj:** Okaze de la 75-jara datreveno de Esperanto CED jam eldonis du gravajn dokumentojn. Unu estas la studo de Ing. R. Haferkorn "Sciencaj, Teknikaj kaj Aliaj Fakvortaroj en Esperanto", publikita sub la signo E/V/1. La alia estas la studo de W. Auld "Esperanto kiel Literatura Lingvo". Ambaŭ dokumentoj aperis en Esperanto kaj en la angla. La du aliaj planitaj dokumentoj estas "Eldiroj de Mondfamaj Personoj pri la Valoro kaj Signifo de Esperanto" kaj "Sepdek Kvin Jaroj de la Internacia Lingvo". Estus bone, ke la landaj asocioj aŭ aliaj organizaĵoj prizorgu la publikigon de tiuj dokumentoj ankaŭ en la aliaj naciaj lingvoj.

(4) **Lernejoj:** Laŭ la statistiko farita de CED kaj publikigita en la Raporto por la laborjaro 1960/61 Esperanto estis instruata entute en 340 lernejoj de 27 landoj kun minimume 13.009 gelernantoj. En Harrogate, okaze de la diskutoj en la Lerneja Komisiono evidentiĝis, ke ĉ. 200 pliaj lernejoj ne troviĝis en la statistika trarigardo publikigita de CED. Tio signifas, ke la nombro de lernejoj, en kiuj Esperanto estis instruata en 1960/61, altiĝis al proksimume 540 en 27 landoj kaj la nombro de gelernantoj al proksimume 15.000. CED, pere de sia kunlaboranto s-ro D. Kennedy, daŭrigas la enketon kaj la rezultoj por la lerneja jaro 1961/62 estos publikigitaj en junio aŭ julio.

(5) **Memorlibro:** Tiu ĉi verko, eldonita de CED okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de D-ro L. L. Zamenhof en 2.000 ekzempleroj, estis recenzita tre favore en la tuta Esperanta gazetaro. Ĝis la fino de marto 1962 disvendiĝis 967 ekzempleroj. La artikoloj kaj kontribuoj de 31 aŭtoroj, grandparte kunlaborantoj de CED, devus esti ankoraŭ pli vaste utiligitaj por dokumentado kaj efika argumentado en la intereso de la plua disvastigo de la Internacia Lingvo.

(6) **Stratoj:** Laŭ la informoj en la arkivo de CED, en-

tute hodiaŭ troviĝas 161 stratoj aŭ placoj kun la nomoj "Zamenhof" aŭ "Esperanto". La listo estas daŭre kompletigata de s-ro R. Pennazio, ŝargita de CED pri tiu tasko.

(7) **Radio** : Laŭ la statistiko, kiun ellaboris s-ro G. Larglantier, kunlaboranto de CED por la radio, la nombro de la regulaj radio-elsendoj en Esperanto estis 1485 en la pasinta jaro. Entute 15 radio-stacioj en 12 landoj elsendis programojn en la Internacia Lingvo. Detaloj en la aprila numero de "Esperanto".

(8) **Bibliografio** : Mag. W. Auld, la kunlaboranto de CED por la branĉo Bibliografio, daŭrigis la laboron, sed ankoraŭ ne povis fini tiun ampleksan taskon. Tuj kiam la manuskripto estos pretita, CED eldonos tiun gravegan verkon, kiu estas urĝe bezonata.

(9) **Index Translationum** : Kiel en la antaŭaj jaroj, CED liveros al la redakcio de tiu publikaĵo ordigitan liston de Esperantlingvaj tradukoj.

(10) **Universala Ekspozicio** : Okaze de la Kongreso en Harrogate, parto de la materialoj de la Universala Ekspozicio estis ekspoziciita en la urba biblioteko. CED ekspoziciis tie ankaŭ parton de siaj dokumentoj. La interesiĝo estis kontentiga. Plia kompleta elmonro de la U.E. estas planata en Kopenhago. La materialoj troviĝas nun en la Nova Domo de UEA en Rotterdam kaj s-ro J. Calado prizorgas la daŭran kompletigadon de la Ekspozicio.

(11) **Fotoservo** : CED nun posedas interesan kaj abundan kolekton da fotoj, kiuj rilatas ne nur al la vivo de Zamenhof kaj historio de la Internacia Lingvo, sed ankaŭ al diversaj aspektoj de la lingva problemo en la internaciaj rilatoj.

(12) **Ekonomiaj malavantaĝoj de multlingveco** : D-ro Werner Bormann liveris al CED ampleksan studon pri la temo, sed montriĝis ke estas necese fari kelkajn kompletigojn antaŭ la publikigo. Verŝajne estos eble prezenti raporton al la Unua Internacia Konferenco pri la Lingva problemo en la Scienco.

(13) **Tradukmaŝinoj** : S-ro Viktor Sadler, B.A. (Cam-

bridge) daŭrigis la studadon de la nuna stato de tradukado per tradukmaŝinoj. Pri la sama demando okupiĝis ankaŭ la forpasinta D-ro M. Wajsbloom. Lia artikolo pri la afero aperis en la revuo "Esperanto" (marta numero).

(14) **Nobel-Premio** : Kiel konata, konsiderinda nombro da personoj el diversaj landoj proponis UEA kiel kandidaton por la Nobel-Pacpremio en 1962. Pluraj turnis sin al CED kun la peto pri precizaj informaj rilatoj UEA kaj la Internacian Lingvon ĝenerale. Al ĉiuj petintoj CED donis ĉiujn necesajn informojn.

(15) **Raportoj** : Regulaj koncizaj raportoj pri la agado de CED aperis en la revuo "Esperanto". La Direktoro de CED faris ankaŭ kelkajn prelegojn pri tiu institucio en pluraj landoj.

C. LABORPLANO POR 1962/63

(1) **Kunlaborantoj** : Altiĝi la nombron de kunlaborantoj, se troviĝos kompetentaj kaj kvalifikitaj specialistoj, kiuj estas pretaj kontribui al la laboro de CED.

(2) **Dokumenta materialo** : Daŭrigi la kolektadon laŭ la ĝisnuna sistemo.

(3) **Dokumentoj** : Daŭrigi la regulan eldonadon kaj, se iel eble, eldoni pli ol 20 dokumentojn.

(4) **Bibliografio** : Daŭrigi la laboron kaj, se necese, helpi al s-ro Auld helpanton, tiel ke tiu tasko estu nepre finita kaj la verko publikigita plej malfrue en 1963.

(5) **Index Translationum** : Liveri al la redakcio la liston de la esperantlingvaj tradukoj kaj prizorgi la publikigon.

(6) **Radio** : Statistiko pri la elsendoj en 1962.

(7) **Stratoj** : Daŭrigi la kompletigadon de la listo.

(8) **Ekonomiaj Malavantaĝoj de multlingveco** : Publikigi, almenaŭ en formo de interna dokumento, la rezultojn de la ĝisnunaj esploroj.

(9) **Tradukmaŝinoj:** Plue sekvi la evoluon kaj, se necese, publikigi studon pri la afero.

(10) **Lernejoj:** Publikigi la rezultojn por 1961/62 kaj sekvi la evoluon en 1962/63.

(11) **Esperanto-societoj:** Entrepreni enketon pri la nombro de la lokaj Esperanto-societoj en la mondo.

(12) **Nombro de esperantistoj:** Entrepreni la preparlaborojn por enketo pri la nombro de esperantistoj, tiel ke la enketo povu esti farita en 1964.

(13) **Faktoj pri Esperanto:** Publikigi la duan eldonon de la verko "La Internacia Lingvo — Faktoj pri Esperanto", se la unua eldono elĉerpigis.

(14) **Aliaj taskoj:** Plenumi eventuale aliajn taskojn konforme al la Dua Laborplano de UEA, kiun akceptos la Komitato dum la U.K. en Kopenhago.

Prof. D-ro Ivo Lapenna
Direktoro de CED

ALDONO

Raportoj de Landaj, Neneŭtralaj kaj Fakaj Asocioj

La sekvantaj notoj estas kompilitaj de raportoj de la koncernitaj organizaĵoj.

I ALIĜINTAJ LANDAJ ASOCIOJ

1) **Argentino.** Ligo Argentina de Esperanto. La membraro restis la sama kiel en la pasinta jaro: 450. Funkcias 9 lokaj grupoj. Oni faris paroladojn pri Esperanto ĉe la Rotaria Klubo de Ramos Mejia, Villa Ballester kaj Florencio Varela. Ekspozicioj de desegnoj de japanaj infanoj okazis en Buenos Aires, Rafaela kaj General Madariaga. La Universitato de Rosario eldonis volumon pri originalaj sciencaj temoj, al kiu estis aldonita resumo en Esperanto. En la revuo "Ciencia e Investigación" (Scienco kaj esploro) aperis diskonigaj artikoloj. Krom la grupaj kursoj efektiviĝis kursoj ĉe la Universitato de Rosario kaj ĉe la Porinstruista Kolegio en Rafaela. Kun speciala permeso de la Federacia Edukministerio en Buenos Aires okazis kurso ĉe la duagrada kolegio Mariano Moreno. Subvenciita de la Provinco de Santa Fe per Pesoj 100.000,- la Klubo en Venado Tuerto komencis konstrui sian propran sidejon. La revuo "Argentina Esperantisto" aperis trifoje jare. Por la propagando la Ligo eldonis denove la efikan okpaĝan flugfolion.

2) **Aŭstrujo.** Aŭstria Esperantista Federacio, havas 490 membrojn (+260 de AFEF, org. sendependa, sed kolektiva membro de AEF): 8 liglandaj (provincaj organizoj -Burgenland, Malsupra Aŭstrio, Supra Aŭstrio, Stirio, Karintio, Salzburgo, Tirol, Vorarlbergo, Vieno); 6 fakorganizoj -fervojistoj (AFEF), instruistoj, junularo, naturamiko, katolikoj (AKLE), socialistoj, pacamikoj; 16 lokaj grupoj: Vieno (4), Graz, Linz, Salzburg, Klagenfurt, Innsbruck, Knittelfeld, Wiener Neustadt, Villach, Wels, Vocklabruck, Kufstein, Solbad Hall (+ 4 sekcioj de AFEF - fervojistoj).

Aŭstria Esperanto-instituto faras laborojn lingvistikajn kaj literaturan, eldonos Aŭstrian Antologion, en Esperanto.

Tiu laboro ankoraŭ ne okazas sisteme, escepte fare de AKLE (katolikoj); propaganda laboro menciinda estas la agitado por la Esperanto-feriejo Primošteno, Jugoslavio, kiun dum 1961 vizitis geesperantistoj kaj ties parencoj kaj gekonatoj el areto da aŭstriaĵ urboj. Oni gajnis per tio interesulojn por kursoj. La restado tie donis al multaj vizitintoj novajn impulsojn por aktivado en la movado.

Okazis Aŭstria Esperanto-Konferenco 1961 en Klosterneuburg kaj Vieno (27.28.V.61).

Kampanjo "Esperanto en la lernejoj" : Graz, 2 klasoj : Vieno : 1 kurso en popola universitato "Brigittenau". Generala propagando farata de la instruista sekcio de AEF, en Klagenfurt de la tiea societo. Dufoja interveno en la Ministerio por Instruado favore al "Hamburga Konferenco de Instruminstroj", apelo al la sama instanco pro konsento pri konferenco favore al Interŝtata Konvencio pri enkonduko de Esperanto en la lernejoj kiel lernenda instruobjekto (kun rezulto negativa); mobilizo de kompetentuloj por pledo pri Nobel-premio al UEA. Preleg-vojaĝo de Eizo Ito (Japanujo) al Vieno, Graz, Salzburg, Klagenfurt kaj Linz. Esperanto-ekspozicio en Ternitz, Malsupra Aŭstrio.

Reaktiviĝo de nia movado en Malsupra Aŭstrio per gajno de simpatianoj kaj aŭtoritatuloj. Sukcesaj prelegoj kun prezentado de lumbildoj (en nacia lingvo) pri la "Esperanto Ferioparadizo Primošteno" en pluraj urboj de Aŭstrio kun la efiko, ke neesperantistoj (ja Esperantemaj) deziras pasigi sian libertempon inter gesamideanoj, ek-interesante sin pri la lingvo. Pli intensa laboro de la "Societo por internacia kontakto" (Esperanto-amikoj), kresko de ties membraro : instalo de nova, moderna, bone ekipita hejmo, uzebla por diversaj Esperanto-aranĝoj; eldono de ties nacilingva organo "Internationale Informationen". Daŭrigado de la Esperanto-disaŭdigado de Radio-Vieno II (ĉiusemajne). Okazado de la Esperanto-ekzamenoj ŝtataj en Vieno kaj Graz : intervjuoj en radiostacioj de Graz, Klagenfurt kaj Innsbruck. Subvencioj al la aŭstriaĵ Esperanto-organizoj fare de la Ministerio por Instruado, magistrato de Vieno, Laborista Kambo Vieno, Socialista Partio de Aŭstrio, Aŭstria Sindikata Ligo, Zentralsparkasse Wien, Wiener städtische wechsel-

seitage Versicherung- (asekuro de Vieno), magistrato de Linz, Laborista Domo Linz. Internacia ski-semajno de TEJO kaj Aŭstria Esperanto-Junularo en Filzmoos (Salzburg). Kurso por urbgovidantoj en Vieno. Internacia skikurso de la aŭstria sekcio de TANEF (Naturamikoj) en Saalbach. Eldono de 5000 varbfolioj okaze de la 1-a de Majo-manifestacio en Vieno (socialistaj Esperantistoj - ASLE).

Faldprospekto kaj broŝurprospekto pri Burgenland (aldonfolio en E) kaj Salzburg. Fondo de Esperanto-sekcio en la Kultursekcio de la granduzino "Siemens".

3) **Belgujo.** Reĝa Belga Ligo Esperantista. En la Ligo estis registritaj, je la fino de 1961-a, 450 membroj en 7 lokaj grupoj. Surbaze de la 6 kursoj korespondaj kaj buŝaj, organizitaj de tiuj grupoj, proks. 150 personoj komencis la studadon. Komunikoj pri E-o estis regule sendataj al nacilingvaj gazetoj. Sajnas tamen, ke la konstanta liverado de informoj kaj dokumentaĵoj al individuoj donas pli bonajn rezultojn. Belga Esperanto-Instituto ankaŭ daŭrigis sian agadon en plej malfavoraj cirkonstancoj. Post la eksigo de S-ro G. Vandenbossche, la nova direktorino F-ino Vanderweken grave malsaniĝis. La Instituto havas stokegon da libroj kaj komerce rilatas kun Esperanto-eldonejoj en la tuta mondo. Benerluka Kongreso okazis dum la Pentekostaj tagoj, de la 20-a ĝis la 22-a de majo en Namuro (Valonujo) kaj la kongresanoj estis oficiale akceptitaj en la urbdomo. La movada organo "Belga Esperantisto" (53-a jaro) regule aperadis. Speciala atingajo dum 1961 estas, ke la Ligo kunfandiĝis kun sia frata organizo, Flandra Ligo Esperantista. Dum la jaro 1962 kunsidos en la nova, komuna estraro la du estraroj de la ĝinunaj Asocioj. D-ro Kempe-neers estas ĝia honora prezidanto. La nomo de la organo estos nun : La Sonorilo - Organo de Belga Esperanto-Federacio.

4) **Brazilo.** Brazila Esperanto-Ligo. 1053 membroj en 1961. En 1961 fondiĝis novaj grupoj en Cruzeiro (São Paulo), Joinville (Santa Catarina), Fortaleza (Ceará), São João de Meriti (Rio de Janeiro) kaj Além Paraíba (Minas Gerais). La nombro de grupoj estis 46 kun malsama akti-

veco. Pluraj grupoj funkciigis kursojn, precipe Brazila Klubo "Esperanto" (Rio de Janeiro), Esperanto-Societo de Minas Gerais (Belo Horizonte), Resende Esperanto-Grupo (Resende, Rio de Janeiro), Uberlândia Esperanto-Klubo (Uberlândia, Minas Gerais), Centralina Esperanto-Klubo (Centralina, Minas Gerais) kaj SEMO (Monte Santo de Minas, Minas Gerais). Esperanto estis instruata en lernejo en Fortaleza (Ceara), Muritiba (Bahia), Diamantina (Minas Gerais), Nilópolis (Rio de Janeiro) kaj Chapecó (Santa Catarina). En la katolika Seminario de Monte Santos de Minas (Minas Gerais) Esperanto estas deviga lernobjekto en du jaroj. Oni povas taksi ke okazis kursoj en 25 grupoj kaj lernejoj kun proksimume 1500 lernantoj. Bone funkciis la kursoj per korespondado de B.E.L. En Porto Alegre, ĉefurbo de la plej suda ŝtato, okazis la XVII-a Brazila Kongreso de Esperanto kun aliĝo de 396 kongresanoj, al kiu la Organiza Komitato, sub la prezido de generalo Wanderley F. Gonçalves, sukcesis doni grandan brilon. Pro la proksimeco al Urugvajo kaj Argentino la kongreso altiris multnombrajn karavanojn el tiuj landoj, kaj tiel la Kongreso fariĝis kvazaŭ internacia. La ŝtata kaj komuna registaroj apogis la Kongreson per subvencioj, kaj pluraj ŝtataj Registaroj sin reprezentis aŭ permesis al la ŝtatoficistoj partopreni sen perdo de salajroj kaj de aliaj rajtoj: la federacia registaro donis saman permeson al la federaciaj oficistoj. La Kongreso aprobis plurajn dezirospimojn, inter ili tiu, kiu apogas alvokon de B.E.L., por ke la brazila registaro prenu iniciaton pri starigo de internacia konvencio por la enkonduko de Esperanto en la lernejoj kaj kiu sugestas esploron pri la eblecoj de okazigo en Brazilo de Tutamerika Kongreso. La kunvenoj de la Kongreso okazis en la Universitato de Rio Grande do Sul, kies Rektoro estis honora prezidanto de la O.K. Estis prezentitaj al la kongresanoj belaj montroj de la regiona folkloro. Bonega ekspozicio en vasta salono sur teretaĝo en nova konstruaĵo ĉe ĉefa strato altiris multajn vizitantojn. Venis kongresanoj el preskaŭ ĉiuj brazilaj regionoj: granda plena omnibuso veturis ĉirkaŭ 3000 km. el Minas Gerais, vekante intereson en dekoj da urboj. Por memoriĝi la Kongreson estos eldonita en Esperanto la ŝatata romano Clarissa, de Erico Verissimo, kiun la famkonata brazila

verkisto mem elektis por tiu celo. La XVII-a Kongreso sendube tre efikis por la progreso de Esperanto. La plej proksima Kongreso okazos en Fortaleza, Ceará, nord-oriento de Brazilo, kiu prezentas ankaŭ interesajn tipajn aspektojn. B.E.L. organizas eldonan fondajon kun celo pligrandigi la nombrojn da verkoj, ĉu instruaj, ĉu precipe beletristikaj por helpi al la diskonigo de la jam riĉa brazila literaturo, kiu ankoraŭ ne havas sufiĉe grandan nombron da tradukoj en naciaj lingvoj. Pli el dek verkoj estas pretaj por presado. Du novaj stratoj rilatas al la Internacia Lingvo: strato Zamenhof en Muritiba (Bahia), kaj placo Esperanto en Resende (Rio de Janeiro). Entute estas nun 32 stratoj aŭ placoj kun la nomo Esperanto aŭ Zamenhof, kio metas Brazilon sur elstaran lokon el tiu vidpunkto. Por stimuli la lernadon de Esperanto en mezlernejoj BEL starigis de kelkaj jaroj konkurson inter gimnazianoj de la tuta lando, kun valoraj premioj. La libroservo de BEL, konsiderata unu el la plej bone provizitaj, havas librojn de ĉiuj esperantistaj eldonistoj. La libroservo ekspedas librojn al ĉiuj punktoj de Brazilo. Por helpi al la disvendado de esperantistaj gazetoj B.E.L. peradas kiel agento de preskaŭ ĉiuj. Interesa detalo estas ke ĝi disvendas E.-librojn pere de pluraj komercaj librovendejoj tra la tuta lando. La biblioteko de B.E.L., sisteme ordigita, estas la plej kompleta E.-libraro en la kontinento: plie B.E.L. kunlaboras kun la grupoj por formado kaj pliriĉigo de bibliotekoj. "Brazilo Esperantisto", organo de B.E.L., kiu aperas de 1907, estas sendata senpage al la membroj kaj havas plurajn abonantojn alilande. En 1961 B.E.L. donis 188 diplomojn de la tri gradoj: elementa, supera, profesora kaj kutime donas al la Akademio de Esperanto subvenciojn proporciajn al diplomkotizoj ricevitaj. El 20 ekspozicioj oni menciis tiun en Porto Alegre, jam cititan kaj tiun de polaj libroj en Esperanto, aranĝita de B.E.L. en kunlaboro kun la Centro de Universitataj Studoj kaj Interŝanĝo "Brazilo-Pollando" kaj okazinta en la Palaco de la Rektorejo de la Universitato de Brazilo, Radistacio en Rio de Janeiro (3), Natal (2), Salvador, Rezende kaj Itepetininga dissendas regule E.-programojn. Okazis du televidaj dissendoj. B.E.L. faras kampanjon por pliampleksigo de la reto de delegitoj.

5) **Britujo.** Brita Esperantista Asocio. En 1961 havis 1625 membrojn (el kiuj pli ol 600 individuaj membroj de UEA), 52 lokajn grupojn, 8 fakgrupojn, 12 regionajn federaciojn. Tre aktiva junula sekcio funkcias daŭre kaj dum 1961 starigis grupon en la Universitato de Oxford kaj kurson en la Universitato de Londono. La U.K. en Harrogate (kaj aliaj internaciaj kunvenoj, ligitaj kun ĝi) forte influis nian agadon dum la jaro. La brita Kongreso en Bournemouth je Pasko estis tre sukcesa. Multaj gazetartikoloj aperis kaj kelkaj radi- kaj televid-dissendoj okazis. Ĉar ni scias, ke aperis multaj gazetartikoloj ktp, kiuj ne raportigis al nia oficejo, ni ne donas statistikon pri ili, ĉar tio povus esti nefidinda. Simile pri prelegoj kaj kursoj. Evidentiĝis, ke tre efika (eble la plej efika) instigilo al la lernado de Esperanto estas la lernolibroj eldonitaj de komercaj eldonistoj, nun aĉeteblaj en librovendejoj tra la lando. La aŭtoroj de tiuj lernolibroj estas membroj de nia Asocio, kaj multe da konsultado okazis inter la eldonistoj kaj nia oficejo. Ankaŭ aperis dum 1961 la luksa "Daily Mail Bildlibro pri Bestoj", tradukita el la angla de unu el niaj membroj. Ni daŭrigis nian reklamadon per afiŝoj en stacidomoj kaj per gazetanoncoj. Entreprene tre interesa por esperantistoj ĉiulandaj estis la apero en "The British Esperantist" de ĝis nun ne eldonitaj leteroj ktp. de D-ro Zamenhof.

6) **Bulgarujo.** Bulgara Esperantista Asocio. Nombro de la membroj 4000, lokaj societoj 128 (90 urbaj, 38 vilaĝaj). Dum la jaro 1961 estis organizitaj 255 kursoj por komencantoj kun 3350 partoprenantoj. Por progresintoj estis malfermitaj 40 kursoj kun 500 partoprenantoj. Korespondajn kursojn partoprenis 290 komencantoj kaj progresintoj. En la gazetoj aperis 40 diversaj propagandaj artikoloj kaj 39 mallongaj informoj. La organo de la Asocio "Bulgara Esperantisto" aperis en 3000 ekz. ĉiumonate. La ilustrita riĉenhava revuo "Nuntempa Bulgario" estis eldonata en 12000 ekz. ĉiumonate kaj bone akceptata en pli ol 60 landoj. La revuo "Bulgara Filmo", eldonata de la ŝtata entrepreno "Disvastiĝo de filmoj" (multobligita en 500 ekz.) estis disvastigata en 70 landoj. Radio Sofia daŭrigas la 25-minutan disaŭdigon en Esperanto ĉiudimanĉe, dufoje en la sama tago. Dum 1961 multaj gastoj el diversaj landoj vizitis nian landon, ekz. el Pollando, GDR, SFR,

Ceĥoslovakujo, Hungarujo, Aŭstrujo, Italujo, Svedujo, Rumanujo, Anglujo k.a. Dum la jaro estis organizitaj 34 Esperantoj ekspozicioj kaj 150 vitrinoj en la iom grandaj urboj. En 1961 la Fremdlingva Eldonejo eldonis la librojn "Triumfo la politiko de paco kaj paca kunekzistado; oni metu finon al la kolonia jugo" de Todor Jivkov, kolekton de rakontoj "Bulgara prozo" kaj "Bulgario ĉe internaciaj konkursoj kaj festivaloj": la ŝtata eldonejo "Nauka i Izkustvo" eldonis grandan Bulgaran-Esperantan Vortaron: la Asocio eldonis propagandan broŝuron "La mondo havis internacian lingvon" (en bulgara lingvo) de Iv. Sarafov kaj St. Masarov. En Bulgarujo aperis jenaj Esperantaj gazetoj: "Bulgara Esperantisto", "Nuntempa Bulgario", "Bulgara Filmo", "Internacia Ĵurnalisto". En 1961 oni organizis Tutlandan Junularan Balon en Plovdiv multnombro vizititan. La balo jam fariĝis tradicia. La esperantista junularo tre aktiviĝis — oni malfermas kursojn en diversaj lernejoj, junularaj organizaĵoj ktp. La bulgara socio alte taksas la porpagan agadon de la bulgaraj esperantistoj en la packomitatoj en la lando. Por honorigo de la aŭtoro de Esperanto la Turista Sekcio ĉe la Asocio iniciatis konstruadon de montodomo "Esperanto" sur Vitoŝa — monto apud la urbo Sofia. La esperantistaro partoprenis amase en la laborbrigadoj. Al la starigita fonduso sendas kontribuojn enlandaj kaj eksterlandaj geesperantistoj. La montodomo estos finkonstruita en 1963. Ĉe la Asocio funkcias Bulgara Amatora Kinoklubo kun kino-foto kaj magnetofona servoj. En la klubo membras deko da fakuloj, kiuj nun lernas la lingvon. Funkcias foto-kurso kaj estas preparata fotoekspozicio de la bulgaraj esperantistoj. La filma servo pretegas du filmetojn. La magnetofona servo surbendigas, disponigas kaj interŝanĝas variajn Esperanto-programojn. Dum la somero de 1961 en la vilaĝo Drujevo oni organizis por la unua fojo en la lando kurson por kursgvidantoj kun 40 partoprenantoj. La Bulgara Esperantista Kooperativo daŭre funkcias. Ĝi sukcese disvastigas Esperantan literaturon per siaj 8 magazenoj en Sofio.

7) **Danujo.** Centra Dana Esperantista Ligo havas la unuan de januaro 1962 ĉ. 1000 membrojn en 39 kluboj,

krome, kiel kolektivajn membrojn la danan "Asocio de Unuigintaj Nacioj" kun ĉ. 5000 membroj. La monata gazeto "Dansk Esperanto-Blad" aperis en ĉ. 1100 ekz. kun 114 paĝoj. La informa servo dum la jaro dissendis entute 10 dokumentojn de entute 16 paĝoj, en suma amplekso de 1306 ekzempleroj. Rezulte de tio alvenis 445 artikoloj kaj informoj el la gazetaro. Du eksterlandanoj faris prelegvojaĝon, nome s-ro Faulhaber el Nederlando kaj s-ro Moraveĉ el Germanujo. Krome d-ro jur. Ivo Lapenna faris prelegvojaĝon al la danaj porinstruistaj lernejoj, entute al 12 lernejoj kun ĉ. 2100 aŭskultantoj, la vojaĝo estis subtenata de la dana instrumisterio. La dana financministerio aprobis CDEL kiel asocion, kiu rajtas ricevi mondonacojn kun tiu sekvo, ke la donacinto povas subtrahi la donacon en la impostdeklaro. La jarkongreso 1961 okazis en Fredericia, la kongreso en 1962 okazis en Herning. 32 aktivaj instruistoj sendis en novembro petrikribon al la Ministerio de Instruado, ke oni ebligu la instruadon de la Internacia Lingvo Esperanto en la kadro de la kursoj de la Porinstruista Altlernejo dum la lerneja jaro 1962-1963, sed ricevis la respondon, ke estas tiom da aliaj taskoj en la altlernejo, kiuj sin altrudas, ke oni opinias, ke estas neeble nun komenci la menciitan instruadon. En 1961 aperis "Dana Antologio", la financadon helpis la dana instrumisterio per asigno de 5000 danaj kronoj.

8) **Francujo.** Unuigo Esperantista Franca. La franca movado estis grave frapita dum la nuna jaro. Ja du el ĝiaj plej bonaj samideanoj, plej valoraj kaj elstaraj propagandistoj forpasis: Generalo Bastien, Prezidinto de nia internacia asocio, kaj S-ro Couteaux, Prezidinto de nia societo, ambaŭ bone konataj, ne nur en Francujo. La universala reto de la delegitoj de U.E.A. estas unu el la plej taŭgaj argumentoj por pruvi la realan vivantecon kaj uzeblecon de nia lingvo: ni do unue konstatu, ke Francujo ankoraŭ havas la plej nombran delegitaron: 304 delegitoj, t.e. 1/10 de la tutmonda. Ni efektive havis oficanajn: 158 delegitojn, 21 vic-delegitojn, 125 fakdelegitojn el kiuj 2 pri junularo. La nombro de niaj geanoj daŭre pligrandiĝis dum 1961. Sufiĉos, ke ni memorigu ke en 1956 ili estis 858. Nun ni havas 1374 geanojn. Tio montras pli-

nombrigon de pli ol 50% dum 5 jaroj. Tiuj geanoj apartenas al lokaj grupoj el kiuj proksimume la duono ricevas jaran subvencio de la urba magistrato aŭ de la departamenta konsilantaro. El tiuj grupoj, 57 sciigis, ke ĝia sidejo estas: en urba salono 14, en privata ĉambro 39, en publikaj ejoj 4, Bibliotekon havas 38 el ili, kaj sonbendojn 22. La agado de la franca movado havis kiel rezultaton, sur la kampo de propagando: 770 artikolojn kaj 790 anoncetojn en lokaj gazetoj. Rimarkinde estas, ke nur du malfavoraj artikoloj aperis pri nia afero. Al 47 grupoj, elektitaj je geografia vidpunkto, ni demandis: ĉu en via regiono, progresas aŭ ne, la intereso al Esperanto? Ni ricevis respondojn: Ĝi malkreskis 6, ĝi kreskis 21, ĝi stagnis 20. 34 prelegoj estis faritaj antaŭ 2100 aŭskultantoj. Plie S-ro Petit faris 2 prelegojn kun lumbildoj en privataj Parizaj kluboj, kaj ankaŭ paroladis, antaŭ la lernantoj, kelkaj profesoroj kaj la direktoro de seminario por instruistoj en Versailles. S-roj Thierry kaj Ciliga same prelegis ĉe diversaj asocioj de Parizo. S-ro Ribot, vizitante 54 urbojn en 15 departementoj, faris 172 paroladojn antaŭ 1377 instruistoj kaj gelnantoj. En la lernejoj mem oni malfermis 13 kursojn. Por helpi tiun propagandon, 59 grupoj uzis 404 afiŝojn kaj disdonis 355380 flugfoliojn, 710 propagandilojn. S-ro Delaire daŭre gvidas kurson per radio ĉiujauĉe ĉe dissendejo "France III" (280 m.) — sed krome estis 16 radiodisendadoj pri nia lingvo dum la jaro. U.E.F. sendas laŭpete sonbendojn kiuj estas tre utilaj por agrablighi programojn kaj ankaŭ aŭdigi al komencantoj la ĝustan elparoladon de niaj oratoroj. Jam 23 grupoj havas sian propran magnetofonon. Nova interesa iniciato: S-ro Lentaine (Montpellier) pretigis Esperanto-ekspozicion konsistantan el koloraj diapozitivaj projekcieblaj kaj akompanaj de surbenda komentario. Tiun interesigon helpas la ekspozicioj: 23 estis organizataj de diversaj grupoj dum la jaro. Speciale menciinda estas tiu, kiun organizis la Fervojistaj Asocio en ĉefa stacidomo Pariza "St. Lazare". Ĝin vizitis 10.000 personoj. Multajn vizitantojn ankaŭ akceptis nia speciala budo en la komerca "Pariza Foiro". Tre alloga estas ordinare vizito de alilandaj esperantistoj. Rimarkindaj estis la vizitoj de D-ro Hamvai al 12 grupoj kiuj tre ĝuis liajn programojn. S-ro Retot faris

aldonon al sia adresaro de firmaoj, hoteloj, restoracioj... kie oni parolas Esperante. Estis inaŭguritaj 2 publikaj lokoj kun nomo de D-ro Zamenhof: 1) Kampadejo de Vallon Pont d'Arc, 2) Strato en Fleury-les-Aubrais (apud Orléans). De nun do, Francujo havas 38 Esperanto-stratojn aŭ publikajn lokojn. Ni notu la reorganizon de junularfako fare de S-ro Turin. Nun la prezidantino estas F-ino Garrigue (Marseille). S-ro Rousseau aperigas reŭlan Esperantan rubrikon en filatelja gazeto "La mondo de la filatelistoj" kies ĉefredaktoro scipovas nian lingvon kaj akceptas de nia samideano artikolojn tradukitajn en Esperanto. S-ro Ciliga agadas regule en federalistaj movadoj. S-ro Goucet, prezidanto de Kampada Esperanto-Organizo, agadas same ĉe diversaj kampadejoj en kiuj estas li afable akceptata kaj eĉ el kiuj li ricevis subvenciojn. S-ro Vidal aperigis 3 artikolojn en abelbredadorevuo. 70 kursoj estis gvidataj en 58 lernejoj antaŭ 1200 gelnantoj. Gravaj estas por la estonteco niaj aliaj 20 kursoj gvidataj en seminarioj lernejoj (2 en Perpignan estas devigaj). La rezultoj de tiuj kursoj estas kontentigaj: Franca Esperanto Instituto disdonis: 233 atesteojn pri lernado, 36 atesteojn superajn, 26 atesteojn kapablecajn, do entute 295 diplomojn, kio montras kompare al 1960 (217) plimultigon de 35%. Notinde estas ankaŭ, ke povis esti organizataj en Perpinan 2 gravaj manifestacioj: Dua pedagogia kultura semajno (majo) kaj memoriga semajno pri datreveno de naskiĝo de D-ro Zamenhof kaj pri 13-a datreveno de Universala Deklaracio pri la Homaj Rajtoj (decembro), sub aŭspicio de la fako "Junularo kaj Sportoj" de la franca edukministerio. Kultura Domo de Gresillon — bona jaro. Krom internacia renkontiĝo, oni devas rimarki, ke la diversaj kursoj elementaj aŭ formantaj kursgvidantojn plene sukcesis. Plej kontentiga estis la nivelo de la programoj. U.E.F. decidis, ke ĝi eldonos tradukon de la verko "Kion mi kredas" de Jean Rostand, sciencisto mondfama, ankaŭ amiko de Esperanto, reeldonos ankaŭ "Konsiloj al Grupoj", tre utila al la organizantoj kaj administrantoj de niaj grupoj. La nacia Kongreso okazis en Ebernay dum Pentekosto. Bone organizita ĝi alportis agrablajn horojn al siaj geanoj, artan vesperon, balon, viziton de la ĉampanvinaj keloj..., Subvencioj. Ĉar pli kaj plikonata kaj ŝatata,

nia movado estis kuragiĝita de subvencioj: U.E.F. ricevis tiel 2230 novajn frankojn el kiuj 1200 de Ministreja sekretario pri Junularo kaj Sportoj kaj 1000 de Magistrato de Parizo kaj "Semi" Departementa Konsilantaro. U.E.F. diskonigas la informojn pri Unesko (kiun ĝi ricevas pere de U.E.A.) kaj disdonas ĝiajn afiŝojn. S-ro Rougetet regule rilatas kun "Franca Komitato de nereĝistaraj organizadoj" en Unesko kaj ĉeestas en ties palaco ĉiumonatajn kunvenojn. Li uzas ĉiam kaj ĉiel okazojn por komprenigi al la 70 asocioj partoprenantaj, ke Esperanto estas la sola vera solvo de la diverslingveca problemo. Per baloto li fariĝis membro de la administra komisiono, de tiu komitato. En Torino S-ro Petit, honora prezidanto de Internacia Asocio de Popoluniversitatoj, akiris gravan rezulton pri praktika uzado de Esperanto en la Popolaj Universitatoj. S-ro Rougetet informas daŭre komercajn kaj industriajn firmaojn kaj provas interesigi ilin pri nia afero sendante al ili diversajn broŝurojn kaj propagandilojn. El ĉiuj tiuj sciigoj oni konkludas, ke la jaro 1961 alportis al ni rezultojn vere kuragiĝajn, kaj rekompencantajn nian strebadon.

9) **Germanio.** Germana Esperanto-Asocio. Fine de 1961 GEA havis 2200 membrojn, 122 lokajn grupojn kaj 8 landajn ligojn. La oficiala organo de GEA, "Germana Esperanto-Revuo", aperis ĉiumonate kun 12 paĝoj (eldonkvanto 3000 ekz.). En 1961 la Gazetara kaj Radio-Servo dissendis 9 informilojn (entute 2400 ekz.) kaj registris 1664 gazetarajn publikigojn kaj 27 radio-intervjuojn aŭ informojn pri Esperanto. La asocio (estraro, ligoj, grupoj kaj unuopuloj) disdonis 175.000 propagandilojn kaj aranĝis 45 publikajn prelegojn, 50 ekspoziciojn kaj 100 kursojn. La somera kaj vintra eldonoj de la oficiala horaro (dufoje 80.000 ekz.) kaj de la horareto per longaj distancoj (dufoje 50.000 ekz.) de la Germana Federacia Fervojo enhavis klarigojn en Esperanto. La "Okcidentgermana Revuo" aperis ĉiun duan monaton en eldonkvanto de 19.000 ekz. Nova Zamenhofstrato estis nomita en Köln. La 39a Germana Esperanto-Kongreso okazis dum Pentekosto 1961 en Bad Hersfeld sub la honora protektado de la Ministro-prezidanto de Heslando, D-ro Zinn. Estis aranĝitaj studsemajno de la laborkomunumo de

Esperantaj instruistoj de Malsupra Saksujo en la hejmapopolaltlernejo Hustedt proksime de Celle kaj internaciaj semajnfinaĵoj renkontiĝoj en Tailfingen/Württ. kaj Oberkirch/Baden. La 5a Jarkunveno de la Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA), kiun ĉeestis esperantistaj fervojistoj el 8 landoj, havis lokon en Heidelberg. La Germana Esperanto-Junularo (GEJ), la junulara sekcio de GEA, organizis en 1961 la 6an Internacian Junularkunvenon sur Feldberg (Nigra Arbaro) kaj en Köln la 5an Internacian Seminarion pri la temo "Usono kaj Soveta Unio — Ĉu eblas kunezistado de la du kontraŭaj socisistemoj?" kun prelegoj de Profesoroj Lapenna kaj Laurat. Por tiuj ĉi renkontiĝoj kaj por la partopreno de siaj membroj en la TEJO-Kongreso en Wokingham GEJ ricevis konsiderindan ŝtatan subvencion.

10) **Hispanujo.** Hispana Esperanto Federacio. La membraro pligrandiĝas al 800 anoj. Ekzistas 16 lokaj grupoj aliĝintaj al H.E.F. kaj 10 nealiĝintaj. Depende de la federacio funkcias 4 sekcioj kiuj organizis ĉi-jare la Informoficejon. Funkciis 26 kursoj, inter ili la Kurso per Korespondado, entute 500 partoprenantoj. Kun rilato al H.E.F. ankaŭ laboras la Instituto de Esperanto en Barcelono. Bedaŭrinde nur ĉi-jare komencas funkcii H.E.F.-Informoficejo; malgraŭ tio la propagando pri Esperanto en la gazetoj kaj ĵurnaloj duobliĝis. La landa kongreso okazis en Palmo de Mallorca kiun ĉeestis proksimume 280 gesamideanoj, preskaŭ la duono estis eksterlandanoj. Ankaŭ okazis la XIII Internacia Fervojista Esp. Kongreso en Barcelono; partoprenis ĉirkaŭ 700 esperantistoj. Okazis pli-malpli 25 konferencoj, prelegis elstaraj samideanoj. 5 ekspozicioj montris klare al la publiko la gravecon de Esperanto. Nia federacio eldonas dumonatan bultenon sed ankaŭ Instituto de Esperanto en Barcelono, Madrida Esperanta Klubo, Valencia Esperanta Grupo, Sekcio Esperanta Sabadell kaj HEJS - la junulara sekcio de la Federacio eldonas regule bultenojn kaj informilojn.

11) **Italujo.** Itala Esperanto Federacio havis je la fino de 1961, 1525 membrojn en 50 lokaj grupoj. Laŭ statistiko de Itala Instituto de Esperanto, dum 1961 en 25 urboj okazis 55 kursoj diversgradaj je kies fino kelkcentoj da

personoj plenumis regulan ekzamenon. Nur malgranda parto de tiuj novaj fortoj aktive eniris nian Movadon, ĉar ne ĉiuj lokaj societoj ĝustagrade taksas la gravecon de tiucela daŭra klopodado. Danke al agado de nia Inform-Oficejo kaj al konstanta eldonado de presbulteno "Notiziario Internazionale", aperis proksimume 1200 artikoloj pri Esperanto en la nacia gazetaro. La ĉefaj temoj pritraktitaj estis laŭorde: — Aranĝo de Esperanto-kursoj (180 foje), interrilatoj de esperantista movado kun U.N.O. kaj U.N.E.S.K.O. (108 foje), nacia kongreso en Sanremo (91 foje), kandidatigo de U.E.A. al Nobel Pac-premio (84 foje), Universala Kongreso en Harrogate (58 foje), ktp. La artikoloj kontraŭaj al Esperanto estis nur 5 dum la tuta jaro. Aparte rimarkinda estas la bonsukceso de tutlanda plano por starigo de novaj Esperanto-stratoj. Ĝis nun estas 19 italaj urboj kiuj dediĉis straton al Esperanto kaj al ĝia aŭtoro. Je la komenco de la iniciato ili estis 3. Inform-Oficejo helpis ankaŭ la diskonigon de aktivecoj kaj celoj de Centro pri Esperanto en Komerco, Industrio kaj Turismo (C.E.K.I.T. en Milano) kaj sur nacia skalo propagandis la kursojn de la Lingvo. Oni projekciigis filmojn kun paroloj en la Internacia Lingvo; oni aŭdigis multfoje la sonbendojn pri U.K.; oni helpis diversmaniere la grupojn aranĝantajn apartajn manifestaciojn. En 1961 oni zoigis precipe la starigon de nova moderna fako: tiu pri "publikaj rilatoj" de itala E-movado kun neesperantistaj instancoj tutlandaj, celante intermiksiĝon utilan por ni en la estonto. Tiuj interrilatoj estas nun aparte bonaj kun la asocioj de Mondcivitanoj, Popolaj Universitatoj, E.N.A.L., A.C.L.I., Itala Centro pri Mondo, Asocio de Enigmistoj, Asocio de Akordionludantoj, k.a. Inter la multaj esperantistaj kunvenoj okazintaj en Italujo dum la pasinta jaro, atingis notindan sukceson la kunveno de esperantistaj italaj estraranoj en Milano (aprilo), la regionaj kunvenoj en Mantova kaj Vicenza (majo kaj junio) kaj la kunveno en Torino (septembro). Plie la XXXII-a Itala kongreso de Esperanto en Sanremo vekis favorajn eĥojn ĉie tra nia duoninsulo.

12) **Kanado.** Kanada Esperanto-Asocio. La membraro kreskis de 70 al 87 membroj. La grupoj de Toronto kaj Oakville, Ont., grupe aliĝis al KEA. Kanada Espe-

ranto-Revuo aperis kvinfoje en presita formo. Okazis 12 kursoj kun ĉ. 120 partoprenantoj. Aperis longaj, tre favoraj artikoloj pri Esperanto en gravaj gazetoj de Kanado. Multaj memlernantoj estis krome varbitaj pro la fakto, ke "Voĉo de Virinoj" rekomendas Esperanton por internacia korespondado. La 3-a KEA-Kongreso okazis en Forest, Ont., kiun partoprenis 23 samideanoj el Ontario kaj Quebec. Dum 1961 eldonis "Voĉo de Virinoj" (341 Bloor St. West, Toronto 5, Ont.) la libreton "Voĉoj de Paco", kiu priskribas la agadon de VdV dum la unua jaro de ĝia ekzisto. Speciale menciinda ŝajnas esti al ni la fakto, ke en tri lokoj, Winnipeg (Manitoba), Edmonton (Alberta) kaj Powell River (Brita Kolumbio), pro la rekomendo de "Voĉo de Virinoj" kursoj okazis, kiuj bone sukcesis, kvankam la kursgvidantoj jam delonge ne plu aktivis en nia movado. Ni klopodos helpi al tiuj freŝbakitaj esperantistoj, por ke ili fondu aktivajn lokajn grupojn. Pri la VdV-grupo en Winipego ĵus okazis tre bone prezentita kaj tutlande dissendita televida intervjuo pro la fakto, ke multaj anoj de tiu grupo lernas Esperanton. KEA-nun havas propran libroservon, kiun ĝi transprenis de Esperanto Press. La intereso por internacia lingvo dum 1961 ege kreskis, kvankam tio ankoraŭ ne reflektiĝas en la membronombro de nia asocio. Ni nun ricevas multe pli da seriozaj enketoj. La instruistoj de duagrada lernejo en Oakville ekz. venis al ni, por lerni la lingvon. Ili volas enkonduki ĝin ek de la venonta aŭtuno por lernantoj, kiuj certe ne sukcesos je la lernado de la franca, kaj oni volas science esplori la rezultojn atingitajn per Esperanto. La financa situacio de nia asocio krome pliboniĝis pro helpo de entuziasma lernantino, s-ino Henderson, ŝi verkis tre bonan artikolon, kiun la "United Church Observer" publikigis en pli ol 300.000 ekz. je la 15.2 (bedaŭrinde en tre mallongigita kaj falsigita formo). Tamen ni nun ricevas multajn enketojn pro tiu artikolo kaj ni publikigos la originalan artikolon. Krome aperos dum la venontaj tagoj 40-paĝa informa numero de KEA. Ni optimisme rigardas en la estontecon, ĉar la klimato por nia lingvo nun ŝajnas esti bona en Kanado.

13) **Madagaskaro.** Esperantista Asocio de Madagaskaro. La movado en ĉi tiu lando estas eta sed aktiva. Fondiĝis

ankaŭ junularsekcio "SEJEAM" (sekcio de junuloj de EAM). Okazis dum la jaro apartaj kursoj por komencantoj, progresintoj kaj junuloj. La 11-an de novembro S-ro Rasoanaivo faris en la Madagaskara radio dekmintutan prelegon en Madagaskara lingvo pri Esperanto. La 13-an de la sama monato S-ro Rousseau parolis dekkvar minutojn pri la Internacia lingvo en francalingva elsendo. La ĝenerala kunveno de EAM okazis la 11-an de novembro kun cento da ĉeestantoj.

14) **Nederlando.** Nederlanda Esperanto Asocio L.E.E.N. La nombro de sekcioj estis je la fino de la jaro 1961-a 26. La 1-an de januaro 1962-a nia Asocio nombris 927 membrojn (sekciajn kaj ĝeneralajn). Je tiu dato ĝi havis 294 donacantojn. La sekvantaj kursoj okazis en 1961: por gekomencantoj 15 (partoprenis 138 personoj), por geprogresintoj 15 (partoprenis 127 personoj), por infanoj 3 (partoprenis 39) kaj unu gazetkurso. Aperis en la nacilingva gazetaro de nia lando 77 artikoloj pri D-ro Zamenhof aŭ Esperanto kaj 90 mallongaj informoj pri Esperanto. 6 prelegoj por informi neesperantistojn pri nia lingvo okazis antaŭ proksimume 150 ĉeestantoj. Cetere la nederlandaj radio-stacioj disaŭdigis 14 radioprelegojn kaj informojn. 4 ekspozicioj estis organizitaj (kun proksimume 300 vizitantoj) kaj 2600 propagandbroŝuroj estis disdonitaj. Dum la jaro 1961-a multaj gesamideanoj en Nederlando laboregis kaj propagandis por disvastigi Esperanton. Ni povas konstati, ke la aktiveco en Nederlando estis kontentiga. La Nederlanda eldonejo "Bruna" en Utrecht eldonis la konatan nederlandan fotolibron "Kinderen kennen geen grenzen" en Esperanto-traduko "Infanoj ne konas limojn" kun antaŭparolo de Prof. D-ro Ivo Lapenna. La eldonisto Meulenhoff aperigis libron de la verkisto Maurits Dekker pri gravaj personoj en la monda historio. En tiu ĉi libro troviĝas ĉapitro pri D-ro Zamenhof kaj la Internacia Lingvo. La Anne Frank-Domo en Amsterdam eldonis flugfolion en sep lingvoj, el kiuj unu estas Esperanto. Katalogon enhavantan 137 diversajn Esperantajn titolojn presigis la libro-venda firmao N.V. De Arbeiderspers. Dum la jaro 1961-a realiĝis por nia Asocio sufiĉe grava afero, nome la reĝa aprobo koncerne la (novan) statuton. La poresperanta propagando per Esperanto-menukartoj

kaj tiurilataj anonciloj en diversaj internaciaj vagonaroj efektiviĝis en kunlaboro kun la belga, germana kaj svisa asocioj. En Groningen oni sukcesis starigi konstantan ekspozicion en la Instru-muzeo, kiun daŭre vizitas estontaj geinstruistoj. En Krommenie okazis Ferio-semajno, kiun ĉeestis partoprenantoj el 8 landoj. Samtempe okazis inaŭguro de la tiea Zamenhofstrato. Kiel kutime diversaj sekcioj donis laŭpove atenton al la Zamenhofvespero. Fine de la jaro la komunuma estraro en Dordrecht decidis doni al nova bela aleo la nomon de D-ro Zamenhof.

15) **Norvegujo.** Norvega Esperantista Ligo. Je la fino de 1961 Norvega Esperantista Ligo havis 22 lokajn grupojn kaj sume 639 membrojn. La Ligo havas apartajn komisiitojn aŭ komisionojn: por korespondaj kursoj (E.P. Naes), por blinduloj (S-ino Aa. Sletterod), por ekzamenoj (C. Støp-Bowitz), por turismo (Vidar Vilck), por instruistoj (Thormod Sund), por Lerneja Kampanjo (C. Støp-Bowitz), por gazetara servo (Ludvig Anjer), por propagando kaj informado (Ludvig Anjer), por radio (R. Bugge-Paulsen), por skoltaj (H. A. Rosbach), por interŝtataj organizaĵoj (R. Bugge-Paulsen), por junularo (Vidar Vilck). La Ligo havas sliparon pri ĉiuj personoj, kiuj lernis Esperanton en nia lando. La sliparo estas preskaŭ kompleta post 1930 kaj enhavas nun 9126 slipojn pri personoj en 664 lokoj en la lando. La Membrogazeto "Norvega Esperantisto" regule aperadis dum la jaro en 700 ekzempleroj. Okazis en la lando 18 kursoj kun 150 partoprenantoj. La korespondaj kursoj havis proks. 170 novajn lernantojn. Plie la skolta kaj la fervojista gazetoj aperigis kursojn. 7 personoj plenumis elementan ekzamenon. Okazis 1 radio-elsendo pri Esperanto. La Gazetara Servo dissendis 45 artikolojn al ĉiuj norvegaj taggazetoj kaj registris 903 aperojn en 108 gazetoj. Oni registris 9 propagandajn prelegojn en ne-esperantistaj medioj kun proks. 450 aŭskultintoj (varbprelegoj antaŭ kursoj ne estas enkalkulitaj). La nacilingva informgazeto "Esperanto-nytt" aperis per 4 numeroj kaj estis ĉiuforte dissendata en 10.000 ekzempleroj, i.a. al granda nombro da lernejoj: ĝi ankaŭ anstataŭas ordinarajn propagandbroŝurojn. Aŭtune 1961 Esperanto estis por la unua fojo oficiale kaj devige instruata eksperimente en du norvegaj gimnazioj, kun aprobo de la Instru-ministerio. En 1961 N.E.L. celebris sian 50-jaran

jubileon, unue per festkunveno en Oslo en la jubilea tago mem, la 27an de Januaro, kie ĉeestis i.a. 2 ministroj, la urbestro kaj 2 ambasadoroj, kaj due per jubilea landa kunveno en Oslo dum Pentekosto. Okaze de la jubileo la urba biblioteko en Oslo (Deichmanske) montris belan ekspozicion de Esperanta literaturo. Per bonvolaj donacoj de multaj membroj starigis Jubilea Kaso, kiu ebligis al ni diversaj aktivecojn dum la proksima tempo.

16) **Nov-Zelando.** Nov-Zelanda Esperanto-Asocio. Je la fino de 1961 la membraro de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio nombris 371 kaj aliĝintaj grupoj 19. Ekzistas ankaŭ pluraj malgrandaj studgrupoj, kaj multaj unuopaj Esperantistoj en kamparanaj lokoj tra la lando. Ĉiu grupo aranĝis almenaŭ du kursojn kaj la pli grandaj kluboj ĝis sep kursoj dum la studjaro de februaro ĝis novembro. Frue en 1961, efektiviĝis nova studplano por instruado de la angla lingvo en ŝtataj lernejoj. Laŭ ĝi, estas eble instrui lingvon al la pli lertaj geknaboj 11—12 jaraĝaj, por helpi la ekkomprenon de la angla lingvo. Tiu lingvo povas esti la franca, la maoria aŭ la Esperanta. La Nov-Zelanda Esperanto-Asocio helpas per du metodoj: ĝi organizas "rapidajn kursojn" dum la feriotempo por instruistoj kiuj volas komenci, kaj ĝi disponigis filmstriojn kaj sonbendojn al la Vid-Helpila Fakto de la Eduka Fakto. Aperadis regule en 500 ekz. la dumonata organo de NZEA "The New Zealand Esperantist". La gazetaro raportis bone pri Esperanto dum la jaro, kaj pli ol 250 artikoloj kaj informoj aperis. NZEA okazigis "La Tago de la Libro" je 26-a julio, kaj antaŭe sendis librojn al la kluboj por elmontrado al la anoj. Rezulte de tio, libroj je valoro de pli ol £ 110 estis venditaj. La Kongreso okazis ĉe Wanganui de la 28-a de decembro ĝis la 1-a de januaro kaj partoprenis 63 anoj, inter la vizitantoj estis la Urbestro kaj loka parlamentano.

17) **Pollando.** Pola Esperanto-Asocio. En la jaro 1961 oni fondis 5 regionojn, kiuj estas jenaj: Orienta en Varsovio, Suda en Krakovo, Silezia en Katowice (Dąbrowa), Okcidenta en Vroclavo kaj Norda en Gdańsk. Tiuj regionoj estris 54 lokajn filiojn kun 3100 individuaj membroj, el kiuj pli ol 280 estis MA de UEA. Krome en pluraj 26

urboj ekzistas rondoj kaj grupoj, do entute la reto de la movado ampleksis 80 lokojn. Aktivaj estis 5 sekcioj: instruista, fervojista, sciencista, katolika kaj junulara. El la komisionoj ĉe la Cefestraro daŭrigis sian agadon jenaj buĝeta, eldona, propaganda kaj por statutsaĝo. Landa Kunveno okazis en aprilo en Vroclavo kun partopreno de 600 aliĝintoj kaj eksterlandaj delegitoj. Estis gvidataj 100 kursoj elementaj kun ĉirkaŭ 1400 gelernantoj kaj unu koresponda kurso kun 100 partoprenantoj. Funkciis 10 lektoratoj ĉe superaj lernejoj, nome en Białystok, Cieszyn, Gdańsk, Gliwice, Krakovo, Lublin, Łódź, Poznań, Toruń kaj Varsovio. Oni instruis E-on en 80 mez- kaj popollernejoj kun 3100 gelernantoj; inter ili estis 2 mezlernejoj kun degiva objekto kaj 50 lernejoj kun oficiale instruata objekto. La popollernejo n-ro 4 en Varsovio ĉe str. Nowolipie 8 ricevis nomon de d-ro Zamenhof kaj marmoran memortabulon. Ankaŭ 2 antaŭlernejoj enkondukis E-on, nome en Białystok kaj Varsovio. Oni fondis ankaŭ la interlernejan klubon. Pola Radio en Varsovio disaŭdigis ĉiutagan programon. Ankaŭ Pola Radio en Gdańsk kaj Świecin disaŭdigis ĉiutage 15-minutan programon kaj Pola Radio en Łódź elsendis E-an programon unufoje en la monato. En multaj ĵurnaloj kaj revuoj aperis 860 notoj kaj informoj kaj 36 artikoloj, i.e. 6 kontraŭ E. Nur en I.K.P. en konstanta rubriko aperis 288 informoj. En 3 revuoj oni gvidis kurson. Pola Televido donis en sia programo unu teleturniron kaj filmon "Sub verda stelo" kaj portreton de Zamenhof. Dum la Internacia Librofiro oni aranĝis ekspozicion kaj librostandon. Krome okazis 3 ekspozicioj: en Sosnowiec, Gdańsk kaj Jaworzno. Dum la Internacia Foiro en Poznań funkciis esp. informejo — stando. Varsovia filio iniciatis serion da surbendigitaj telefonaj intervjuoj kun multaj eminentuloj kaj serion da prelegoj dum instruistaj konferencoj kaj en kulturdomoj. Al turismaj iniciativoj apartenis ekskursoj al Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo kaj Hungarujo. Instruista sekcio aranĝis 2 specialajn kursojn de E. por instruistoj en Gdańsk kaj Tczew kaj ankaŭ ekzamenojn por instruantoj en Vroclavo. Somere okazis 2-semajna ferio-kurso en Straconka (Silezio) kun partopreno de 50 geinstruistoj, kaj vintre landa kunveno en Varsovio. La sciencista sekcio prilaboris 2000 terminojn kun difinoj al elektro-

teknika vortaro por Intern. Elektrotekn. Komisiono en Genevo. La junulara sekcio organizis internacian renkonton en Wisła (Silezio) kaj tutlandan kunvenon en Bydgość kun 200 partoprenantoj, kaj kune kun Asocio de Kampara Junularo kunvenon de kamparaj Esperanto-kursanoj de revuo "Nowa Wieś" (Nova Vilaĝo), kiuj organizis sian klubon. La 46-an U.K. en Harrogate partoprenis oficiala delegacio kaj sonraportisto de Pola Radio. En decembro okazis en multaj urboj, i.a. en Varsovio, Bochnia, Gdynia, Kalisz, Krakovo, Lublin, Łódź, Nowy Targ, Opole, Ścin kaj Vroclavo solenaj vesperoj memore al Zamenhof; en Varsovio partoprenis kantistoj de Stata Opero. Al pluaj stratoj, kiuj ricevis nomon de d-ro Zamenhof, apartenas stratoj en Półna, Kłodzko, Dzierżonów kaj placo en Vroclavo. Krome en Kłodzko oni nomis parkon de Esperanto. En multaj filioj, precipe en Gdańsk, Varsovio kaj Vroclavo okazis laŭ rekomendo de UNESCO serioj da vesperoj dediĉitaj al fremdaj naciaj kulturoj kun prezentado de mallargbendaj filmoj. En prelegvojaĝoj de alilandaj s-anoj partoprenis i.a. Anton A. Leenhard el Nederlando, prof. Boža Popović el Jugoslavio kaj d-rino Rosa Scolnik el Argentino. En Varsovia klubo prelegis prof. Egami el Japanujo kaj s-ano N. Collier el Aŭstralio. Al revuoj, kiuj aperis daŭre, apartenis dumonata esp.-lingve presita "Pola Esperantisto", unu n-ro de "Paco" kaj 2 multobligitaj bultenoj: "Kune" (de varsovia filio) kaj "Tamen" (junulara). El libroj oni eldonis lernolibron de prof. Sygnarski en Krakovo (3000 ekz.) kaj reeld. vortaron de Turno (3000 ekz.) Orienta regiono eldonis novan belan afiŝon (6000 ekz.) kaj afiŝan elpendigaĵon por aŭtobusoj (5000 ekz.).

18) **Svedujo.** Sveda Esperanto-Federacio. Ĉ. 2000 membroj apartenas al 50 kluboj. En la jaro la junulara sekcio energie agadis kaj prilaboris la organizan sistemon. Ĝi aperigas nun regule specialan informilon por gejunuloj. Inter aliaj aktivigis la sekcio de instruistoj kaj nova tutlanda studgvidanto funkcias. La informa fako registris ĉ. 1000 artikol(et)ojn pri Esperanto en la sveda gazetaro kaj notis 226 prelegojn antaŭ 14500 neesperantistoj. Pluraj afiŝoj kaj broŝuroj, entute ĉ. 20.000 diversspecaj informiloj, inter ili nova informbroŝuro, estis distribuitaj al

diversaj grupoj kaj unuopaj personoj. Pere de 4 ekspozicioj 163000 personoj havis eblecon ricevi informojn pri Esperanto. La nacilingva informilo "Esperanto-Nytt" - (Esperanto-Novaĵoj) aperas 4-foje jare kaj informas aŭtoritatulojn. La Federacia jarkongreso okazis en Linköping kun bonega programo. I.a. prelegis s-ino Roma Thorsen, Kopenhago, Danujo, pri la E-instruado en sia lernejo. Speciala, svedlingva numero de la federacia gazeto kun diversspeca enhavo estis sendita al ĉiuj parlamentanoj. Gesoj Hamvai el Nov-Zelando vizitis komence de la jaro Svedujon kaj bonege informis pri Esperanto i.a. en lernejoj, pere de pluraj gazetintervjuoj ktp. Eldona Societo Esperanto pretigis la libron "Kredo, floroj kaj dinamito", prezentado de tri svedaj pioniroj de divers-tipaj kulturoj.

19) **Svislando.** Svisa Esperanto-Societo. Granda bato por la komitato estis la morto de nia sekretariino sinjorino H. Fischer. Estis necese reorganizi diversajn servojn. En 1961 grava tasko estis la preparoj por la jubilea jaro 1962. Tiu laborplano enhavas i.a.: dum la tuta jaro oficialan aplikadon de du jubileaj poŝtstampiloj kun la bildo de Zamenhof kaj la teksto "75 Jahre internationale Sprache Esperanto", eldonadon de jubilea flugfolio, presigon de Esperanto-poŝkalendaretoj 1962 kun citaĵoj, solenaĵoj dum la ĝenerala kunveno, memorigajn artikolojn en la gazetara bulteno "Esperanto-Information", intervjuon en la radio, informadon de la universitataj profesoroj, vendadon de korespondaj kursoj je reduktita prezo, disponigon de diapozitivoj por aranĝi paroladojn kun lumbildoj. La komitato korespondis kun ĉiuj svisaj urboj por nomigi straton memore al Zamenhof aŭ Esperanto. La grundo ne estas ankoraŭ matura por akceptigi tiun proponon. La pedagogiaj redakcioj ricevis dokumentaron pri la signifo de la Esperanto-instruado en la lernejoj. Momente estas formata patrona komitato por la enkonduko de Esperanto kiel deviga fako en la lernejojn. Okazis du regionaj kunvenoj: La Sagne NE (21/22.10.61), kaj Herisau (25/26.11.61) kun programeroj por neesperantistoj. Principo: krei eksterajn kontaktojn kaj informi la publikon. Ekzamenoj okazis dum la ĝenerala kunveno 1961 en Zürich kaj dum la feriosemajnoj Münchenwiler.

Rezulto: 5 atestoj pri lernado, 2 superaj diplomoj. Pro la morto de s-ro Jayet, nia arkivo heredis la bibliotekon de la grupo Morges. La ekspozicia servo disponigis dufoje materialon. La gazetara bulteno "Esperanto-Information" aperis 6-foje: la redakcioj ricevas ĝin regule. "Svisa Espero" havis 6 numerojn. La nova rondo "Esperanto-amikoj de Svislando" (neparolantoj de Esperanto) bone progresas: ĝi nun nombras 70 pagantajn simpatiantojn. S-ro d-ro Hamvai el Novzelando prelegis publike en diversaj urboj. Grupa vivo. Menciinda estas la aktiveco de la Esperanto-Societo Zürich. Monataj kunvenoj kun interesaj programoj, krome dufoje semajne liberaj kunvenoj. S-ro Mischler (Zürich) eldonis murkalendaron en Esperanto kaj fondis per la profito sonbendbibliotekon por esperantistaj blinduloj. S-ro Laederach gvidas kurson en la popoluniversitato Zürich. La Esperanto-Grupo Basel metis montrakeston en la stacidomon kiel indikilon por turistoj kaj interesuloj. Aranĝis kurson por instruistoj. Kunvenoj monate. Aktivis grupoj en Bern (kurso en la metiista lernejo kun 20 lernantoj, kunvenoj dufoje monate), en St. Gallen (monataj kunvenoj), en Neuchâtel (monataj kunvenoj), en Langenthal (kurso kun 4 lernantoj) en Herisau (kunsidoj dufoje monate), en Luzern (kurso kun 4 lernantoj) kaj en Genève (kurso kun 30 lernantoj). La Tiĉina Esperanto-Ligo preparas la duan eldonon de koresponda kurso. En la kadro de la Eŭropaj Tagoj en Bellinzona (2-5.11.61) la Ligo aranĝis Esperantostandon, kie oficis esperantistoj. Radio, televido kaj gazetaro raportis favore. Membrostato: 22 aktivaj, 9 pasivaj. "Tiĉina Ligilo" aperis 4-foje. Grupoj en Bellinzona, Locarno kaj Chiasso. Fakgrupoj. Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj sukcese instruas Esperanton per korespondaj kursoj. Organizis kurson en la komerca lernejo Aarau kaj en Rapperswil SG. Aranĝis internacian feriosemajnon sur Herzberg kun 30 partoprenintoj el 5 landoj, grandparte neesperantistoj. Afiaŝis Esperantaĵojn en montrakestoj lokitaj en 11 stacidomoj aŭ personaraj ripozejoj. SAEF-bulteno "Svisa Fervojisto" aperis 6-foje. TANEF (esperantistaj naturamikoj): Vigla sekcio en Zürich kun monataj kunvenoj. Kurso por komencantoj. Esperanto-Edukistaro de Svislando aranĝis brilan mani-

festacion en La Sagne (22.10.61) kunhelpe de lerneja klasoj: ekspozicii samtempe pri la Unuiĝintaj Nacioj. Eldonis 500 presitajn raportojn pri la Esperanto-instruado en la lernejoj. Kolektas subskribojn de personoj, kiuj favoras Esperanton en la lerneja programo. Specialaj aktivecoj: Radio Schwarzenburg kurtonda servo, 4-foje po semajno paroladetoj en Esperanto (prof. Privat, d-ro Baur). FERIAJ kultur-Semajnoj Esperanto kaj Geonismo en la kastelo Münchenwiler. D-ro William Perrenoud organizis en aŭgusto someran forumon pri la temo: Tekniko, humanismo, poezio. Partoprenis 40 personoj. La svisa esperantistaro elspezis en 1961 entute 16.000 frankojn por la movado (kotizoj, donacoj, libroj ktp.); po membro meze 46 frankojn. Jen signo de oferemo kaj esperantisteco!

20) **Urugvajo.** Urugvaja Esperanto-Societo. Nombro de la membroj kaj evoluo de agado dum 1961 restis praktike senŝanĝa. Okazis 3 kursoj en la ĉefurbo kaj po 1 en Colonia kaj Paysandu. Aperis tri numeroj de la societa organo "Boletín Urugvajo de Esperanto". La junula sekcio aranĝis montradon dum unu monato de esperantaĵoj (libroj kaj aliaj presaĵoj de grava signifo) en unu el la vitrofenestroj de la komuna oficejo de turismo. Oni intensigis la interesigon de la instruistaro al Esperanto, kaj al kunlaboro en "Grajnoj en vento" aparte zorgitan de nia estrarano s-ro Barrocas. Oni intencas same vekti atenton ĉe la fervojistoj. Deko partoprenis kolektive la 16-an Brazilan Kongreson de E. en Porto Alegre. Je la fino de la jaro la Societo havigis al si novan sidejon en plena ĉefurba centro, kie rimarkindas digna kaj oportuna atmosfero por regula funkciado, ĉe "Centro Republicano Español". Espereble la agado en la jaro 1962 estos fruktedona en maniero pli efika kaj abunda.

II. NEALIGINTAJ LANDAJ ASOCIOJ

1) **Ĉeĥoslovakio.** Ĉeĥoslovaka Esperanto-Komitato. En la jaro 1961 daŭrigis CSEK sian agadon je organiza kunordigo kaj plua firmigo de enlanda movado. Je la fino de la jaro estis ĉe CSEK registritaj 113 Esperanto-rondoj, kiuj laboras ĉe uzinaj kluboj de laborista sindikata mo-

vado (proksimume 1 duono) aŭ ĉe lokaj klerigaj institucioj kaj societaj organizaĵoj (ankaŭ 1 duono). La nombro de aktivaj membroj en la E-rondoj estis 3.100. Ekster la E-rondoj, precipe en malgrandaj lokoj, kie ne ekzistas E-grupoj, estas sufiĉe granda nombro da unuopuloj-esperantistoj. Sekve de tio oni povas taksi la nombron de aktivaj esperantistoj ĉirkaŭ 5.000. Plej agemaj estas la pli grandaj E-rondoj en regionaj urboj, sed ankaŭ en distriktoj estas pluraj tre viglaj grupoj (ekz. Teplice v. Č., Kolín, Jihlava, Třebíč, Martin k.a.). Kiel favoran fenomenon oni povas do noti moderan kreskon de la movado, sed malagrabla en lasta tempo estas la manko de organiza agemo inter la esperantista junularo kaj daŭra manko de fakte agemaj, seriozaj funkciuloj. Okazis 71 kursoj kun 742 gelnantoj ĉe la klerigaj aŭ sindikataj institucioj, kie laboras la E-rondoj. La intereso pri la Internacia Lingvo, precipe inter la junularo estas ĉiam tre vigla, kion pravas grandaj postuloj je la lernolibroj kaj vortaroj. Speciala informa fako ne estis fondita, kaj la taskon praktike plenumis la redakcia rondo de la "Informoj de CSEK", kiu ricevis ĉiujn informojn pri la movado el la eksterlando kaj la raportojn pri ĉefaj aranĝoj el la E-rondoj. "Informoj" (eldonkvanto 1.200 ekz.) aperis dum pasinta jaro trifoje. La artikoloj kaj instrukcioj por la funkciuloj de klerigaj kaj sindikataj institucioj kaj de E-rondoj aperas en ĉeĥa kaj slovaka lingvoj. Komence de la 8-a numero aperas la "Informoj" presite kaj enhavas ankaŭ esperantlingvan parton precipe pri la novaĵoj el CSSR kaj pri la agado de E-rondoj por informado al eksterlando. La MEM sekcio eldonis 2 numerojn de internacia gazeto PACO kaj kunlaboris je la gazeto AŬRORO, kiun eldonas Ĉeĥoslovaka Asocio de Invalidoj por blindaj esperantistoj en 36 landoj. La plej aktivaj kluboj, ekzemple en Praha, Třinec, Jihlava, Bratislava, Brno, Liberec, Hradec Králové, Ústí n. Lab., eldonis siajn bultenojn, el kiuj plej gravaj estas la Bulteno de EK Praha kaj Fajrero de EK Třinec. La Ĉeĥoslovaka gazetaro aperigis 47 artikolojn aŭ menciojn pri Esperanto en diversaj gazetoj, kiuj escepte de 3 kazoj estis favoraj. Bonaj rezultoj estis atingitaj en la eldona agado, kiam dum la jaro 1961 aperis sinsekve en la Eldo-

nejo pri sporto kaj turismo unua esperantlingva eldono de la Gvidlibro tra la ĉefurbo Praha kaj en Ŝtata pedagogia eldono la lernolibro de Kilian kaj la ĉ-e k. e-ĉ poŝvortaro de Hromada. Ĉiuj tri publikaĵoj (eldonkvanto po 3000 ekz.) estis preskaŭ tuj disvenditaj. Sekve de vigla intereso pri la broŝuro "JUĜU MEM!" — Faktoj pri Ĉeĥoslovakio, estis en ŝtata eldono ORBIS preparita por preso la reverkita kaj ilustrita dua eldono, kiu enhavas ankaŭ la novan konstitucion de ĈSSR. Krom tio estis eldonitaj diversaj afiŝoj, flugfolioj, prospektoj, poŝtkartoj kaj glumarkoj (laŭ speciala raporto). Dua seminario por funkciuloj kaj instruistoj de E-rondoj el la tuta lando okazis de la 24-27-a de junio 1961 en Frýdlant n/Ostr.; partoprenis ĝin 80 esperantistoj. Somera Esperanto-Tendaro (SET) estis denove aranĝita en Lančov. En du sinsekvaj 14 tagaj etapoj de la 16-a de julio ĝis la 12-a de aŭgusto partoprenis po ĉ. 60 lernantoj, plejparte ĝejnuloj. La preparita Somera Esperanto-Kolegio en Trenč, Teplice pro organizaj malhelpoj ne efektiviĝis. En pasinta jaro okazis ankaŭ kelkaj regionaj kunvenoj, pluraj publikaĵoj prelegoj kaj ekspozicioj. En internaciaj rilatoj, ĉeĥoslovakaj esperantistoj akceptis multajn eksterlandajn gastojn, ekz. al la ĉefurbo Praha alvenis 83 vizitoj, inter ili kelkaj plinombraj grupoj. En la internaciaj kongresoj estis ĈSSR reprezentita nur je la kongreso de INEVKOM en Budapeŝto, post kiu estis fondita enlanda Virina Komisiono disvolvanta jam sian agadon por la mondpaca movado. Tre favore notinda estas la kunlaboro kun la organoj de UEA, kiuj atentis la ĈSEK kiel validan reprezentanton de la ĉeĥoslovaka Esperantomovado. Kiel specialajn atingojn oni povas taksi: 1) la eldonon de unua poŝtmarko kun Esperanta teksto en Ĉeĥoslovakio por propagandi la Tutmondan ekspozicion de poŝtmarkoj PRAGA 1962, kiu okazos fine de aŭgusto 1962; 2) okazigon de 4 Esperantaj radioprogramoj kaj preparo de interkonsento kun la Ĉeĥoslovaka disaŭdigo pri regula ĉiumonata elsendado en kaj pri Esperanto por eksterlando.

2) **Hungarujo.** Hungara Esperanto-Asocio. Nombro de membroj: 1400, lokaj grupoj 65 kaj departementaj komitatoj 12. Nombro de kursoj por plenaĝuloj 42, partopre-

nantoj 630, du kursoj por pedagogoj, partoprenis 120 personoj, kursoj por ĝejnuloj kaj ĝelernantoj: 33 ĉefe en lernejoj -570 personoj. Informa kaj propaganda laboro: 5000 propagandaj afiŝoj disdonitaj inter ĝelaboristoj kaj ĝelernantoj. 2000 ekz. propaganda kajereto pri Esperanto, en 1200 ekz. ni eldonis la leteron de Janos Kadar ĉefsekretario de la Hungara Socialista Laborista partio, la unua ĉefministro de la Hungara Parlamento. La letero estis sendita al la gvidanto de HEA, en kiu li aprobis la laboron de esperantistoj en la pacmovado. En la nacilingvaj taggazetoj kaj revuoj aperis 180 alvokoj, artikoloj pri Esperanto. Du konferencojn ni faris por la landa komitato, unu ĝeneralan kunsidon por fari raporton pri la dumjara laboro; unu internacian konferencon por virinoj, kiun partoprenis s-inoj el 6 diversaj landoj. Prelegoj, ekspozicioj, eldono de gazetoj, revuoj: la gvidantaranoj de HEA 15-foje faris prelegojn, parte en la budapeŝtaj, parte en la provincaj grupoj pri diversaj temoj Esperante. En la lokaj grupoj estis aranĝitaj 80 pli-malpli grandaj ekspozicioj. Ni eldonas monatan informilon en 2000 ekzempleroj por la anoj senpage, kaj kvaronjaran revuon ilustritan en 5000 ekzempleroj. 4 departementaj komitatoj eldonas periodajn informilojn en 250-300 ekz. Lernolibro estis eldonita en 5500 ekz. (kiuj dum 3 monatoj elĉerpigis). Oni eldonis poŝvortaron Esperanta-Hungaran, Hungara-Esperantan en 5000 ekz. La 23-an de julio 1961 en urbo Szeged ni inaŭgure malfermis la unuan landan Esperanto-muzeon. Samtempe en la sama domo ni faris ankaŭ grandskalan ekspozicion, kiun vizitis el la lando pli ol cent homoj, ankaŭ el diversaj eŭropaj landoj pli ol 70 gastoj. La 16-17-an de septembro en urbo Pecs ni faris landan renkontigon kun pli ol 400 partoprenantoj. De 29-30-a de oktobro 1960, la karaktero de la Esperantomovado en Hungarujo ŝanĝiĝis. La ĝis tiam vivanta konsilanta formo por nia movado jam ne plu estis konvena. Pere kaj apogante de niaj superaj instancoj, ni komencis organizi asocion, kaj dum jaro la nombro de anoj kreskis al pli ol 1400. Ni eldonas kvaronjaran revuon ilustritan "Hungara Vivo" kaj monatan informilon "Hungara Esperantisto".

3) **Israĥelo.** Esperanto-Ligo en Israĥelo. En 1961 E.L.I

havis 160 membrojn. Ĝia prezidanto estas mag. Isaj Dratwer. Dum la jaro okazis kursoj en Kfar-Saba, Herclija, Kfar-Ata, Hajfa, Petaĥ-Tikva, Tel-Aviv, Kibuc-Hacor, Saar Hagolan. Ekspozicioj okazis en Bejt Hahis-tadrut, en Simĥat Tora kaj en Tel-Aviv. ELI faris in-forman laboron ĉe oficialaj instancoj kaj turnis sin tiu-cele i.a. al ministerioj, akademioj kaj presagentejoj.

III. FAKAJ ASOCIOJ ALIĜINTAJ

Internacia Scienca Asocio Esperantista. Dum la jaro 1961-a ISAE havis en sia laboro grandajn malfacilaĵojn. La organo de la Asocio, Scienca Revuo, travivis plej grandan krizon post sia ekapero. La ĝisnuna eldonisto aperigis nur du numerojn por la jaro 1960-a, kaj ISAE mem ne povis tuj solvi ĉiujn komencajn malfacilaĵojn (la redaktoro, la redakta komitato, manuskriptoj, presejo) por ekaperigi la revuon por la jaro 1961. Pro granda malfruo de la revuo, multaj membroj pagis nek la abonon nek la kotizon, pro kio oni ne scias ĝuste ĉu la membro-nombro malkreskis de antaŭaj 460 (ĉar en la eksteror-dinara situacio oni ne povas opinii, ke ekŝiĝis ĉiuj kiuj ne pagis la kotizon — eble ili pagos baldaŭ). Aliflanke la Estraro de ISAE efektivigis la antaŭan decidon apartigi la oficialan organon de la ĝenerala revuo, aperiginte en aprilo 1961-a la unuan numeron de "Bulteno de ISAE kaj de ĝiaj sekcioj". En 3 aperigitaj numeroj oni pritraktis la organizajn problemojn inter scienculoj, paralele kun la klopodoj ke fakaj societoj esperantistaj fariĝu mem-staraj sekcioj de ISAE. Granda laboro kaj financaj rime-doj de ISAE estis disponigitaj ne nur al la membroj, sed ankau al ĉiuj fakuloj kiuj povus esti membroj de ISAE. Pro tio la unuaj 3 numeroj de la Bulteno estis senditaj al 1800 fakuloj, precipe al medicinistoj, arkitektoj, kon-struistoj, juristoj, geografoj, ktp. La efikon de ĉi tiu la-boro oni povos vidi nur en la sekvantaj jaroj, kiam ankau la revuo reguligos sian aperadon. ISAE multe klopodis kolekti sub la komuna tegmento ĉiujn fakajn societojn kies agado estas ligita kun diversaj sciencaj branĉoj. En tio ĝi nur parte sukcesis, ĉar geografa societo (IGA) rifu-zis aliĝi al ISAE kaj medicinista societo (UMEA) ankoraŭ ŝanceliĝas (la findecido prokrastita por la ĵarkunveno

1962). Nur arkitektoj kaj konstruistoj (ISAKE) decidis aliĝigi ĉiujn siajn membrojn individue al ISAE kaj la juristoj (IAJE) forte rekomendis tion al ĉiuj siaj mem-broj. Krom tio la elektrista kunveno en Harrogate decidis fondi la elektristan societon tuj kiel fakan sekcion de ISAE. Oni antaŭvidas kreon de aliaj fakaj sekcioj tiel ke la nombro de la sekcioj tamen kreskas kaj oni povas esperi ke baldaŭ preskaŭ ĉiu membro de ISAE aparte-nos al iu faka sekcio kaj ke ĉiuj fakaj societoj estos sekcioj de ISAE.

La **Terminologia Centro** daŭrigas regule sian laboron. Krom la kunlaboro kun Akademio de Esperanto por preparo de Plena Ilustrita Vortaro, la Centro kaj ĝiaj kunlaborantoj finpreparis 2 terminarojn por publikigo kiel provizoraj terminaroj. La terminaroj estos multo-kiel bligitaj per financaj rimedoj de la fondaĵo "Scienco" kaj senpage disponigitaj al interesigantaj membroj. La lan-daj filioj ekzistis en Francujo, okc. Germanujo, Japanujo, Jugoslavio, Nederlando.

1) **Internacia Asocio de Juristoj-Esperantistoj.** En la komenco de la jaro 1962 la Asocio havas entute 95 mem-brojn en 27 landoj (pasintjare 90 en 25 landoj). Kreskan-ta nombro, nun pli ol 30, fariĝis fakdelegitoj pri juro de UEA. Restas tamen ankoraŭ multaj juristoj ekster IAJE, kaj la Plenuma Komitato daŭrigas siajn klopodojn pluni-versaligi la Asocion, kiu jam nun kontentigas multajn bezonojn de juristoj por internacia faka kontakto. Tiucele treege grava estas la membrolisto kun tre detalaj scii-goj pri ĉiu unuopa membro, donitaj laŭ dissenditaj de-mandaroj, kiun publikigis la Asocio en 1961. La kontakto inter la Plenuma Komitato kaj la membroj okazis per cirku-leroj kaj dokumentoj aperintaj laŭ la okazoj. La Asocio daŭre estas en tre bonaj rilatoj kun la Unuiĝo de Inter-naciaj Asocioj en Bruselo. Ĝi estas akceptita faka sek-nacio de Internacia Scienca Asocio Esperantista kaj kiel tia reprezentita en ties komitato. Por plifirmigi la recipro-kajn treege bonajn rilatojn de UEA kaj de IAJE kaj kreskigi la influon de IAJE en UEA, la Asocio petis de UEA la akcepton de IAJE kiel aliĝinta asocio. Per la de-cido de la Komitato de UEA en Harrogate, IAJE estis akceptita kiel la dua aliĝinta asocio. La klopodoj pril-a-

bori la junajn terminojn en Esperanto estis daŭrigataj. En baldaŭa estonteco aperos juraj tekstoj, kiuj servos kiel modeloj por jura lingvouzo en Esperanto. Enkadre de la Universala Kongreso en Harrogate la Asocio okazigis sian trian publikan diskutan kunvenon kun la temo "La respondeco de la aŭtoposedanto". Ankaŭ tiu ĉi kunveno havis kontentigan sukceson. Ĝin sekvas enkadre de la Universala Kongreso en Kopenhago, 1962, diskuta kunveno pri la koncepto de la propio kaj ĝiaj ĉefaj limigoj en la diversaj landoj. La Asocio laŭ la eblecoj ankaŭ estonte publikigos detalajn raportojn pri la temoj de diskuto.

IV. FAKAJ ASOCIOJ KUNLABORANTAJ

1) **Esperanta Sak-Ligo Internacia.** Ĝis fino de 1961 ESLI registris 600 adresojn el 41 landoj. Ankoraŭ ne estas solvita la demando pri organizo de blindaj ŝakistoj. Ek de julio 1961 aperas kvaronjara bulteno de ESLI, titolita "Esperanta Sako". Provizore ĝi aperas en tro modesta formo, nur dupaĝa, multobligita. Sed la dua numero aperis en 700 ekzempleroj. ESLI daŭre organizas korespondturnirojn en grupoj po 7 ŝakistoj. En decembro 1961 ekstartis la 17a grupo, kaj venis jam kelkaj aliĝoj por venontaj grupoj. La sekretario de ESLI gvidas la ŠAKAN RUBRIKON en revuo "Esperanto". Tiu rubriko aperis 6-foje dum jaro 1961. Ĝia legantaro daŭre kreskas. La konkurso pri solvado de problemoj (entute aperis 7 problemoj) partoprenis 75 gesamideanoj el 27 landoj. Estas sufiĉe granda nombro, se oni konsideras, ke ne ĉiu ŝakisto interesiĝas pri solvado de problemoj. Kaj post apero de la unua problemo el konkurso 1962 aperis inter solvantoj jam kvin tute novaj nomoj. La rezultato de konkurso 1961 aperis en junio en "Esperanto". En "Nuntempa Bulgario" daŭre aperas neregula ŝaka rubriko, gvidata de la redakcio. Ĝi atentigas precipe nur bulgaran ŝakon, sed tio estas tre grava por ni — precipe en 1962, kiam la XVIa Saka Olimpiado okazos en Bulgarujo. Eĉ dum la 46a UK en Harrogate okazis ŝaka kunveno. La ĝisnunaj ŝakaj kunvenoj (ek de 1957) estas ĉiam vizitataj de 10-25 gesamideanoj. La ĝisnunaj kunvenoj sukcesis malgraŭ tio, ke ni ne faris tro grandan antaŭan propagandon inter

esp. ŝakistoj opiniante, ke ĉiu kongresano legas la programon kaj elektas programeron, kiu lin interesas. Sed ni spertis, ke kelkaj ŝakistoj, partoprenintaj la kongreson, tute ne sciis pri ŝaka kunveno. Do por la ŝaka kunveno dum 47a en Kopenhago ni faras preparojn jam ek de nun. Dependos de la nombro de partoprenantoj, ĉu ni povas organizi pli grandan programon (matĉon kun iu dana klubo, rapidludan turniron ktp.) En jaro 1962 ni intensas atingi publikigon de artikolo pri nia laboro en la oficiala organo de Internacia federacio de ŝakistoj (FIDE).

2) **Internacia Geografa Asocio.** Je la jarfino la asocio nombris 304 membrojn en 31 landoj; nur malgranda pligrandigo. Kiel faka sekcio ekzistas MERI ("Marista sekcio"), kiu ankaŭ montras bonan evoluon: ĝin gvidas S-ro K. Ruig, P. de Hoochstraat 50/I, Amsterdam-Z., Nederlando. La plej grava tasko de la asocio ankoraŭ estas la partopreno de kelkaj membroj en la komisiono por ordigo de geografiaj nomoj. La temporaba laboro rezultis en preskaŭ-preteco de listo kun la plej gravaj nomoj aperantaj en la fizika mondmapo. Geografia Semajno okazis en Leicester (Britujo) dum la semajno post la U.K. kun 20 partoprenantoj. La faka kaj kultura programo estis tre altnivela pro la kunlaboro de multaj fakuloj. La jarkunveno okazis dum la U.K. en Harrogate. En ĝi oni pritraktis la starigon de centro de geografia dokumentado, kiun prizorgos la sekretario. Cetere oni aplaudis la progreson de la asocio, kaj rajtigis la estraron fari ĉiujn necesajn paŝojn por plia plifortigo. La prezidanto preparis ekspedicion al pluraj landoj de Afriko. Tiu karavano vojaĝos sub aŭspicioj de la asocio, kaj forveturos en la komenco de 1962. La interkontakto inter estraranoj kaj anoj kontentige evoluas, malgraŭ la multfoje okazantaj prokrastoj, kiujn kaŭzas la foresto de prezidanto kaj sekretario, ambaŭ fakuloj profesiaj.

3) **Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj.** Je la fino de nia oficiala jaro, julio 1961, la membro-asocioj, kiuj formas I.L.E.I. estas 14: Aŭstralio, Aŭstrujo, Britujo, Bulgarujo, Finnlando, Francujo, Germanujo, Italujo, Japanujo, Jugoslavio, Nederlando, Pollando, Svedlando,

kun krome oficialaj reprezentantoj en 6 landoj: Belgujo, Hispanujo, Israelo, Maroko, Urugvajo, Usono. Laŭ statistiko ricevita de 18 el la 20 landoj, estas 2641 membroj, plejparte profesiaj geinstruistoj, aktivaj kaj emeritaj. Nia reprezentanto en Algerio denove povos aktivigi. Usono starigis asocion, kies aligon ni atendas. Danlando ne havas organizitan instruistan grupon, sed sendas al ni informojn (ĉ. 60 Esperantistaj geinstruistoj). Laŭ informoj ricevita el 15 landoj, en kadro en ILEI, Esperanto estis instruata dum la jaro, 1961-61, en 457 lernejoj inkluzive de 7 seminarioj, kun ĉ. 9593 gelernantoj. (Kun Danlando, en ĉ. 463 lernejoj, ĉ. 9761 gelernantoj). Lernejoj, laŭ nia difino, estas la devigaj dumtagaj lernejoj ĝis aĝo de ĉ. 18 jaroj. Ni kronikas nur informojn rekte ricevita, kiuj estas, dank' al niaj reprezentantoj, pli kompletaj en 1960-61; sed tamen restas mankoj. La agado en la diversaj landoj kunligita varias laŭ la personaro kaj la diversaj praktikaj celoj elektitaj de tiuj landoj. Raportas nia oficiala organo, "Edukado Internacia" (redaktoro S-ro Oskar Svantesson), kiu estas nia informilo kaj interparolejo. Ĝi diskonigas individuajn, naciajn kaj internaciajn informojn, bezonojn kaj opiniojn. Ok numeroj eldoniĝis en 1960-61. Por instigi al pli serioza interlerneja korespondado, I.L.E.I. aranĝis kunlaboron kun la Koresponda Servo Mondskala de U.E.A. "Geonkloj Esperantistaj", starigita en 1958 (S-ro Sullivan), por progresigi junajn gelernantojn kun helpo de plenaĝuloj, anoncis kontaktojn ĝis Junio, 1961 por 184 genevoj el 23 landoj. La du publikajn kunvenojn de I.L.E.I. dum la U.K. en Harrogate, 1961, ĉeestis respektive 100 kaj 64 personoj el po 16 landoj. Pli ol duono estis aktivaj geinstruistoj. Brita Lernejestro, S-ro N. Williams faris demonstradon pri aŭdo-vidaj helpiloj en la instruado de Esperanto. La pedagogia temo estis "Edukado por Internacia Inter-Kompreniĝo en la Lernejo — personaj spertoj". Respondoj de 22 lernejoj en 16 landoj faris bazon, kaj donis treege valorajn kaj interesajn informojn. De la Mondkonfederacio de Organizaĵoj de la Instruista Profesio ni ricevis inviton sendi observanton al ties 10-a Asembleo de Delegitoj en New Delhi, 1-7. VIII, 1961. Reprezentantoj de preskaŭ 150 naciaj instruistaj organizaĵoj tra la mondo, el 68 landoj partoprenis. Estis observantoj

de 10 Internaciaj Organizaĵoj. Feliĉe S-ino Haudebine povis akcepti por ILEI, kaj energie kaj serioze laboris la tutan semajnon. La Ligo estis agnoskita en la Internacia Adresaro de Instruistaj Asocioj, en majo 1961 — la unua ero en serio planita de UNESKO, kun la celo plibonigi la interŝanĝon de eduka informo inter la instruistoj de la mondo. Detaloj estis petitaj kaj senditaj pri niaj membro-asocioj. La tria eldono, 1961, de la "Universala Deklaro pri Hom-Rajtoj", simpligita por lernejoj, estis publikigita.

4) **Internacia Societo de arkitektoj kaj konstruistoj — Esperantistoj** (mallongigo: I.S.A.K.E.) estas fondita la 3-an de aŭgusto 1959, dum la 44-a Universala Kongreso de Esperanto en Varsovio, Pollando t.e. en Jubilea Zamenhofa Jaro. La 3-a laborkonferenco okazis la 9-an de aŭgusto 1961, dum 46-a Universala Kongreso de Esperanto en Harrogate, Britujo. Tiun kunvenon partoprenis 8 membroj el 6 landoj, kiam la societo havis 988 membrojn en 25 landoj. Laborkonferencoj respektive jarkunvenoj okazas ĉiujare dum la laboro de la Universalaĵ Kongresoj. La membraro de I.S.A.K.E. kreskis de 44 en 1958 al 89 je la 14-a de februaro 1962 en 25 landoj. La 22-an de marto 1961 en Krakovo, Pollando, estis fondita societa klubo, kun 15 membroj. La krakova klubo havas apartajn ejojn kaj ĝi sukcesis, ke la pola faka revuo "Cement, wapno, gips" ("Cemento, kalko, gipso") enkondukos mallongajn Esperantajn resumojn de ĉiuj artikoloj. Dum la 3-a laborkonferenco en Harrogate, Britujo estis elektitaj du honoraj membroj de la societo pro fakaj kaj por-esperantaj meritoj: Marcel Genermont, arkitekto-historiisto, 11 Place de la République, Moulins, Allier, Francujo kaj Kazimierz Tyminski, arkitekto el Varsovio, Pollando. Nerekte la societo estis en kontakto kun la ĝenerala sekretario Pierre Vago de Unuiĝo Internacia de Arkitektoj en Parizo (Union Internationale des Architectes-U.I.A.) kaj rekte kun Konstrucentro (Bouwcentrum) en Rotterdam, Nederlando, pri fakaj problemoj de internacia kunlaboro kaj terminaro internacia. Nia Centra Oficejo en Zagreb dissendis en 1961 207 leterojn kaj cirkulerojn al interesuloj en 27 landoj, kaj ĝi ricevis 118 leterojn el 25 landoj. Krome, ekzistas vigla korespon-

dado inter kelkaj membroj kaj interesuloj pri fakaj demandoj kaj interŝanĝo de fakaj revuoj, fotografaĵoj kaj bildkartoj de diversaj monumentoj interesaj. Ark. Francisco Azorin el Meksikio preparis manuskripton pri "Universala Terminologio de la Arkitekturo, Arkelogio, Arto kaj Metio" kun 2000 bildoj. Ark. Kazimierz Tyminski el Varsovio, Pollando preparis manuskripton de esperantaj-polaj terminoj en arkitekturo kaj konstruado. Necesas ankoraŭ solvi la problemon de eldonkostoj.

5) **Kvakera Esperantista Societo.** Ni havis 14 reprezentantojn en 12 landoj; 4 U.E.A.-Fakdelegitojn, kaj 144 membrojn. Por starigi kontakton kun monataj kunvenoj en Britujo ni nun havas ĉe ili korespondantojn en Preston, Bristol, Carlisle kaj Hobart (Tasmanio). Ni perdis en Junio pro morto nian Aŭstralian reprezentanton, D-ro Fred J. Williams, kiu dum multaj jaroj malavare donacis kaj laboris por Esperanto kaj la Kvakerismo. "Kvakera Esperantisto" estis pligrandigita kun nova kovrilo. Nun ni ekspedas al membroj kaj petantoj, al grupoj kaj redaktoroj, ankaŭ al sep bibliotekoj. Ĉi-lastaj inkluzivas Internacian Esperanto-Muzeon Vieno, Britan Muzeon, Bibliotekon de la Societo de Amikoj, Londono, Britan Esperantistan Asocion (Biblioteko); Kolegion Woodbrooke, Birmingham; Kvakeran Arkivan Bibliotekon kaj Haverford Bibliotekon en Pensilvanio. Eldonaĵoj: daŭre distribuataj flugfolioj: Kiuj estas la kvakeroj? Broŝuro: George Fox, William Penn, Vivo kaj Koncepto de la Societo de Amikoj. En preparo — 1) "Sovaĝaj Plumoj" — Rakonto por geknaboj utila al instruistoj kaj gepatroj. 2) "La Esenco de Kvakerismo" — G. K. Hibbert. En "Lettre Fraternelle", franca bulteno de la Religia Societo de Amikoj (Kvakeroj), nia sudfranca delegito, Perra, daŭre kontribuas per Esperanta rubriko. En la lasta numero troviĝas lumiga artikolo pri la Universala Esperanto-Asocio.

6) **Skolta Esperantista Ligo.** Dum la jaro 1961 la Skolta Esperantista Ligo daŭris kreski sub la fervora estreco de siaj Naciaj Agentoj en Aŭstralio, Belgujo, Britujo, Danlando, Kanado, Nederlando kaj Usono. Ŝanĝo de Nacia Agento en Norvegujo okazis kaj enketo pri S.E.L. kaj

agenteco de Madagaskaro riceviĝis. Pro manko de informo el Naciaj Agentoj en aliaj landoj ni ne povas raportii. La ĉefokazaĵo en la Ligo estis la kunveno de membroj ĉe la U.K. en Harrogate kie diskutiĝis ekspliko de la tutmonda eseo-konkurso, klopodo estontece organizi skoltan Esperantistan ĵamboreon, per pli ekonomiaj presrimedoj aperigi regulajn numerojn de la Liga organo, proponoj plifortigi la Sekciojn kaj ĝenerale la Ligon kaj enkonduko de nova skoltprogramo inter patroloj kaj trupoj pere de la internacia "traduk-servo". "La Skolta Mondo" aperis dufoje en 1961. La unua numero kompletigis la duan volumon kun indekso por la jaroj 1953 tra 1960 kaj enhavis altnivelajn artikolojn pri la nerva sistemo, vastaj skoltludoj kaj preĝon. La dua numero redaktita de la Centra Komitato eldoniĝis sub nova formato kaj enhavis elstaran artikolon pri Liga historio kaj dankegojn al ĝia antaŭa redaktoro George Rust, kies senĉese dediĉita laboro dum pli ol 12 jaroj restarigis la gravecon de la Skolta Esperantista Ligo en la skolta kaj esperantista movadoj.

7) **Studenta Tutmonda Esperantista Ligo (STELO).** Ĉi tiu raporto rilatas al la periodo aŭg. 1960 - aŭg. 1961, la tria ekzistojaro de la Ligo. La Ĉefkunveno de aŭgusto 1960 okazis laŭstatute en la kadro de la 45-a Universala Kongreso de Esperanto en Bruselo, la 3.VIII.60, sub prezidado de Paul Ciliga. Dum tiu kunveno estis prezentitaj tri specialaj raportoj, (I) pri la oficiala organo, (II) pri la Terminologia Komisiono, kaj (III) pri la plurlingva flugfolio. Post diskutado oni decidis provizore ne plialtigi la kotizojn; tamen estis aprobite duobligi la abonkotizon de STUDENTO se tio montriĝus necesa. Dum la jaro STELO havis 41 individuajn membrojn (antaŭe 19); kolektivaj membroj estis 3 (antaŭe 3) kun entute 41 aligitaj membroj (antaŭe 51); sume, do, 82 personoj el 12 landoj estis membroj de STELO (antaŭe 70 el dek landoj). Kvankam tiuj ĉi ciferoj estas iomete pli altaj ol la antaŭaj, ili estas ankoraŭ tute hontindaj. La kresko ŝuldiĝis ekskluzive al tio, ke fine oni trovis provizoran rimedon por la transpago de kelkaj kotizoj el komunistaj landoj, nome per la sendado de neuzitaj kovertoj. En tiu maniero povis aliĝi studentoj el Bulgario, Jugoslavio, Pollando kaj Sovetio.

La oficiala organo, STUDENTO, aperis sesfoje dum la jaro, sub redaktado de la Prezidanto, Victor Sadler; en 1961 ankaŭ la teknika laboro de multobligado kaj ekspedado transiris al la redaktoro en Londono. Kontribuado de la membroj kaj legantoj al la gazeto konsiderinde, kvankam nesufiĉe, plioftiĝis. Tamen la abonantaro ankoraŭ ne estis sufiĉe multnombra, por fari ĝin ekonomia, kaj oni antaŭvidis kotizaltigon en la venonta jaro, se ne okazus ia ŝanĝo fundamenta (ekz. translokiĝo de la produktado al komunista lando). La eksperimenta aligado de personoj en komunistaj landoj montris klare, ke ekzistas vasta interesiĝo en tiuj landoj, sed ke neniu rimedo estas per si mem sufiĉa por solvi la financajn malfacilaĵojn, sen samtempa grandega kresko de la nombro de pagantaj membroj. STELO restis studenta sekcio de ISAE kaj kunlaboranta faka asocio de UEA.

8) **Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio.** Je la jarfino 1961 la nombro de la membraro kreskis ĝis 243, en 31 landoj de ĉiuj 5 kontinentoj. En 18 landoj ĉeestas peranto de Interŝanĝservo de Artikoloj (I.S.A.): la tutan branĉon de ISA gvidas Jepsen G. Norgaard -Skovvangen 17, Silkeborg - Danlando. Dum 1961 aperis 6 numeroj de la organo de TEJA - "Internacia Ĵurnalisto", kiujn prestigis la komitatano, redaktoro Ivan Keremidĉev-Esperov, bulv. Botev 98, Sofia 2, Bulgario: ilin oni sendis al ĉiuj geanoj, kaj la aperado estas pli regula ol antaŭe. Okaze de 46a U.K. en Harrogate, La Prezidanto gvidis la laborojn de la faka kunveno de TEJA, kaj la ĉeestantoj — interalie — petis la Estraranojn, ke oni sendu al la tuta anaro la kompletan adresaron de Teĵanoj por pli aktive efektiviĝi la kunlaboron. T.E.Ĵ.A. fariĝis, dum 1961, membro de la "Unuiĝo de la Internaciaj Asocioj" — Palais d'Egmont — Bruxelles 1-Belgujo. La sekretario, D-ro Fabris en Italujo prelegis en urboj Milano, Torino (tie okaze de grava nacia datreveno de la unuiĝo de Italujo, tiel nomata "ITALIA 61"), antaŭ neesperantista publiko pri Esperanto kaj Gazetaro, citante, interalie, la laboron de TEJA. Dum la monato de Decembro, la Sekretario sendis gravan cirkuleron al ĉiuj anoj, pri la laboro farita kaj farenda.

9) **Universala Medicina Esperanto-Asocio** antaŭe Tutmonda Esperantista Kuracista Asocio. Dum la jaro 1961 nia Asocio disvolviĝis, kaj ĝia anaro konsiderinde kreskis, kvankam la organizado ne estas finita. La oficiala aligo de multaj medicinistoj ne povas okazi pro financaj malfacilaĵoj. Sekcioj de medicinistoj-esperantistoj estas fonditaj en: Japanujo, Bulgarujo, Jugoslavio, Pollando, Sovetunio. En plujaj landoj agas jam la landaj reprezentantoj de UMEA, sed pro diversaj kialoj Sekcioj ne fondiĝis (Britujo, Ĉinio, Ĉeĥoslovakujo, Finnlando, Hispanujo, Argentino, Portugalujo, Usono). En pli grandaj urboj ekzistas rondetoj de kuracistoj, kiuj ofte kunvenas kaj kunlaboras kun la Estraro de UMEA. La plej multnombra grupon inter la kuracistaro formas okulkuracistoj kaj neŭrologoj. Ili komencis organizi la sekciojn. Prof. D-ro Seiho Nishi aperigis 120-paĝan libron sub la titolo "Nia korpo". Ĝi estas destinita ne por kuracistoj, sed por laikoj, sed liveras la korektajn aktualajn terminojn anatomiajn kaj fiziologiajn, ĉar Prof. S. Nishi estas kunlaboranto de Medicina Terminologia Centro de UMEA kaj kontribuas al kompilado de nova medicina vortaro. Medicina Terminologia Centro agas kaj estas jam prilaborita la parto de nova medicina vortaro. D-ro Andreo Albault, la gvidanto de MTC kaj ties motoro, dissendis la represaĵojn de la franclingve redaktita artikolo sub la titolo "Esperanto en Medicino", al ĉ. 500 institucioj, profesoroj, eminentuloj, redakcioj de fakaj revuoj ktp. kune kun seslingvaj flugfolioj de UEA pri Esperanto ĝenerale kaj kun la leteroj informantaj pri UMEA. La sekretariino dissendis 300 ekzemplerojn de tiu artikolo al UMEA-anoj kun longa cirkulerletero enhavanta la sciigojn pri la agado de nia asocio. Al reprezentantoj de UMEA en unuopaj landoj kaj aliaj pli agemaj anoj estas senditaj la projektoj de la Statuto de UMEA, kiuj estas jam pridiskutitaj dum la Kongreso en Bruselo, sed laŭ kutimo submetitaj al referendumo. Por plenumi la ĉefan celon de nia agado, disvastigi Esperanton inter medicinistoj, estis gvidataj multaj Esperanto-kursoj en hospitaloj, klinikoj kaj ĉe diversaj medicinaj institutoj (Beograd, Gyor, Ijevsk, -Kraków, Gdańsk, Leningrad, Moskva, Plovdiv, Poznań, Vilnius, Sofia), certe en pliaj, sed la

informoj ne atingis ankoraŭ la sekretariojn. En pluraj fakaj naciaj revuoj aperadas esperantaj resumoj de artikoloj. Dum la raporta periodo aperis 2 pluaj volumetoj de "Medicina Revuo", eldonitaj en Japanujo en la sama aspekto kiel la antaŭaj. La Sekcio sociale sanitara, gvidata de S-ro Jozef Ambroz, agas aktive en UMEA-kadroj. Ĝi celas kunlabori kun la socialaj organizaĵoj en unuopaj landoj por plibonigi la sanstaton de laborantoj kaj la vivkondiĉojn de invalidoj. Ĝi havas kontaktojn kun ĉefoslovaka, franca, jugoslavia, pola kaj soveta organizaĵoj de kripluloj. Pri ties problemoj estis eldonitaj du pluaj numeroj de "Tribuno de invalidoj", en la lingvo Esperanto. Ili estas interese redaktitaj kaj disvastigindaj. UMEA estas registrita kiel Internacia Asocio en "Union des Associations Internationales" (Belgique, Bruxelles, Palais d'Egmont), kaj la ĉefaj informoj pri UMEA en la kalendaro de la suprenomita organizaĵo, en franca kaj angla lingvoj. Dum la Universala Kongreso en Harrogate okazis la jarkunveno de UMEA sub la prezidado de Prof. Yagi. Partoprenis ĝin 15 esperantistoj (ne ĉiuj medicinistoj). Krom la organizaj problemoj oni preparolis la fakajn aferojn. Estas organizitaj du vizitadoj al medicinaj institutoj en Harrogate. Kunlaboro de UMEA kun ISAE ankoraŭ ne plifortiĝis. En Nederlando oni reaperigis la "Questionarium Medicum" en 16 lingvoj, inter aliaj ankaŭ teksto en Esperanto.

10) **La Universala Ligo.** La Universala Ligo nun havas entute 12946 membrojn. Ordinaraĵoj pagas minimume 4 stelojn por la tuta vivo. Okazis speciala kunveno de U.L. en la kadro de la Universala Esperanto Kongreso en Harrogate. Ĉeestis pli ol 250 gesamideanoj. Anthony Brooke faris impresan paroladon, titolitan "La Revolucia Homo en la Kosma Epoko." La jarkunveno de U.L. okazis la 18-an de novembro en Rotterdam, Nederlando. Ĉar la prezidanto, Profesoro Privat pro sia sanstato ne povis ĉeesti, li per letero malfermis la kunvenon. La enhavo de tiu letero trovis varman akcepton kaj fortan aplaŭdon. Ĉar multaj U.L.-anoj ne havis okazon aŭdi la paroladon de Anthony Brooke en Harrogate, la estraro invitis lin ripeti ĝin en la kadro de nia jarkunveno. La ĉeestantoj tre alte taksis tion. S-ino Julia Isbrucker reprezentis U.L.-

on en la Monfederalista Kongreso, kiu okazis de la 10-a ĝis 15-a de Julio 1961.

Metalaj moneroj. Ĉi tiuj moneroj trovis bonan akcepton. Ne nur esperantistoj mendadas ilin, sed ankaŭ monerkolektantoj, ne-esperantistoj, precipe amerikanoj. Diversaj samideanoj sendis artikolojn pri tiuj moneroj al siaj lokaj gazetoj, kio faris bonan propagandon. Pro la ŝanĝiĝo de la monvaloro de diversaj landoj, U.L. devis ŝanĝi la kurzon de la stelo por tiuj landoj. U.L. havas reprezentantojn en 27 landoj kaj propran poŝtkonton en 7 landoj. Kun kontenteco la estraro de U.L. konstatis, ke la ideoj de U.L. ĉiam pli disvastiĝas en la nuna mondo.

11) **Veterana Esperantista Klubo.** La Jarkunveno de la Veterana Esperantista Klubo okazinta en Harrogate dum la pasintjara U.K. decidis republikigi la VEK-liston por registri en ĝi la nomojn de novaliĝintoj ĝis la komenco de 1962. Tiu listo estas nun eldonita kun 610 adresoj, inter ili 150 de novaj anoj. La nombro de Jubileanoj, kiuj eklernis la lingvon antaŭ pli ol 50 jaroj estas 462. La listo estas aĉetebla de la aganta sekretario, S-ro Maurice Lewin, 33, Kingcroft Ave, Dunstable Beds, Anglujo, por 3 rpk. + afranko.

V. NENEŬTRALAJ ASOCIOJ KUNLABORANTAJ

1) **Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (I.K.U.E.)** Fine de 1961 IKUE havis 1218 membrojn-abonantojn en 45 landoj. Fakte tiu nombro estis pli granda, sed en kelkaj orienteŭropaj landoj la revuo "Espero Katolika"-kvankam politike absolute neŭtrala, — ne plu estas allasata, tiel ke la unuiĝo ne plu povis kalkuli la koncernajn membrojn, por kiuj personoj en pagipovaj landoj ĝis tiam pagis la kotizojn. Landaj sekcioj de IKUE estas en: Argentino, Aŭstrujo, Francujo, Germanujo, Hispanujo, Irlando, Italujo, Japanujo, Madagaskaro, Nederlando, Pollando, Svisujo, entute 12. Landaj reprezentantoj, al kiuj la membroj individue povas pagi la kotizojn, mendi librojn, ktp. troviĝas en 21 landoj. La monata organo "Espero Katolika", ekzistanta de 1903, ampleksas 24 paĝojn, aperas en 1700 ekz. el kiuj multaj estas regule senpage sendataj al diversaj katolikaj instancoj. Ekde jan. 1961,

aperas traduko de la Biblio, komenciganta per la Evangelio de Sta. Mateo, kiel aldono de E.K.: ĉiudumonate la membroj-abonantoj ricevas almenaŭ 8 paĝojn (en 1961 entute 64), kiujn ili poste povos bindigi. Jarlibreto aperis komence de februaro 1962, kun adresoj de estraranoj, adresoj de 235 membroj-sacerdotoj en 26 landoj, inter kiuj diversaj ekleziaj altranguloj, listoj de konsuloj, dumvivaj kaj subtenantaj membroj, financa stato, ktp. Por la junularo ekzistas de kelkaj jaroj la sekcio "La Alta Flugo" kun monata revueto, provizore en 8 paĝoj, nomita "Birdo"; ĝi aperis en la lastaj monatoj de 1958 stencilita, jam ekde januaro 1959 ĉiun 15-an de monato presita. La Internacia Katolika Informejo, ekzistanta de 1934, daŭrigas sian funkciadon de korespondado kaj informado pri religiaj demandoj en Esperanto kaj regule eldonas sian dumonatan revuon "Vojo Vero Vivo". La 28-a Internacia Kongreso de IKUE okazis en Aŭgusto 1961, kiel 4-a Eŭkaristia Esperantista Mondkunveno, en la kadro de la granda Eŭkarista Mondkongreso en Munkeno, Germanujo. Vizitis ĝin ĉ. 200 partoprenantoj. IKUE havis sian fakkunsidon dum la 46-a Universala Kongreso de Esperanto en Harrogate. La 29-a IKUE Kongreso okazos en aŭgusto 1962, en la moderna Centro por pli Bona Mondo, Rocca di Papa (je la lago kontraŭ Castel Gandolfo) apud Romo.

2) **Kristana Esperantista Ligo Internacia (K.E.L.I.).** En la pasinta jaro 1961 K.E.L.I. rememorigis sian 50-jaran ekzistadon. La jubilea festo okazis dum KELI-kongreso, kiu ĉi jare zorgplene estis aranĝita de la Britaj Keli-anoj kaj okazis en Bishop's Stortford (50 k.m. norde de Londono). Iom pli ol 100 anoj ĉeestis tiun ĉi festan kongreson. La temo estis: "Nia trumpeto sonu". En la kunveno diversaj parolantoj pritraktis tiun ĉi temon, kaj en la fino de la semajno oni preparis kaj akceptis rezolucion, sendotan al ĉiuj Kristanaj unuigoj, en kiu oni invitis ilin, esplori la eblecojn kiujn prezentas la internacia lingvo kaj ĝia uzado por la laboro en la disvastigado de la Regno de Dio. Ankaŭ oni faris fondaĵon por la eldono de internacia evangelia kantaro kun muziknotoj. Pretiĝis en ĉi tiu jaro la Esperanta eldono de la Malgranda Katekismo de Martin Luther. Post la KELI-kongreso

multaj anoj daŭrigis la vojaĝon al U.K. en Harrogate. Tie KELI aranĝis diservon, dimanĉe posttagmeze en la bela preĝejo de Sankta Petro, kiu estis tre bone vizitita. Gvidis la diservon kaj predikis Prof. W. J. Downes el Bristol (Britujo). La sveda sekcio aranĝis denove someran Esp. kurson, ĉi-foje en la altlernejo de Mora. Partoprenis 50 gelnantoj, grandparte gejunuloj. Krom la organo "Dia Regno", kiu regule monate aperis, ankaŭ diversaj landaj sekcioj eldonas propran gazeton aŭ bultenon por enlanda propagando. Tiel la britoj eldonas: "Kristana Alvoko", la francoj: "La ponteto", la germanoj: "Esperanto-ekumeno", la nederlandanoj: "K.U.N.E. bulteno", la svedoj: "Medlemsblad" kaj la svisoj: "Kristana bulteno". Ili ĉiuj aperas parte en Esperanto kaj parte en nacia lingvo.

Kompilis A. Rajski, Estrarano pri Landaj, Fakaj kaj Neneŭtralaj Asocioj.

LA SIGNIFO DE LA NOVA LABORPLANO DE U.E.A.

La kaŭzoj, kiuj necesigis la ellaboron kaj akcepton de la Dua Baza Laborplano de U.E.A., estas koncize prezentitaj en ĝia Enkonduko. Aldone, ĉi tie ŝajnas utile nur rememorigi per kelkaj vortoj la manieron, laŭ kiu la agadprincipoj de la Laborplano estis diskutataj kaj fine formulitaj en la definitiva teksto.

La unua projekto, farita de la ĝenerala sekretario en la senco de la Art. 30 de la Statuto, estis publikigita en la marta n-ro de "Esperanto". En la akompana artikolo estis donitaj la necesaj klarigoj kaj la Esperanto-organizaĵoj estis petitaj pritrakti la aferon. Dum siaj kunsidoj de la 14-a kaj 15-a de aprilo la Estraro de U.E.A. tre atente diskutis la projekton kaj faris en ĝi kelkajn kompletigojn. Sekvante la inviton de la Estraro, pluraj landaj asocioj, lokaj grupoj kaj unuopuloj slavice sendis diversajn proponojn. Tiu tuta materialo estis transdonita al la Komitato, kiu elektis specialan komisionon por trastudo de la projekto kaj de ĉiuj alvenintaj sugestoj. Paralele kun la laboro de la Komitato kaj de ĝia Komisiono por la Laborplano, la Unua Ĝenerala Kunveno de la U.K. en Kopenhago diskutis la temon "*La Rolo de la Lokaj Grupoj en la Nova Laborprogramo de U.E.A.*" La interesiĝo estis vere grandega: ĉeestis pli ol 400 personoj, el kiuj multaj estis reprezentantoj de landaj asocioj kaj lokaj societoj. Laŭ la deziro de la Komisiono por la Laborplano, en kiu estis esprimita opinio, ke la Laborplano de U.E.A. devus ne enhavi erojn pri la landaj asocioj kaj lokaj grupoj, la kunveno unue pritraktis tiun principan demandon. Per grandega plimulto de ĉiuj voĉoj kontraŭ 2 kaj 7 sindetenoj la kunveno decidis, ke la Laborplano enhavu la menciitajn partojn. Post tio la Komisiono povis daŭrigi la studadon de la projekto kaj, rezulte, prezenti al la plena kunsido de la Komitato nombron de ŝanĝoj kaj aldonoj. Kelkaj estis akceptitaj, aliaj aŭ modifitaj aŭ rifuzitaj. Parton post parto, punkton post punkto, eĉ frazon post frazo la supera organo de la Asocio plej atente trapasis la tutan Laborplanon, voĉdonis pri ĉiu unuopa ero kaj fine revoĉdonis pri la tuto. Tiamaniere la nova Laborplano, akceptita de la Komitato en Kopenhago en la formo nun

publikigita, estas elstara rezulto de plej vasta diskutado tra la tuta esperantista mondo kaj esprimas la plej demokrate formiĝintan volon de la neŭtrala Esperanto-Movado, kiun reprezentas Universala Esperanto-Asocio. Estas utile aldoni, ke, tuj post la U.K. en Kopenhago, la Kongreso de T.E.J.O. en Ystad akceptis sian Laborplanon konforme al tiu de U.E.A., kaj ke la pli ol 100 partoprenantoj el 18 landoj de la kultura arango SSS en Frostavallen preparolis en du kunvenoj la plej efikajn metodojn por plenumi la novan Laborplanon precipe sur la nivelo de la lokaj grupoj. La Laborplano de T.E.J.O. estos publikigita kaj la sugestoj de Frostavallen senditaj al ĉiuj landaj asocioj kaj aliaj interesigantoj.

La akcepto de la Dua Baza Laborplano de U.E.A. markas la komenciĝon de nova, tre versaĵne decida periodo en la klopodoj ĝeneraligi la uzon de komuna neŭtrala lingvo en ĉiuj internaciaj rilatoj. Senpasia kaj senpartia analizo de la lingva situacio en la hodiaŭa mondo, objektiva juĝo pri la aktuala kaj potenciala pure lingva kapacito de la Internacia Lingvo, trankvila takso de la teknika-organiza aparato je dispono de la nuntempa Esperanto-Movado pravigas la fidon, kiu inspiras la novan Laborplanon. Necesas nun, ke ĉiuj Esperanto-organizaĵoj kaj ĉiuj esperantistoj insiste klopodu realigi ĝin kun la sama fido en amika kunlaborado, ĉar sole per komunaj fortoj estas atingebla la celo. Por helpi la plenumon de la Laborplano, la revuo "Esperanto" — kaj espereble ankaŭ la aliaj periodaĵoj — publikigos serion da artikoloj kun analizoj de la unuopaj punktoj, konsiloj pri la metodoj aplikendaj, instigaj informoj pri la progresoj faritaj. Provizore, en tiu ĉi komenca stadio, sufiĉos atentigi pri kvar ĝeneralaj trajtoj por eviti ĉian eblan miskomprenon rilate la signifon de la Laborplano.

Unue, estas utile emfazi, ke neniu serioza laborplano — speciale ne laborplano de socia-kultura movado kiel la nia — celas antaŭvidi ĉiujn detalojn de la estonteco. La Laborplano de U.E.A. devas esti rigardata ne kiel ia profetaĵo, sed kiel vasta kadro de agado, kiu, surbaze de la objekte taksitaj eblecoj, indikas la finan celon, la konkretajn plenumendajn taskojn, la vojon sekvotan kaj la ĉefajn metodojn aplikindajn. Pro tiu esenca karakterizo la Laborplano detaligas ĝis certa grado nur la

taskojn de la centraj organoj de la Asocio, dum la punktoj rilatantaj al la landaj asocioj, lokaj grupoj kaj fakaj organizaĵoj estas intence tiel formulitaj, ke ili prezentas nur la plej ĝeneralan framon por la estonta laboro. Estas urĝe necese, ke nun ĉiuj Esperanto-organizaĵoj, apartenantaj rekte aŭ nerekte, en tiu aŭ alia formo al U.E.A., detaligu en siaj laborplanoj tiujn fundamentajn taskojn, prenante en konsideron la apartajn landajn, regionajn kaj lokajn kondiĉojn, aŭ la specialajn cirkonstancojn de siaj fakaj medioj.

Due, kvankam la Laborplano konsistas el kvin partoj, 28 punktoj kaj multaj eroj, tamen ĝi prezentas unuecan tuton. Ne ekzistas taskoj pli gravaj kaj malpli gravaj. Ili ĉiuj estas same gravaj. Nur la plenumo de ĉiuj punktoj sur ĉiuj niveloj — monda, landa, regiona — loka kaj faka — garantias la sukceson.

Trie, parto de la programaj eroj ŝajnas tiel memkompreneblaj, ke oni povus demandi sin ĉu necesis meti ilin en la Laborplanon. Se ĉiuj niaj organizaĵoj estus efektive ĉiam agintaj laŭ tiuj "memkompreneblaj" principoj, eble oni estus povinta ellasi ilin. Bedaŭrinde multaj agadprincipoj, kiuj estis kaj estas memkompreneblaj por unuj, tute ne estas ankoraŭ atentataj de aliaj. Pro la fakto, ke precize tiuj "memkompreneblaj" principoj formas unu el la nediskuteblaj antaŭkondiĉoj de kiu ajn pozitiva laboro por la Internacia Lingvo, ili estis enmetitaj en la Laborplanon kaj restis en ĝi.

Fine, dum la diskuto kelkaj starigas la demandon ĉu la Laborplano havas devigan karakteron por ĉiuj, inkluzive la organizaĵojn kaj la individuajn membrojn, el kiuj konsistas U.E.A., aŭ ĝi estas deviga nur por la centraj organoj de la Asocio. Se oni komprenas la vorton "deviga" en la senco de perforta altrudo kun la helpo de ĝendarmoj, tiam evidente la Laborplano estas "deviga" por neniu. Sed se oni korekte konceptas la kaŭzojn, celojn kaj metodojn de organizita laboro entute, tiam la Laborplano, akceptita de la Komitato laŭ la Statuto kaj post vastega diskuto, estas morale deviga por ĉiuj: almenaŭ tiom, kiom estas la Statuto kaj la Regularoj de la Asocio. Se ne estus tiel, ĝi estus komplete superflua. Estas, ja, pli ol klare, ke nek la ok personoj de la Estraro, nek la sesdedo da Komitatanoj povas solaj plenumi tiun gran-

I. ENKONDUKO

diozan agadprogramon. Nur la tuta U.E.A., hodiaŭ pli potenca ol iam antaŭe, kapablas tion fari. Kaj nur la konvinko, ke ĉiuj organizaĵoj kaj ĉiuj unuopuloj en la kadro de U.E.A. sincere klopodos efektiviĝi sian parton aŭ nur ereton de la Laborplano, povas doni al ĉiu el ili la necesajn kuraĝon kaj fidon en la plenumado de la propra tasko en la propra medio. Ne nur ĉiuj partoj, punktoj kaj eroj de la Laborplano estas reciproke tiel kunligitaj, ke malatento al unu malutilas al la tuto kaj povas eĉ endanĝerigi ĝin, sed, ĝuste tial, ankaŭ la personoj respondecaj por la plenumo dependas unu de la alia kiel ĉeneroj en longa ŝtala ĉeno.

Konsciaj por tiuj interligiteco kaj interdependeco ni komencu senprokraste realigadi la Duan Bazan Laborplanon de U.E.A.!

Prof. D-ro Ivo Lapenna

1. **Laborplano 1955** : La konataj decidoj de UNESKO fine de 1954 necesigis sistemigon de la laboro de U.E.A. kaj de ĉiuj organizaĵoj apartenantaj al ĝi en tiu aŭ alia formo. Tiucele estis ellaborita la Baza Laborplano de U.E.A. kaj prezentita al la Komitato, kiu akceptis ĝin dum la Kongreso de Bologna en la jaro 1955. Ĝi estis la unua Laborplano de la Asocio kaj ĝi ebligis celtrafan agadon en la periodo 1955-1962.

2. **Plenumo** : La Raportoj de la Estraro por la laborjaroj 1955/1956 ĝis 1961/1962, publikigitaj en la Jarlibro, entenas la ĉefajn atingojn de la Asocio kaj ĝenerale de la Esperanto-Movado en la menciita periodo. Kelkaj eroj de la Plano ne povis realiĝi, ĉefe pro kaŭzoj ekster la povo de la respondecaj organoj de U.E.A., sed, aliflanke, multaj aliaj punktoj, neantaŭviditaj en la Plano, povis esti sukcese plenumitaj. Ĝenerale parolante, la ĉefa celo de la Plano estas atingita. Ekstere la pozicioj de la Internacia Lingvo konsiderinde pliboniĝis kaj la prestiĝo de U.E.A. kiel reprezentanto de la neŭtrala Esperanto-Movado multe altiĝis. Interne la Asocio fortiĝis organize kaj ideoj. Rezulte la membraro preskaŭ duobliĝis. Pro la plenumo de la taskoj antaŭviditaj en la Unua Baza Laborplano, kiel ankaŭ pro la sangitaj cirkonstancoj en la mondo, necesas fiksi en nova Baza Laborplano la principojn de agado en la sekvanta periodo.

II. CELO

3. **Premisoj** : Ĉiu, kiu objekte rigardas la realaĵojn en la hodiaŭa mondo, facile povas konstati, ke la homaro ĉiam pli kaj pli bezonas rimedon de komunikado por ĉiuj internaciaj rilatoj, daŭre ampleksigantaj kaj profundigantaj. Estas same klare, ke tiun bezonon povas plene kontentigi nek unu aŭ pluraj naciaj lingvoj, nek la nuntempaj sistemoj de tradukado kaj interpretado, nek la plej modernaj tradukmaŝinoj, sed sole vivanta, ĝis maksimumo nuancita, plensanga kultura lingvo. Bazante sin sur tiuj du premisoj kaj konante perfekte la nunan evolustadion de la Internacia Lingvo kaj ĝiajn senfinajn evolu-eblecojn,

la organizita Esperanto-Movado estas konvinkita, ke precize la Internacia Lingvo prezentas la solvon de la lingva problemo en mondaj kadroj kaj ke tial pli aŭ malpli frue devas veni la tempo kiam ĝi estos aplikata en ĉiuj internaciaj rilatoj, sur ĉiuj niveloj.

4. Organizita agado: Rezulte, necesas, unuflanke, daŭre evoluigadi la Internacian Lingvon rigore konservante kaj fortikigante la lingvounuecon, por ke en ĉiu momento ĝi povu kontentigi ĉiujn bezonojn de internacia komunikado, kaj, aliflanke, konscie, organizite kaj paralele vastigi la scion kaj la praktikajn aplikojn de la lingvo en ĉiuj sferoj. Malfacile oni povas antaŭvidi kiam precize la utiligo de la Internacia Lingvo ĝeneraligos, ĉar tio dependas de multaj faktoroj, el kiuj la plej granda parto troviĝas tute ekster la atingopovo de la Esperanto-Movado, sed tute certe la kondiĉoj por tio ĉiam pli maturiĝos. Tial estas eble almenaŭ ĝis certa grado influi la solvon kaj plirapidigi la procezon per konsiderinda altigo de la nombro de personoj mastrantaj la lingvon, kio aŭtomate vastigas la kampon de ĉiaspecaj praktikaj aplikoj kaj, krome, ebligas ankaŭ konscian vastigon de tiuj praktikaj utiligoj. Siavice tio devas plimultiĝi kaj fortikiĝi ĉiujn Esperanto-organizaĵojn, sekve ebligi novajn agadojn kaj intervenojn kun pli da efiko, kio ne povas ne reflektiĝi en la plua disvastigado de la lingvo. Ĉio ĉi estas firme kunligita, sed estas necesa la elemento de konscie organizita agado por sukcesplene rapidigi la funkciadon de tiu maŝinaro de reciproka influado. La nova Baza Laborplano plenumas tiun taskon. Ĝi prezentas komunan framon por la agado de ĉiuj organoj de U.E.A. de la aliĝintaj asocioj, de la kunlaborantaj fakaj kaj specialigitaj organizaĵoj, de la lokaj societoj kaj unuopaj membroj. Ĝi montras la vojon al la fina celo — la ĝeneraligo de la uzo de Esperanto en la internaciaj rilatoj — la internajn kaj eksterajn taskojn plenumendajn en la nuna stadio, kaj la labormetodojn aplikendajn por efike proksimiĝi al tiu celo.

III. INTERNAJ TASKOJ

A. U.E.A.

5. Organiza plifortigo: (a) Instigi ĉiujn landajn kaj fakajn asociojn aliĝi al U.E.A.; (b) plifortigi la landajn kaj fakajn asociojn; iniciati kaj helpi la organizon de

novaj; (c) konsiderinde altigi la nombron de individuaj membroj, laŭ la ebleco minimume al 15.000; (ĉ) altigi la nombron de asociaj membroj laŭ ebleco al minimume 35.000; (d) utiligi la kategoriojn de "apogantoj" kaj "apogantaj organizaĵoj" por havigi al U.E.A. la subtenon de simpatiantaj organizaĵoj kaj almenaŭ 50.000 unuopaj apogantoj; (e) fortigi T.E.J.O. kaj doni al ĝi efikan helpon en la disvastigo de la Internacia Lingvo inter la junularo; (f) duobligi la nombron de delegitoj kaj fakaj delegitoj; (g) nepre atingi pli fortan internan disciplinon, tiel ke ĉiu organo, funkciulo aŭ oficisto de la Asocio plenumu precize, akurate kaj ĝustatempe siajn taskojn kaj devojn; aliflanke, estas dezirinde, ke la unuopaj lokaj grupoj kaj individuaj membroj turnu sin unuavice al siaj respektivaj landaj aŭ fakaj asocioj, komitatanoj kaj lokaj organizaĵoj, senŝargante tiamaniere la centrajn organojn de laboroj, kiuj apartenas al la landaj asocioj, fakaj organizaĵoj aŭ lokaj grupoj; (ĝ) plene ordigi la novan domon en Rotterdam, ankoraŭ modernigi la oficejon per nuntempaj oficejaj instrumentoj, eventuale per malgranda moderna presmaŝino por publikigo de diversaj bultenoj kaj informaj materialoj; (h) instigi donacadon por unuopaj ĉambroj en la domo (5000 ned. gld.), kiuj ricevos nomon laŭ la deziroj de la donacintoj; (ĥ) ordigi kaj daŭre kompletigadi la bibliotekon tiel ke ĝi estu maksimume ĝisdata.

6. Informado: (a) Intensigi la agadon surbaze de la Principaro de Frostavallen (vidu la Jarlibron de U.E.A., 1959, p. 186), kiu formas konsistan parton de tiu ĉi Laborplano; (b) dediĉi precipan atenton al agado en Azio kaj Afriko (specialaj broŝuroj, flugfolioj, prelegoj, havigo de instruistoj, lernolibroj, fondo de grupoj kaj landaj asocioj); (c) instigi la landajn asociojn kaj lokajn grupojn realigi la ideojn kaj sugestojn, kiujn entenas la Principaro de Frostavallen; (ĉ) instigi la interŝanĝadon de spertoj; (d) aranĝi konferencojn de la informaj fakoj kaj specialistoj pri informado kun la celo daŭre plibonigadi la enhavon kaj metodojn de informado.

7. Lingvo: (a) Rigore konservi kaj fortikigi la lingvounuecon surbaze de la Zamenhofa Fundamento klare distingante inter la necesa aŭ utila evoluigo de Esperanto kaj la danĝera deformado de ĝiaj bazaj strukturaj trajtoj

laŭ la Fundamento; (b) atenti, ke ĉiuj publikaĵoj de U.E.A. estu absolute senriproĉaj el lingva vidpunkto; (c) kritike rilati al ĉio, kio malaltigas la lingvan nivelon; (ĉ) konservi kaj konscie intensigi la vivantecon de la lingvo per instigo al uzado de Esperanto ne nur okaze de internaciaj renkontigoj, sed en ĉiuj Esperanto-organizaĵoj, iliaj organoj kaj inter unuopuloj; (d) ankoraŭ plibonigi la nivelon de la lingvo-instruado per organizo de internaciaj kursoj por kursgvizitantoj; kontrolado de lernolibroj kaj rigora kritiko de lernolibroj kaj vortaroj, kiuj deformas la lingvon; publikigado de lernolibroj por lingvoj, en kiuj ili ankoraŭ ne ekzistas; kunligado de lernejoj en kiuj la Internacia Lingvo estas instruata; instigado al organizo de konversaciaj kursoj; aligado de la kursfinintoj al Esperanto-organizaĵoj, inkluzive U.E.A.; plua evoluigo de la internaciaj ekzamenoj kaj instigado al diplomiĝo.

8. **C.E.D.**: Fortikigi C.E.D. kiel specialan sciencan-esploran institucion de la Esperanto-Movado.

9. **Kongresoj kaj konferencoj**: (a) Plue evoluigi la U.K. konservante la nunan bazan strukturon, tiel ke ili fariĝu ĉiam pli atentataj mondaj kulturaj manifestacioj; (b) ligi al U.K. specialajn aranĝojn, ekzemple artajn festivalojn, konferencojn de sciencistoj aŭ teknikistoj, kiam ajn la cirkonstancoj tion permesas; (c) organizi aŭ helpi la organizon de kiel eble plej multaj internaciaj konferencoj de specialistoj, seminarioj, diskutrondoj kaj similaj aranĝoj, en kiuj estas traktataj internacie interesaj problemoj, kaj utiligo de tiaj aranĝoj ankaŭ por informado en neesperantistaj fakaj medioj; (ĉ) rekomendi, kuraĝigi kaj aŭspicii internaciajn renkontigojn kun kultura programo ekster la loko kaj tempo de la Universala Kongreso.

10. **Publikaĵoj**: (a) Ampleksigi kaj paralele plibonigi la revuon "Esperanto"; (b) daŭrigi la eldonadon de la Jarlibro en du partoj (la unua parto en printempo) kaj ampleksigi ĝin paralele kun la nombrokresko de individuaj membroj kaj delegitoj; (c) publikigi almenaŭ trifoje jare altnivelan kulturalan revuon; (ĉ) daŭrigi la eldonadon de fakvortaroj, sed pli atenti al la kvalito; (d) instigi eldonadon de antologioj de diversaj naciaj literaturoj en Esperanta traduko, aŭ mem eldoni

tiajn antologiojn; (e) daŭrigi la serion "Oriento-Okcidento"; (f) eldonadi aliajn elstarajn tradukajn aŭ originalajn verkojn kaj morale apogadi ĉiujn eldonistojn, kiuj publikigas valorajn verkojn en la Internacia Lingvo, precipe teknikajn, fakajn kaj popularsciencajn legaĵojn.

11. **Specialaj kulturaj agadoj**: (a) Daŭrigi I.S.U. kaj, se iel eble, organizi almenaŭ de tempo al tempo memstarajn sesiojn ekster la U.K.; (b) daŭrigi kaj plibonigi la belartajn kaj oratorajn konkursojn; (c) instigi precipe la lokajn societojn utiligi pli vaste la magnetofonan servon; (ĉ) vastigi la korespondan servon kaj ligi ĝin al aliaj organizaĵoj, kiuj prizorgas internacian korespondadon, tiel ke Esperanto fariĝu unu el la korespondaj lingvoj uzataj ankaŭ ekster la Esperanto-Movado; (d) plibonigi la filman servon kaj kuraĝigi la produktadon de filmoj en Esperanto; (e) helpi la vastigon de la uzo de Esperanto en la radio kaj en la eldonado de diskoj kaj de sonbendoj kun diapozitivoj; (f) instigi la utiligon de Esperanto por resumoj de libroj, studoj kaj artikoloj precipe kun scienca kaj faka karaktero; (g) kuraĝigi la uzon de Esperanto en komerco kaj trafiko; (ĝ) organizi internaciajn prelegvojaĝojn de kompetentaj prelegantoj-esperantistoj; (h) utiligi ĉiujn eblecojn por vastigi la uzon de Esperanto en la medioj de scienco, edukado kaj kulturo; (ĥ) plue apogi la agadon de la Internacia Arta Teatro.

B. Landaj Asocioj, Lokaj Societoj, Fakaj Organizaĵoj

12. **Landaj Asocioj**: Konforme al tiu-ĉi Baza Laborplano, prenante en konsideron la landajn cirkonstancojn kaj eblecojn, ĉiu Landa Asocio ellaboru propran konkretan programon kun aparta konsidero de jenaj taskoj: (a) organize plifortigi la Landan Asocion, altirante al ĝi la multnombrajn malnovajn esperantistojn kaj membrigante novajn (tiucele informi ilin interalie ankaŭ pri la Baza Laborplano de U.E.A. kaj de la koncerna L.A.); (b) aliĝi senprokraste al U.E.A., se la koncerna L.A. ankoraŭ ne estas aliĝinta asocio; (c) en kunlaboro kun la Cefdelegito, se tia ekzistas, varbi kiel eble plej multajn individuajn membrojn de U.E.A.; (ĉ) instigi la individuajn membrojn de U.E.A. fariĝi Delegitoj, Vicdelegitoj kaj Fakdelegitoj, precipe por la plej gravaj fakoj rilatantaj al scienco, edukado kaj kulturo; (d) organizi aŭ helpi

organizon de L.A. en najbaraj landoj, en kiuj ankoraŭ ne ekzistas L.A.; (e) formi junularajn sekciojn kaj altiri la plej kapablajn gejunulojn en la gvidajn organojn de la L.A.; (f) helpi la ekzistantajn lokajn grupojn kaj fondi novajn; (g) formi Informan Fakon, se tia ankoraŭ ne ekzistas, laŭ la Principaro de Frostavallen kun aparta atento al disvastigo de la Internacia Lingvo en la universitatoj, lernejoj kaj ĝenerale inter la junularo; (ĝ) organizi tutlandajn korespondajn kursojn, radio-kursojn kaj kursojn en nacilingvaj gazetoj; (h) uzi ĉiam la Internacian Lingvon ne nur en kongresoj, konferencoj, kunidoj kaj kunvenoj, sed ankaŭ ekster la oficialaj aranĝoj inter esperantistoj; (ĥ) enhave plibonigi la landan organon kaj publikigi ĝin laŭ ebleco nur en la Internacia Lingvo (por agado inter neesperantistoj oni eventuale eldonu specialan nacilingvan bultenon); (i) helpi ĉiurilate la centrajn organojn de U.E.A. en la realigo de la Baza Laborplano; (j) krei i.a. instancojn por lingvoscienco, kiuj prizorgu la plialtigon de la lingvonivelo de la landa esperantistaro, la plibonigon de la instruado, de la lernolibroj, la trastudon de lingvaj problemoj rilatantaj, unuflanke, al malutilaj influoj de la naciaj lingvoj kaj, aliflanke, al la neceso krei internacilingvajn esprimojn por specifaj nacilingvaj vortoj kaj esprimoj.

13. **Lokaj Societoj:** Konforme al tiu-ĉi Baza Laborplano kaj la Laborplano de la L.A., se ĝi ekzistas, ĉiu Loka Societo ellaboru propran konkretan laborplanon kun aparta konsidero de jenaj taskoj: (a) organiza plifortigo de la societo, speciala kampanjo por membrigi malnovajn esperantistojn, kiuj troviĝas ekster la societo, aligi novajn; (b) se iel eble havigi propran ejon kaj, en ĉiu okazo, propran bibliotekon, aboni la landan organon, la revuon "Esperanto" kaj kelkajn aliajn internaciajn revuojn; (c) starigi daŭran korespondan kontakton kaj laŭeble interŝanĝi vizitojn kun konvena nombro da eksterlandaj societoj; (ĉ) organizi junularan sekcion aŭ apartan junularan grupon; (d) formi landan asocion, se ĝi ankoraŭ ne ekzistas; (e) aligi ĉiujn siajn membrojn al la L.A. kaj varbi kiel eble plej multajn individuajn membrojn por U.E.A.; (f) prizorgi, ke en la loko de la societo kaj en la apudaj lokoj estu D de U.E.A., eventuale VD kaj kiel eble plej multaj FD precipe por la plej gravaj fakoj de scienco, edukado kaj kulturo; (g) organizi aŭ helpi la

organizon de Loka Societo en la apudaj lokoj; (ĝ) organizi Informan Fakon laŭ la Principaro de Frostavallen kaj aparte atenti la agadon en lernejoj kaj ĝenerale inter la junularo (en universitataj urboj nepre vastigi la informadon en la universitato); (h) organizi konstantajn kursojn por komencantoj (intensa reklamado antaŭ la kursoj) kaj progresintoj; (ĥ) membrigi la kursfinintojn al la L.S., L.A. kaj U.E.A.; (i) en pli grandaj urboj formi aŭ sekciojn aŭ novajn societojn (la spertoj montras, ke la granda plimulto de la L.S. atingas 60-80 membrojn, malofte ĝis 300, kio necesigas la fondon, en tiuj urboj, de novaj sekcioj aŭ societoj ĉu laŭ teritoria kriterio — urba kvartalo — ĉu laŭ profesia aŭ faka: junularo, studentoj, laboristoj, intelektuloj aŭ similaj grupoj); (j) okazigi regulajn ĉiusemajnajjn kunvenojn kaj konsiderinde plibonigi la programojn (prelegoj de la membroj, interŝanĝo de prelegoj kun eksterlandaj grupoj utiligante tiucele ankaŭ la Magnetofonan kaj Filman Servojn de U.E.A., literaturaj vesperoj; programoj konforme al la kunlaborado de U.E.A. kun Unesko, precipe rilate al la projekto Oriento-Okcidento; amatora teatra trupeto kaj kanĥoro, vivaj gazetoj, lumbildaj prezentadoj, partopreno en la organizo de prelegvojaĝoj, dancvesperoj, amuzoj kaj aliaj distrajoj, konstanta lingva kritiko kun la celo daŭre altigadi la lingvan nivelon); (ĝ) senescepta kaj senkompromisa uzado nur de la Internacia Lingvo por ĉiuj aranĝoj de la L.S., inkluzive la komitatajn kunsidojn; (k) helpi al la organoj de la L.A. kaj de U.E.A. realigi la Bazan Laborplanon kaj la Planon de la L.A.; (l) instigi esperantistojn eniri en diversajn mediojn kie Esperanto povas esti utiligata por internaciaj kontaktoj; tie disvastigi Esperanton kaj fondi grupojn.

14. **Fakaj Organizaĵoj:** Konforme al la Baza Laborplano ĉiu faka kaj specialigita organizaĵo ellaboru sian propran konkretan programon kun aparta konsidero al jenaj taskoj: (a) organize plifortigi la koncernen F.O., laŭ la eblecoj krei landajn sekciojn kaj lokajn grupojn, se tiaj ankoraŭ ne ekzistas; (b) aligi al U.E.A. laŭ art. 14 de la Statuto, se la koncerna F.O. plenumas la kondiĉojn; (c) instigi la membrojn aligi al U.E.A. kiel individuaj membroj kaj fariĝi FD por siaj respektivaj fakoj; (ĉ) organizi fakajn internaciajn renkontiĝojn ne nur dum

la U.K. sed ankaŭ ekster ili; (d) eldoni presitan fakan revuon aŭ pligrandigi kaj plibonigi ekzistantan, aŭ publikigi almenaŭ multobligitan fakan bultenon; (e) daŭre evoluigadi la fakan terminaron kaj eldoni kiel eble plej kompletan kaj modernan fakan terminaron, eventuale en la kunlaboro kun la centraj organoj de U.E.A.; (f) doni helpon al la centraj organoj de U.E.A. en la realigo de tiuj punktoj en la Baza Laborplano, kiuj interesas la koncernan F.O.

IV. EKSTERAJ TASKOJ

A. U.E.A.

15. **UNESKO kaj U.N.** : Utiligi ĝis maksimumo la eblecojn de la ĵus akirita nova pozicio (kategorio B) en la konsultaj rilatoj kun UNESKO por efike kunlabori kun tiu Organizaĵo kaj U.N. en ĉiuj aferoj, kiuj interesas la Esperanto-Movadon kaj en kiuj ĝi povas doni realan helpon al la plenumo de diversaj agadoj de UNESKO kaj U.N., tute speciale en la Granda Projekto "Oriento-Okcidento"; en la projekto koncernanta la antaŭenigon inter la junularo de la idealoj de paco, reciproka respekto kaj interkompreniĝo de la popoloj; en la agado en Afriko; disvastigo de la celoj kaj idealoj de UNESKO kaj U.N.; eldonado de klerigaj materialoj de UNESKO en la Internacia Lingvo; aktiva partoprenado en la konferencoj de UNESKO kaj en diversaj kunvenoj, seminarioj kaj aliaj aranĝoj organizitaj de UNESKO kaj U.N.

16. **Eŭropaj Institucioj** : Intensigi la klopodojn ĉe ĉiuj eŭropaj organizaĵoj kaj institucioj por la solvo de la lingva problemo de Eŭropo.

17. **Aliaj Regionaj Organizaĵoj** : Iniciti agadon, ĉiam kun la celo solvi la lingvan problemon, simile al la agado en Eŭropo, ankaŭ ĉe aliaj gravaj interŝtataj regionaj organizaĵoj.

18. **Specialigitaj Organizaĵoj** : Daŭre kontaktadi ĉiujn registarajn specialigitajn organizaĵojn kaj atentigadi pri la solvo de la lingva problemo per la Internacia Lingvo (unu el la ĉefaj taskoj de CED).

19. **U.I.A.** : Konservi kaj plifirmigi la rilatojn kun la Unio de Internaciaj Asocioj, liveri al ĝi la necesajn dokumentojn kaj aliajn materialojn pri la Internacia Lingvo, aktive partoprenadi en diversaj laboroj de U.I.A.

